



# La sonorilo de Bled

Stevan Živanović



# LA SONORILO DE BLED

Stevan Živanović

Slovenia Esperanto-Ligo

Ljubljano, 2020

# La sonorilo de Bled

Stevan Živanović

Originale verkita romano

Redaktado: Mario Vetrih  
Lingva revizio: Janez Jug  
Enpaĝigo: Mario Vetrih  
Kovrilo: Frenk Ropret  
Eldonis: Zduženje za esperanto Slovenije –  
Slovenia Esperanto-Ligo  
Štefanova 9, SI-1000 Ljubljana,  
Slovenio  
info@esperanto.si, <http://esperanto.si>  
Por la eldonejo: Janez Jug

Ljubljano, 2020



Ĉi tiu verko estas disponebla laŭ la permesilo  
Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonda.

Libere elŝutebla de la retejo  
<https://esperanto.si/eo/la-sonorilo-de-bled>

Kataloŝni zapis o publikaciji (CIP) pripravili  
v Narodni in univerzitetni knjiŝnici v Ljubljani  
COBISS.SI-ID=23226627  
ISBN 978-961-90916-6-1 (epub)  
ISBN 978-961-90916-5-4 (pdf)

*Stevan Živanović (1900-1938) estis tre konata kaj tre diligenta esperantisto inter la du mondmilitoj en la tiama Jugoslavio. Profesie li estis kuracisto. La romano Sonorilo de Bled estis verkita ĉirkaŭ la jaro 1925 en Esperanto kaj estis publikigita kiel literatura heredaĵo post lia morto en la jaro 1959. Ĝi estis la sola romano en Esperanto, kiu okazas en Slovenio.*

*En la epoko de la romano Bled estis ripozloko de la Reĝlando de Jugoslavio kaj kune kun Bohinĵ ofte la restadejo de membroj de la Jugoslavia Reĝa Dinastio.*



# La unua parto

## I

Vagonaro rapidis preskaŭ vete tra ĉarmaj regionoj de la bela Slovenio. Malantaŭ ĝi veturis sur polvoplena ŝoseo ĉarma aŭtomobilo. Post kelkaj momentoj, estinte pli rapida, la aŭtomobilo atingis nigran monstron, kiu el sia fumotubo elĵetas nubojn da fumo kaj siblas kiel serpentego.

Atinginte la vagonaron, vojaĝantoj de la aŭtomobilo vidis kelkajn homojn, kiuj el la vagonaro per siaj poŝtukoj svingis la kutiman saluton. Sed ĝi daŭris nur kelke da momentoj, ĉar la aŭtoq-moq-bilo, pro kurbiĝo de la ŝoseo, baldaŭ ne estis videbla por fervojovojaĝantoj.

Duonhoron post la renkonto de du interkomunikiloj la aŭtomobilo haltis ĉe la supraĵo, sur kiu estas hotelo 'Mondo'. Uniformita servisto elprenis la pakajojn de la alvenintoj. Polvigataj de kapo ĝis piedoj, la alvojaĝintoj provis forigi polvon de sur siaj vestoj, sed la sukceso estis preskaŭ nenia. Kvazaŭ hontemaj pro la stranga aspekto, ili rapide supreniris la ŝtuparon, kondukantan al la unua etaĝo.

Ekstere regis julia varmego, malagrabra pro siaj tiel nomataj 'hundaj tagoj'. La suno jam trairis la duan trionon de sia ŝajna enĉiela vojaĝo.

"Estas tro varme, miaj sinjoroj. Tamen mi estas feliĉulo, ĉar se mi estus dika, trioble pli malfacile mi tolerus ĉi tiun sufokan aeron. Aĉe estas vivi dum somero. La suno brilas, kvazaŭ ĝi intencus rosti mian kapon. Mi kredas, ke la tuta mondo tamen ne suferas pro varmego. Diru, sinjoro Miroir, ĉu en Suda Francujo la suno same tiel brilegas?"

Ĉi lastajn vortojn elparolis sufiĉe alta homo, aĝa ĉirkaŭ kvardek jarojn, kun malgrandaj, vivecaj okuloj, kun bruna, mallonga barbo. Li estas inĝeniero Memo.

Turninte sin al la parolinto, Miroir ridis pri tio, ke al Memo estas varmege post tiom rapida aŭtomobilveturado. Li konfirmis al li, ke Sudan Francujon premas la sama varmege, se eĉ ne pli alta temperaturo regas lian naskourbon Marseille. Respondinte al la inĝeniero, li turnis sin al apud li staranta kunvojaĝinto:

“Sinjoro Duulo, laŭ aspekto de tiu ĉi regiono inter la montoj, ŝajnas, ke tie ĉi estas belege. La ĉirkaŭaĵo al mi tre multe plaĉas. Certe al vi ne mankos amuziĝoj, vi povos pentri tiun ĉi regionon, kaj ĝiaj naturvidindaĵoj liveros al vi belegajn pejzaĝojn.”

“Efektive, tie ĉi estas agrable,” respondis la pentristo. “Espereble vi eksentos, ke ĉi-tieaj naturbelajaĵoj homon povas eĉ feliĉigi. Per la rigardado de naturaj belajaĵoj oni povas forigi ĉiujn premantajn pensojn, refreŝigi sian cerbon kaj forgesi la pasintaĵojn. Tie ĉi, miaopinie, estas la ĝusta loko por la anima ripozo, kiun mi ankaŭ nepre bezonas. Vi verŝajne longe memoros pri Bled, tion mi antaŭsentas. Ne demandu kiel, sed ofte mi povas deĉifri ion, kio okazos en la estonteco.”

Miroir ekridetis pro la dirita strangaĵo. Li ne volis plu paroli, dum liaj kunvojaĝintoj ankaŭ eksilentis kaj rigardis diversajn objektojn en la akceptejo, simple meblita, kiel en ĉiuj hoteloj por la gastoj, ne ŝatantaj lukson. Ĝi estis pura ejo kaj, juĝante laŭ ĝia aspekto, oni povus konjekti, ke la hotelo estos agrabla restadejo.



“Miaj sinjoroj,” ekparolis la inĝeniero, kies voĉo estis forta, pro kio ŝajnis, ke li volas paroli al la publiko, “pli rapide ni alvenis ol rapidvagonaro, kvankam ni ekveturis kvar horojn post ĝi. Kion vi opinias pri mia aŭtomobilo?”

“Ĝi estas belega aĵo. Oni vidas, ke vi komprenas vian fakon,” respondis la pentristo Duulo.

“Ĉiun ŝraŭbon de la motoro mi mem faris. La tuta afero daŭris tri jarojn. Mi ŝanĝis preskaŭ ĉiumonate kelkajn gravajn partojn de la motoro kaj enmetis pli novajn kaj perfektajn. Komprenoble, mi mem ĉion perfektigis kaj fine la rezulto estas tre bona. Cent kilometroj en horo ni veturis. La rapideco de ducent kilometroj estus ankaŭ atingebla, se la ŝoseoj ne estus plenaj de truoj kaj se mi kuraĝus riski la vivon. Nu, mia Miroir, ĉu vi aŭdis pri io simila en Francujo?”

“Kredu al mi, dum la legado de viaj leteroj mi ĝis antaŭnelonge ridis pri via fantazio. Nun mi bedaŭras mian ridon, konvinkita, ke via akumulatoro ŝajnas efektivegebla afero.”

Iom ofendita pro la dubemo de Miroir, Memo respondis:

“Ĝi jam ekzistas, per ĝi vi veturis, nekredemulo. Kion fari, la virinoj estas pli interesaj objektoj por vi ol mia akumulatoro. Bedaŭrinde, ankaŭ ĉe ni multaj junaj homoj dediĉas tro multe da tempo al senvaloraĵoj, amuzajoj, anstataŭ al pli utilaj aferoj,” li moke aldonis.

“Nu, vi pravas. Tamen, ne ĉiuj homoj povas esti tiaj kiel vi, ĉar malgraŭ via aĝo vi ankoraŭ ne edziĝis. Certe vi ne havis tempon por pensi pri tio,” respondis Miroir.

“Ha, sinjoro inĝeniero iagrade eĉ malŝatas la virinojn! Li certe havas gravan kaŭzon por tio, nur ni estus maldiskretaj, se ni detale preparolus la aferon,” aldonis Duulo.

“Babilu, kion vi volas, min pli interesas mekaniko kaj, se la virinoj estus tiom interesaj, eble mi okupus min ankaŭ pri ili,” respondis Memo kolereme.

“Kiajn vortojn vi uzas! Tamen vi povus rakonti almenaŭ nun pri io pli aktuala ol estas mekaniko,” moke riproĉetis Duulo.

La inĝeniero ekridetis kaj oni vidis, ke lia rideto estis nur ŝajna esprimo de gajeco, ĉar li efektive ekkoleris.

Iom poste Miroir demandis Duulon pri horo de alveno de la societo, pri kiu ili parolis dum la veturado.

“Vi ĝin post mallonga tempo vidos kaj certe ne bedaŭros tion. Al ĝi apartenas kelkaj belaj fraŭlinoj kaj unu belega, aŭ pli bone, eĉ ĉarmega sinjorino. Ĉu vere, sinjoro Memo?”

Akcentante ĉi-suprajn vortojn pri la sinjorino, la pentristo denove kolerigis la inĝenieron. Tiu ĉi ek-mordis sian malsupran lipon pro kolero kaj ruĝiĝis. Tamen li rapide trankviliĝis kaj per afabla voĉo rekomendis al la pentristo zorgi pri siaj propraj aferoj. Al li estis malagraba tia konduto de Duulo, tial ke liajn vortojn aŭdis Miroir, kiu eksciis kelkajn intimajojn pri siaj konatoj. Estas vero, la pentristo antaŭe ofte mokis Memon pro sinjorino en intima rondo, kaj li ne koleris. Nun, ĉar ĉeestas Miroir, por ili ankoraŭ fremda persono, tiu ĉi mokado lin kolerigis, kaj li trovis necesa klarigi la aferon, por ke Miroir

ne estu pri ĝi malbone informita. Li akcentis, ke li ĝis nun preferis amuziĝi kun la sinjorino, kies nomo estas Julinjo, ĉar en la societo estas plejparte gejunuloj, pro kio li, estante pli aĝa homo, amuzas la sinjorinon. “Ŝi povas kelkafoje paroli pri seriozaj aferoj, kvankam la serioza parolado kun virinoj estas tre malfacila afero,” li finis sian frazon.

Miroir tute ne aŭskultis lian klarigon, ĉar al li ŝajnis superflua ĉi tiu diskuteto, kiu lin tute ne rilatas. Krome, estis por li malagrabla kiel al gasto tuj komence interesiĝi pri la intimaĵoj de siaj konatoj.

Respondante al la klarigo de Memo, Duulo pardonpetis, akcentinte, ke li ne volis lin ofendi. Li volis klarigi ankoraŭ ion koncerne ĉi tiun aferon, sed ĵus alvenis direktoro de la hotelo, pro kio li devis eksilenti. Tiu ĉi salutis la gastojn per profunda kapklino. Pro sia korpulenteco al la gastoj li ŝajnis kiel grasa amaso, ŝovanta sian ventron antaŭ si. Pro lia ridinda staturo Miroir laŭte ekridis elkore kaj ĉiuj konsterniĝis pro tiel subita ridado, ne sciante ĝian kaŭzon. La direktoro lin rigardis strange, kredante, ke la gasto ne estas tute normala homo, kaj Miroir pro tiu stranga rigardo post tre mallonga tempo serioziĝis. La direktoro prenis de sur la tablo dikan libron, trovis la numerojn de lueblaj ĉambroj kaj ordonis al ĉambristino gvidi la gastojn. Ĉiujn demandojn li respondis per agrabla, preskaŭ humila voĉo, kvazaŭ hundo deziranta ricevi bongustan oston, sed la ordono al la ĉambristino pruvis, ke li scias eĉ ordonadi kaj severe agi kontraŭ siaj subuloj.

Lacaj pro vojaĝo la gastoj pene ekiris al siaj ĉambroj.

## II

Anoncante la naskiĝon de nova tago, la suno leviĝis. Tra malfermita fenestro en la ĉambro de sinjoro Miroir enpenetris freŝa matena aero. Li dormis. La suno baldaŭ leviĝis pli alten kaj per siaj radioj lumigis la tutan ĉambro, pro kio Miroir, malfermante la okulojn, gaje ekridetis. Tiu ĉi rideto ŝajnis la rideto de homo refreŝiĝinta dum sonĝo. Miroir multe sonĝis ĉi-nokte. Oni eĉ povus diri, ke liaj diversaj sonĝoj estiĝadis unuj post la aliaj per fulma rapideco, pro kio ili ne estis klare percepteblaj por lia cerbo. De tiuj sonĝoj li provis rekonstrui tiun, kiu en lia memoro ŝajnis la plej bela. Vane. Ne estis eble revenigi la sonĝon pri iu ĉarma persono, jam delonge serĉata kaj foje en sonĝo vidita, sed neniam aperinta en la realeco. Ĝi aperis kelkfoje en lia fantazio eĉ tage, sed malgraŭ granda imagopovo lia cerbo nun vane penis ĝin reaperigi.

“Hm, ĝuste ŝi, vane serĉata en la vivo. Efektive, kia ŝi estas?”

Per sia riĉa, poeta fantazio, li denove provis el pensoj riveli la virinon, kies apero en la sonĝo ne estis klara. Eble li tamen sukcesus, se lian cerbon ne regus stranga pezo, kiu ŝin el memorĉelo elpremadis kaj li ne povis memori pri ŝi. Apenaŭ liaj pensoj koncentriĝis ĉe la imaga estaĵo, tuj ilin anstataŭis novaj ekpensoj pri diversaj dumvojaj okazintaĵoj. Kiom ajn li deziris forgesi ĉiujn survojn impresojn, kiom ajn li penis mediti nur pri sia imaga virino, li ne povis riveli la bildon en la cerbo, ĉar survojn impresoj estis pli fortaj. Tial Miroir eĉ malvolonte devis cedi al la estonteco, ke ĝi deĉifru ĉi tiun enigmon. Kolere li marŝis tra la ĉambro, riproĉante al si, ke li ne povas

koncentri siajn pensojn. Li preskaŭ estis preta kredi, ke la poeta donaco de imagebleco ne plu bone servas al li. Li riproĉis sian decidon veni ĉi tien, kie la naturo perforte devigas lin nur adori ĝian belecon kaj en lia cerbo respeguligas sian admirindan aspekton, forprenante la aliajn pensojn.

Momente estis al li malklara eĉ la celo de la vojaĝo. Ĉu li en Marseille efektive eksentis strangan deziron edziĝi en Jugoslavio? Kial? Ĉu tial, ke unika lia korespondanto estis lastatempe jugoslavo? Aŭ, eble li estis konvinkita pri beleco de ĉi-tieaj virinoj. “Ho jes, mi memoras, ke mi vidis dum la terura mondmilito multe da jugoslavaj virinoj. Ili estis pro funebro plejparte nigre vestitaj, sed tamen plaĉindaj. Kiom da fojoj mi aŭdis pri ilia fabela fideleco. La francaj virinoj tre ofte al mi ŝajnis artaj pupoj, kreitaj nur por materiala ĝuo. Kaj nun, ĉu post tiaj konvinkoj mi povus entute imagi mia edzino iun francinon? Ne, centfoje ne. Mi do efektive venis pro mia edziĝo. Sed ne estis nur ĝi la kaŭzo de mia vojaĝo,” daŭrigis Miroir paroli al si mem. “Mi, konata franca verkisto, intencas surprizi francan publikon per unu bona romano. Multe mi ne envias mian nun jam mortan konkuranton Pierre Loti pro liaj longaj vojaĝoj, sed mi tamen decidis vojaĝi, por ke mi travivu unu novan okazintaĵon por mia romano.”

Miroir ne meditis, ke Pierre Loti komprenis la susuron de herboj kaj mildan ondokantadon de la maroj, sur kiuj li vojaĝis, ke li sentis la batojn de virinaj koroj, ke li sincere ploretis pro doloroj de orientaj virinoj, ĉar li ilin eksentis. Miroir imagis la tutan aferon alia, ol ĝi estas. Li kredis, ke la vojaĝo per si mem pliriĉigos lian fantazion, kaj ke li travivos ion eksterordinaran. Superflue al li ŝajnis, ke en krudaj

travivaĵoj li eksentu almenaŭ parte la pulsadon de la vivo, kiu kreas ofte pli nekredblajn okazintaĵojn, ol ilin povas krei verkista fantazio. Nun, meditante pri la virinoj en Francujo kaj komparante ilin kun tiuj en Jugoslavio, li imagis, ke ĉe la lastaj la fideleco estas firma eco, ĝermanta en la koroj de la virinoj, eĉ ne pensante pri la alia ebleco, ke la fideleco estas ege relativa afero. Vere ĝi ĝermas en la koro de virinoj; ĝi estas al ili de la naturo donacita en pli alta grado ol al la viroj, sed ĝi similas al birdeto en la kaĝo; se oni malfermas la pordeton, ĝi ofte forflugas, kaj pri forflugintaj birdoj oni malofte aŭdas, ke ili revenas. Kaj tiun pordeton la viroj ofte malfermas, plejparte pro sia stranga nekomprenemo, se ni ne volas mencii la ceterajn psikajn kaj aliajn kaŭzojn.

Stimulita de sonorado de malgranda sonorilo, Miroir eksentis delikatecon en sia interno. Tra frumate-no la sonoj de sonorilo sorĉe vagadis. Kiel kanto jen disvastigadis mildaj sonoj, portataj de etertremeto, jen malaperadis. La sonorilo ŝajnis admonanta la homojn per sia sonorado, pro kiu en silento eĥas la tuta ĉirkaŭaĵo.

Miroir ne sciis, kial oni sonorigas tiel ofte. Li aŭdis la sonoradon, kaj ĝi ŝajnis al li muziko, kantata de ĥoro de anĝeloj, portantaj la amon, pasian amon, donante ankaŭ al li ereton da ĝi. Ĉe la fenestro li subite ekflustris la versojn de jena poemo:

*“Paradizon teran vidis  
Mi en lando nekonata. . .  
Venu al mi, tien iri  
Kune devas ni, amata. . .*

*Tie, kara, ni aŭskultos*

*Sonorilan kanton belan  
Kaj en korpoj sentos amon  
Fortan, fajran, kaj misteran.”*

Pro supraj versoj li entuziasmiĝis. La poemo al li tiom plaĉis, ke li pro ĝojo saltetis en la ĉambro.

“Kie mi aŭdis la poemon, tiom klare esprimantan la sentojn de mia animo?”

Li ne kredis, ke li ĝin nun mem verkis, kvankam tiel estis. Longatempe li observis la ĉirkaŭaĵon kaj avido enspiradis freŝan aeron. Iom poste li lavis sin kaj eksentis, kvazaŭ liaj pensoj refreŝiĝus. Post viŝado de siaj vizaĝo kaj manoj li ekvestis sin, sed malgraŭ tiu okupo li ne povis forigi la impreson, estiĝintan en lia animo pro la poemo.

“La vivo estas bela kaj mi ne havas amatinon,” li eksopiris mallaŭte. “Hm, ĝi estas banala penso. Juna mi estas. Ankaŭ banala konstato. Mia korpo estas bela kaj tamen mi ne trovis ĝis hodiaŭ la kamaradinon por mi. En Francujo ĝi estis tute malebla afero.”

Denove Miroir koleris pro francaj virinoj, ne sciante, ke li, nuna revanto pri la fideleco, povus ankaŭ perfidi sian idealon kiel multaj aliaj viroj, eĉ liaj amikoj. Li kredis sin pli nobla ol ili. Eble li tamen estis escepto inter aliaj siaj konatoj?

Eble Miroir daŭrigus mediti, se subita frapado sur la pordon ne ekĝenus lin. Eĉ li ekkoleris, ke oni lin ekĝenis en la meditado, sed tamen li gajniĝis, tuj kiam la inĝeniero eniris en la ĉambron.

“Post la matenmanĝo ni veturos al stacidomo. Je la deka horo alvenos la vagonaro kun la societo,” diris seke Memo.

“Al la stacidomo,” gaje rediris Miroir. “Ĝi estas belega afero, ĉar mi denove ĝuos en via aŭtomobilo. Hodiaŭ, mi esperas, vi ne veturos tiel rapide, ĉar la kapoj estas tro karaj kaj abismoj tre profundaj. Almenaŭ min mi ne dezirus surfunde vidi!”

Lia voĉo sonis gaje kaj Memo ridetis pro tia esprimo pri terura, okazebla danĝero. “Kiu scias,” li meditis, “ĉu mi iufoje rompos mian kolon, eble eĉ dum la momento, kiam vivo fariĝos por mi pli bela.” Kaj dum la tuta veturado li memoris pri la vortoj de Miroir, pro kio la aŭtomobilo tre malrapide veturis. Oni vidis, ke ĝia posedanto ne plu havas la intencon pruvi, kiom rapida ĝi povas esti. Sed, revenante al la hotelo, la veturado ne estis plu tiom singarda. Eble pro tio, ke Memo malŝatis varmegon, pro kiu fariĝis aero sufoka, kiam la brilanta suno tagmeze alproksimiĝis al zenito. Spite tion en la salono de la hotelo ĉiuj estis gaje disponitaj. La varmego ilin ne ĝenis; la junularo eĉ dancis. Sufoka aero regis la salonon. Kvankam ekstere tiu sama sonorilo, pri kies sonorado dum frumateno meditis Miroir, sonoris tre forte, ĝiaj sonoj en la salono ne estis klare aŭdeblaj pro tre laŭta bruo. La junularo senlace dancis, entuziasmo ekregis ĝian animon. La paroj turniĝis, ŝovis unuj la aliajn kaj dancante moviĝis de unu flanko de la salono al la alia. Preskaŭ neniuj ili rimarkis, kiel rapide oni povas la salonon multfoje trairi, eĉ ne eksentante laciĝon. Ĉiu vejneto en la korpo forte batis, la dancado ŝajne flustris pri la beleco de la vivo.

Tute neĝenataj de bruo kaj amuza dispono de la aliaj, en la angulo sidis kelkaj tre serioze parolantaj personoj. Ilin ne interesis la dancado. Jen, inter la aliaj la inĝeniero Petro Memo kun sinjorino Julinjo. Ili sidas unu apud la alia kaj dekstre de Memo sta-



ras la pentristo Jozefo Duulo. Lia alta staturo estas bone rimarkebla inter la aliaj. Li havas seriozan, iom doloraspektan mienon. Lia vizaĝo estas longeta, kun bela, simetria nazo. Liaj bluaj okuloj serioze observas la gedancantojn, dum li aŭskultas la rakontadon de Memo pri la aŭtomobilo. Memo trovis ankaŭ tie ĉi bonan okazon por laŭdado de sia veturilo. Per tia rakontado li ofte preskaŭ turmentis siajn geamikojn, tiel nun neniu multe atentis pri ĝi.

Kelkfoje aperis sur la frunto de la pentristo malgrandaj sulketoj; li por momento ĉesis rigardi la gedancantojn kaj direktis la okulojn al Memo. En ĉi tiuj okuloj ŝajne io flamis kaj la rigardo estis akra, pro kio Memo mallevis siajn okulojn.

Ŝajnas, ke nur la sinjorino atente aŭskultis la rakontadon. Ŝi kapjesis multfoje, dum Memo parolis pri supozeblaj danĝeroj de la veturado, kvazaŭ ŝi volus montri intereson por tio. Ŝiaj nigraj haroj estas densaj, atenteme kombitaj kaj bele ordigitaj. Ŝi estas tridekjara, mezalta, ne estas dika, nek maldika. Sur supra parto de ŝia korpo oni tre bone rimarkas, proporcie al ŝia korpoalteco, sufiĉe altan bruston. Ŝiaj nigraj okuloj kelkfoje eĉ okulumas al Memo. Li verŝajne rimarkas ŝiajn signojn, ĉar la muskoloj de lia vizaĝo ektemas ĉe ĉiu rigardrenkonto, dum sur liaj lipoj aperas rideto, kiun oni povus konsideri gaja. La atentema observanto rimarkus, ke li tamen ne estas indiferenta kontraŭ ĉiuj virinoj.

Kvankam sur la lipoj de sinjorino Julinjo, el kiuj la malsupra estas pli dika, ankaŭ montriĝas la rideto, ĝi estas apenaŭ rimarkebla, ĉar ŝi pli lerte kaŝas siajn sentojn. Tamen Duulo bone rimarkis, kio okazas en ŝia animo. Nur ne estis al li konate, kiam okazos la akcidento, pri kiu li estis certa, ke ĝi okazos. Li

tamen estis konvinkita, ke ĝi okazos jam post mal-longa tempo. Lin ne interesis la aŭtomobilo, tiom da fojoj de Memo priskribata kaj laŭdata, sed des pli grandan intereson li havis por diveni, kio okazas en interno de la konatoj. Li tiom sin okupis pri tio, ke li ne rimarkis, ke pasis sufiĉe da tempo, ĝis Memo ĉesis paroli, farinte per sia poŝtuko la geston, kvazaŭ li volus forviŝi la ŝviton de sur sia vizaĝo. Duulo subbarbe ekridis, ĉar Memo, granda kontraŭulo de varmego, eĉ tiam, kiam li tute ne ŝvitas, ŝajnis hipohondro, al si konstante sugestanta la varmecon, provante la samajn sentojn altrudi al la aliaj.

“Vi sufiĉe staris,” kokete rimarkis al Duulo sinjorino Julinjo. “Vin doloros la kruroj.”

“Tio ne ĝenas. Miaj kruroj povas tion ĉi facile elteni. KREDU al mi, efektive mi tute forgesis, ke mi staras, ĉar en tiel amuza societo, kia estas la nia, precipe proksime de belaj virinoj oni forgesas ĉiujn penojn.”

“Li mokas min,” ekpensis juna sinjorino kaj sur ŝia frunto li rimarkis kolersulketojn. Krome, ŝia mieno tute serioziĝis kaj evidentigis la signojn de kole-reco.

Duulo tion bone rimarkis kaj esperis, ke ŝi eĉ insultos lin, sed post momento li rapide ekparolis pri la alia temo, tiel ke ŝi ne havis tempon por ekparoli la unua. Li komencis laŭdi la dancadon kaj la rapida transiro de unu temo al la alia ne ebligis al la aliaj ĉeestantoj rimarki, ke Duulo make ofendis la sinjorinon. Li rimarkis, ke ŝi ruĝiĝis, sed respondi ŝi plu ne kuraĝis, tial li senĝene finis sian laŭdadon de gedancantoj.

“Kian sencon havas la dancado?” subite demandis Memo Duulon:

Duulo ekmordis sian malsupran lipon, ĉar Memo starigis denove la demandon, pri kiu ili fojon preskaŭ malpaciĝis, ne povante akordigi siajn opiniojn. La pentristo bone memoris la skandalon, kiu igis eĉ la intervenon de societa prezidanto, tial li decidis esti pli singarda kaj eĉ cedi al Memo, se alia solvo ne estos ebla.

“Hm, al ĉiu la dancado ne plaĉas, sed oni devas cedi al temperamento de gejunuloj, opiniantaj, ke sen la dancado la vivo ne estus tiom bela. Mi ne dancas, sed ne pro malŝatado de la dancado. Mi havas por tio gravajn kaŭzojn, kaj se ili ne ekzistus, ankaŭ mi volonte dancus. Tial mi ne povas riproĉi gejunulojn kaj en mia kapo neniam estiĝis la ideo mediti pri senco de dancado.”

“Strange vi parolas. La dancado tamen havas nian sencon, kara amiko. Mi vin petas, bonvolu rigardi tiun ĉi fleksadon, okulvideblan stimulon de korpoj, proksimiĝantaj tiom multe unuj al la aliaj ĉe Shymmi-danco. Ĉu tiel ne aspektas la dancoj de sovaĝuloj en Afriko? Ĉu vi ne konsideras tion ne nur malmorala, sed ankaŭ sovaĝa?”

La vortoj estis elparolitaj tre laŭte, tial kelkaj gedancantoj turnis siajn kapojn al Memo kaj ridetis al severa juĝisto, ilin kondamninta eĉ je sovaĝeco.

SinJORINO Julinjo konfirmis per kapjeso la vortojn de la inĝeniero Memo, al kiu Duulo respondis per afabla voĉo.

“Kio koncernas Shymmi-dancon, ankaŭ mi povus akcepti vian opinion, ke, laŭ la morala vidpunkto, ĝi

estas same tiel hontinda kiel la aliaj hodiaŭ modernaj dancoj. Cetere, spite tion, oni devas estimi la publikan opinion de homoj. Se ili toleras la dancadon, kial ni kondamnu ĝin je malmoraleco? Tio estus ridinda, kiel se mi asertus, ke profesio de la inĝenieroj estas malnobla, ĉar ili konstruas kanonojn, dum milionoj da aliaj homoj estaj konvinkitaj, ke krom konstruado de kanonoj ili klopodas plejparte faciligi la vivon al la homaro. Tial estas ridinde paroli pri moraleco aŭ malmoraleco de dancado ĝenerale, ĉar multaj dancoj tamen estas agrabla kaj tute morala afero. Ĉu Shymmi-danco estas malmorala, tio dependas de la opinio de pastroj, kiuj hodiaŭ deziras esti almenaŭ estroj en siaj preĝejoj kaj. . .”

“Mi ne volas aŭskulti pri tio, kara sinjoro,” ne permesis Memo al li fini la frazon.

“Pardonu, mi deziris konkludi, sed vi ne permesis, ke oni ne povas ĝenerale paroli pri malmoraleco de la dancoj, ĉar ĉio aspektas, kiel la plimulto volas ĝin havi. Se por vi estas la dancado malmorala kaj por mi ĝi estas, diru ni, morala, ni neniel povus interkonsenti. Bona afero. Sed, ĉar ni jam komencis diskuti pri moraleco, bonvolu iom aŭskulti mian opinion pri tiu afero. Ekzemple, al mi estas tute egale, en kiu ajn formo oni ĝuas la belaĵojn de la vivo, nur se tio estas permesata. Se la homoj trovis, ke la dancado estas al ili konvena formo por ĝuado, ĉu utilis iu kritiko kontraŭ la opinio de plimulto? Vi ankaŭ bone scias, ke la plejparto da homoj konsideras la edzecon tute natura kaj memkomprenebla afero, dum ĝi kune kun vi naŭzus, se tio en la edzeco permesata kaj de la naturo kreita, okazus publike. La fakto estas, ke tio okazas, kara sinjoro. Por mi estas grava nur la okazintaĵo, sed laŭ morala vidpunkto de homoj, kion ankaŭ provas

la edzeco, estas grava la formo. Kontraŭ la edzeco vi kiel prudenta homo neniel kuraĝus protesti, ĉar tion la plimulto konsideras necesa, sed vi kuraĝis riproĉi pli malgravan formon de alproksimiĝo, kiu tute koincidas kun la opinio de la plimulto. Ekzistas la aferoj, kiujn la homaro pro iu ajn persono neniam oferos, ĉar ili estas laŭ ties gusto permesataj, eble eĉ nepre necesaj. Kaj ĝuste en la dancejoj en nuna tempo prezentiĝas la plej bonaj okazoj por interkonatiĝoj, kies sekvo ofte estas la edzeco. Pri tio demandu kelkajn patrinajn, kaj vi sciiĝos pri la vero, se ili estos sinceraj, ke ili kondukas siajn filinojn en la dancejojn por ke ili trovu konvenan edzon,” finis tute senĝene Duulo.

SinJORINO JulinJO ruĝiĝis ĝis la oreloj, ĉar temis pri sufiĉe banale priskribita vero, kiun oni ne povus nei. Memo respondis:

“Teorie mi eble eĉ povus samopinii, se vi estus pli bona parolanto, sed mi petas, finu ni diskuton pri tiu ĉi temo. Mi ripetu, ke Shymmi-danco estas la rebrilo de sovaĝeco de Eŭropo kaj mi protestas kontraŭ ĝi, ĉar malkulture estas imiti sovaĝulojn en la esprimado de sentoj en tia formo.”

Duulo plenumis lian deziron kaj eksilentis kontenta, ke Memo tamen aliigis sian opinion, protestante fine nur kontraŭ Shymmi-danco. Li denove observis gedancantojn, dum sinJORINO JulinJO kaj Memo ekbabilis pri diversaj bagatelaĵoj. La sinJORINO ĉikanis kelkajn personojn. Ŝi deziris konvinkigi la inĝenieron, ke ŝi konas iliajn animaĵn ecojn. Unu el la emoj de la virinoj estas zorgi pri la aferoj de aliaj pli multe ol pri siaj propraj kaj ĝin ankaŭ posedis la sinJORINO, kiu tre volonte babilis pri ĉeestantaj gedancantoj. Ŝi parolis interalie al Memo, ĉe kiu paro ekestis, laŭ

ŝia opinio, reciprokaĵoj kaj simpatioj kaj kiuj paroj fariĝos geedzoj. Poste ŝi ankaŭ konkludis, kiuj el tiuj artefaritaj geedzoj povus esti feliĉaj. Nekredeble ŝajnis, ke ĉio estas vera, sed ŝi sciis pri ĉiuj personoj kelke da detalaĵoj el ilia intima vivo. Kie ŝi prenis tiujn detalaĵojn, eĉ Duulo admiris, sed li ŝajne amuziĝis per observado de gedancantoj, tiel ke ŝi ne rimarkis lian subaŭskultadon. Ankaŭ Memo vigle partoprenis en la nomita rakontado de Julinjo, parolante kelkafoje eĉ tiom rapide, ke lia malsupra makzelo tremis kvazaŭ pajlero sur ondetoj. Fine li ekbabilis pri la poeto Unulo, rakontante al Julinjo kelke da anekdotoj el lia vivo, pro kio ŝi multe ridis. Samtempe ŝi estis kontenta, ke denove ne ektemis pri la aŭtomobilo.

Dum ili babilis, la pianisto ludis laŭte. Danco ekestis pli vigla. Pro bruoj, kaŭze de sur la plankon frapantaj kalkanumoj de la dancantoj, la danco ŝajnis sovaĝa. Per rapidaj, ritmikaj paŝoj, la gedancantoj ŝajne flugis tra la salono kaj, se iliaj kalkanumoj ne farus tian bruon, oni povus imagi iliajn piedojn tute ne tuŝantaj la plankon. La granda bruoj daŭris mallongan tempon. La pianisto baldaŭ levis siajn manojn de sur la klavoj kaj la dancado ĉesis, kvazaŭ iu magiulo haltigus la kruojn de ĉiuj. Post ĝia finiĝo la gedancantoj malrapide braksubbrake promenis tra la salono. Kelkaj faris per siaj poŝtukoj artan venteton, por ke ili malvarmetigu siajn vizaĝojn. Kaj, denove klare aŭdiĝis malgranda sonorilo de ekstere.

Tiu ĉi ŝanĝo, antaŭ kelkaj momentoj forta bruoj pro la muziko kaj la dancado kaj nun monotonaj sonoj de la sonorilo, strange impresis Duulon. Ia malvarmo trapenetris lian korpon. Li eksentis, ke io malagrabra okazos, ĉar ŝajnis al li, ke la sonorilo dolore sonoras kvazaŭ heroldo de granda malfeliĉo. Li sen-

tis, ke ĝi nepre okazos kaj meditis pri siaj strangaj sentoj, kiuj lin ofte regis.

Iam, sidante ĉe la fenestro kun sia patrino, li eksentis, ke la tago de ŝia morto alproksimiĝis. Plenumiĝis liaj konjektoj jam post du tagoj. La sama afero okazis kun la frato, kiu mortis pro malfeliĉa akcidento. Poste sekvis la fianĉino. Ĉiam antaŭ tiuj akcidentoj regis lian animon strangaj sentoj, similaj al tiu, kiun li ĵus nun eksentis. Superstiĉa li ne estis, tial li ne kredis je diversaj antaŭsignoj, kiuj havas neniam gravan fundamenton. Pri tiaj li eĉ ridis, sed la sentoj, ĝermantaj en lia interno, estis tute aliaj, por liaj animaj okuloj estis videblaj tute precize la akcidentoj, kiuj poste sekvis. Tial li povus eĉ aserti, ke ĝuste tiel okazos, kiel li antaŭvidis. Kvankam nun li eĉ ne konjektis, al kiu minacas la danĝero, li sciis, ke ĝi estas kunligita kun la sonorilo. Tiu ĉi malklara antaŭsento okupis liajn pensojn nur mallongan tempon, apenaŭ kelkajn sekundojn, kaj lia rigardo, tiom akra kaj kuraĝa, fiksiĝis je tiu flanko de la salono, kie sur la sofo, apud malfermita fenestro, sidas Miroir kaj fraŭlino Ana. Vidante sian hieraŭan kunvojaĝinton, li ekdeziris lin saluti. Li efektivigus sian deziron, se multaj paroj ĵus ne komencus ŝoviĝi al tiu direkto, kie estis kelkaj malfermitaj fenestroj. Pro tiu ĉi intenco de gedancintoj Duulo restis sur sia ĝisnuna loko, de kie li povis vidi la tutan salonon kaj ĉion, kio en ĝi okazas.

Post kelkaj minutoj Duulo vidis, ke en la ĉambron eniris la poeto Johano Unulo kun fraŭlino Natalia. Ilia eniro estis akompanata per strangaj rigardoj de ĉeestantoj. Natalia eĉ ne rigardis la gedancintojn kaj paŝis kun Unulo rekten al Memo. Salutinte sian konaton kaj Julinjon, Natalia rakontis al la sinjorino pri

ĉarmegaj naturbelaĵoj, viditaj dum la marŝado tra Vintgar. Por ke ŝi havu atestanton por siaj vortoj, ŝi petis Unulon, ke li rakontu ion pri tiuj vidindaĵoj.

“Estis vere ĉarmege vidi la akvofalojn,” ekparolis Unulo. “Bedaŭrinde, ni iom laciĝis pro la marŝado! Tamen indis elvagoniĝi unu stacion pli frue por piede trairi la belan regionon! Ho, mia inĝeniero, kiom da kurento povus liveri tiuj akvofaloj,” finis per belsona kaj agrabla voĉo Unulo.

“Mi aŭdis pri la akvofaloj,” respondis Memo. “Bedaŭrinde, ĝis hodiaŭ mi ne eluzis okazojn por ilin vidi. Se ili estas vere tiom belaj, domaĝus malbeligi la belecon de la naturo pro teknikaj kaŭzoj.”

Duulo leviĝis kaj proponis al Natalia sian seĝon. La pentristo ĝojis pro ŝia granda senco por naturbelecoj, promesinte plenumi ŝian peton kaj donaci al ŝi kelke da pentraĵoj, prezentantaj tiun ĉi regionon, kiun li intencis post kelkaj tagoj viziti.

Post malmultaj minutoj alvenis al la pentristo Miroir kun fraŭlino Ana. Duulo prezentis francan poeton al Natalia kaj la inĝeniero konatigis lin al Unulo. Inter Unulo kaj Miroir baldaŭ estiĝis amika diskutado kaj, dum ili babilis, tra la salono promenis paroj braksubbrake. Multaj rigardis al Natalia, kiun iom surprizis jenaj vortoj de unu sufiĉe laŭte parolanta fraŭlino, kiu eĉ perfingre montris ŝin al sia kundancinto.

“Kial ŝi iris tra la arbaro kun li?”

Natalia ne koleris pro tio. Ŝi aŭdis pri si kaj Unulo multe babili kaj neniam ŝi penis kontraŭbatali tiajn kalumniaĵojn. Bone ŝi sciis, ke multaj paroj ĉikanos ŝin kaj Unulon, nur iom pli singarde, ĉar tiu fakto,



ke ŝi iris kun la viro tra la arbaro, estis bona okazo por ĉikani. “Cetere, kion farus junaj homoj, precipe fraŭlinoj, en la societoj, se ili ne kalumnius unu la alian?” ekflustris ŝi. “Sed, prezentiĝos al ili ankoraŭ kelkaj bonaj okazoj por babili, min ne ĝenas kalumniado, ĉar mia konscienco estas pura.”

Kion la junulino pritraktis permesata kaj purkonsciencia, ni ekscios ĝustatempe, nur ni nun menciui, ke pro la dancado lacaj gejunuloj plejparte dormis kelkajn horojn posttagmeze. Nur unu estaĵo ne volis ripozi kaj tio estis fraŭlino Ana.

Por fraŭlino Ana estis tiu ĉi tago unu el maloftaj, dum kiuj ŝi estas gaja. Temperamento de la junulino estas melankolia, pro kio ŝin ofte regas doloro. Estante riĉa, al ŝi nenio materiala mankis. Kion Ana ekdeziris, oni plenumis ĉiujn dezirojn, ĉar kiel unika infano de siaj gepatroj ŝi estis dorlotata. Ĉi-somere ŝi intencis ripozi en Bled, eluzinte la okazon ĉi tien vojaĝi kun la esperantista societo, kiu aranĝis malgrandan ekskurson. Ke ŝi povus poste enui sen amikoj kaj bonaj konatoj, pri tio la knabino ne pensis. En ŝia kapo eĉ ne estiĝis la ideo, kio estos post la foriro de la societo, kiu alvenis kun ŝi. Tial ke ŝi deziris vivi ĉi tie dum unu monato kaj ĝi estis al ŝi permesata, Ana estis sufiĉe kontenta. Eksciinte, ke la pentristo restos en Bled kelke da tagoj, ŝi esperis dum la tuta tempo babili kun li Esperante, kion ŝi multe ŝatis, des pli ĉar ŝi deziris lerni la lingvon paroli flue. Duulo ŝajnis al ŝi bona homo, kvankam lin ŝi ankaŭ pritraktis iom stranga. Oni povus eĉ diri, ke Ana lin ŝatis pli multe ol la aliajn virojn de la societo. Cetere, li estis bona amiko al ĉiuj.

Krom pri aliaj aferoj Ana meditis pri siaj vestaĵoj. Kiun ŝi devus hodiaŭ preni, por ke ŝi estu pli

bela, ĉarma? Ĉu ĝi estu blua, blanka, roza, aŭ iu alia? Ŝi zorgis tre multe pri la vestaĵoj, sed oni povas diri, ke tiajn zorgojn havas ĉiuj virinoj, precipe tiuj, atendantaj de la vivo por ili ion novan. Ŝia ĉefa deziro estis, ke ŝi estu plaĉinda, cetere ankaŭ alloga, kion oni al neniu virino povas riproĉi.

Disvolvinte siajn longajn harojn, kun kombilo en la mano Ana proksimiĝis al la spegulo. Antaŭ ĝi la junulino kombis siajn harojn. Dum tiu ĉi laboro estis sur ŝia vizaĝo gaja rideto. Ŝia mezalta, fleksebla staturo, estas ĉarma. La kruroj estas belaj, la brakoj marmorblankaj. Sur bone flegataj manoj oni vidas etajn fingrojn. Ĉarma kapeto, kun longaj, brunaj haroj, aspektas tre majeste. Ŝiaj okuloj, nedireble belaj, blujaj okuloj, kareseme rigardas sian propran korpon en la spegulo. En ĝi, kiun iu majstro inventis por la virinoj, ŝi vidas sin mem. Kaj ĝi al ŝi plaĉas (kiel al ĉiuj virinoj) tiom, ke ĝi fariĝis neanstataŭebla objekto. Malgraŭ granda superstiĉo rompiĝas ĉiutage sennombraj amalgamitaj vitretoj, kies fabrikado pro tio progresas.

Dum Ana sin mem rigardis en tiu sorĉa ilo, tremetis ŝiaj velurmolaj, brunaj, delikataj okulharoj. Kiam ŝi ridis, sur la vangoj aperis apenaŭ rimarkebla ruĝo, kaj la lipoj, karminkoloraj kiel koraloj, sen ia arta ruĝo, dekovris aron da perlaĵ dentoj. Efektive, malgraŭ tiu ĉi natura ruĝo ŝi ĉiam ekster sia ĉambro uzis ruĝilojn. Ŝin ne ĝenis ruĝigi siajn lipojn eĉ surstrate, sufiĉis nur, ke ŝi konsideru ilin nesufiĉe ruĝaj.

La junulino kunplektis siajn harojn en du harligojn kaj ĵetis ilin trans la ŝultrojn, pro kio ŝia staturo aspektis pli ĉarma. Poste Ana iris al la ŝranko, el kiu ŝi prenis rozkoloran bluzon. Baldaŭ reveninte al la spegulo, la knabino en ĝi ekvidis, ke la blanka ĉemizo

precize kovras ŝian tutan supran korpoparton, tiel ke sub ĝi estas videblaj ĉiuj formoj. Enŝovante maldokstran brakon en la manikon de rozkolora bluzo, ŝi levis la brakon tiel, ke la ĉemizo iomete malsupreniĝis de sur la brusto. Pro tio Ana ruĝiĝis kvazaŭ ŝin iu rigardus, ekvidinte sian marmorblankan, virgulinan bruston. Poste ŝi vestis la jupon. Promenante tra la ĉambro ŝi meditis kaj ne povis al si klarigi sian hontemon. Ĉu ĝis hodiaŭ ŝi ne vidis tiel bone sian korpon en la spegulo? Ho jes, ŝi ĝin vidis tiom da fojoj kaj ĝis hodiaŭ ŝi ne hontis. “Plu mi ne estas deksesjara knabineto, sed dudekjara fraŭlino, kial mi hontu? Ankaŭ mi konas la vivon. Tial estas malsaĝe honti,” ŝi fine aldonis. “Mi devus min eĉ bedaŭri, ke neniuj viro vidis mian nudan korpon. Ho Ana, tiel bela vi estas, sed vane vi posedas la junecon. Ah, kiel bela vi estas,” al ŝi ŝajnis, ke iu frustras. Kaj iu flustris, ĉu Dio, ĉu diablo, tute egale, grave estas, ke pro la flustro kvazaŭ kantus ŝia interno pasian kanton, kiu evidentiĝas per en subkonscio kaŝitaj kaj senprudente malzorgitaj deziroj.

Baldaŭ ŝi konsciiĝis kaj kontraŭbatalis internan voĉon, demandante duonvoĉe al si mem:

“Kion mi pensas? Mi pekas kontraŭ Dio, mi pekas kontraŭ mi mem, pritraktante min mem la idolo de la beleco. Tamen mi ne estas kulpa pro miaj pekemaj pensoj, kiuj ĝermas en mia animo. Ne, mi ne estas kulpa, stranga nur estas la bedaŭro de mia propra juneco. Kial mi tiel meditis?”

Tio ĉi ne klariĝis al juna knabino, nur en la subkonscio ŝi trafis la ĝustan vojon. Estiĝis la pensoj kaj ŝi imagis ĉiujn virojn por ŝi plaĉindaj. Ili ŝajnis al ŝi bonaj konatoj, kvankam neniuj plaĉis al ŝi tiom, ke ŝi povus pri li pli multe pensi ol pri la aliaj. “Neniuj

estis pli interesa,” diris Ana, sed la eldiro ne estis trafa, ĉar multaj plaĉis al ŝi, nur ŝi ne povis elekti.

Poste ŝi alvenis al la kofreto kaj prenis el ĝi la skateton de pudro. Tiam ŝi komencis denove elektadi per siaj pensoj:

“Estis kelkaj momentoj, dum kiuj al mi plaĉis la poeto Unulo. Mallongan tempon! Aŭ ne, eble mi sentis pli grandan simpatian al li dum kelkaj monatoj?” Ŝi daŭre pensis pri la juna poeto: “Kia li estas? Mezalta. Li havas sufiĉe belan korpon kaj nigrajn harojn. Ĉu liaj haroj estas efektive nigraj? Jes, kiel karbo. Li ilin altiras surfrunten. Revemulo. Liaj okuloj estas nigraj kaj vivecaj. Super ili vidiĝas nigraj brovoj, kiuj kuniĝas. La nazo ne estas eksterordinara. La vizaĝo estas longa, nigre pala. La lipoj tute simetriaj, nur palaj. Hm, tamen li estas plaĉinda, sed mi lin sincere ne amas. Krom tio, li amas mian amikinojn Natalia. Feliĉa ŝi estas, ĉu mi envidu ŝin?”

La persono de Unulo baldaŭ malklariĝis en ŝia fantazio, lin elekti ŝi ne povis, ĉar li jam, laŭ ŝia opinio, apartenis al la alia.

Kelke da momentoj Ana nenion pensis kaj pudris siajn frunton kaj vizaĝon. Tiam ŝi vestis ŝtrumpojn, poste ŝuojn. Surmetante la dekstran ŝuon, Ana ek-tuŝis per la mano la fingrojn sur la piedo kaj eksentis doloron. Ĝi instigis ŝin fari mallongan komparon:

“Mian piedon ekprenis dum dancado juna franco. Li estas poeto kiel Unulo, kvankam pli interesa persono. Krome li estas, laŭdire, riĉa. Miroir nepre estas riĉa, ĉar nur la riĉulo riskas tiel longan ekskurson pro unu romano, kiun li eble ne skribos. La vojaĝo kostas sufiĉe multe. Krom tio, Miroir konas bone Esperanton, en kiu li parolis hodiaŭ al mi pri

sia verko “Ama revado.” Siatempe mi ĝin avide legis. La poeto ankaŭ interese parolas pri diversaj aferoj! Kontraŭe, Unulo ofte babilas nekompreneblaĵojn. Pri kio kun li parolas Natalia? Neeble estas klarigi. Se ili ofte estas kune, ŝajnas nenio stranga por junaj geamantoj, sed Natalia asertas, ke ŝi lin ne amas, aŭ pli bone, ke ŝi ne estas lia amatino. Ĉu tio estas vero? Tamen, interese estus scii, pri kio ili parolas. Tute egale, kial supozi? Eble mi povus eĉ envii? Por nun lasu mi ĝin, tamen de la unua renkonto jam plaĉis al mi Miroir, kiu estas eĉ pli simpatia ol Unulo. Unulo estu al Natalia kaj, se mi lin eĉ amas, volonte mi lin oferas.”

Ana certe meditus ankoraŭ iom da tempo pri sia ofero, se la frapado sur la pordon ŝin ne ekĝenus. Tra la pordo eniris Natalia, eĉ ne atendente la permeson. Ana ĵus vestis la ŝuojn kaj rapide leviĝis de sur seĝo.

Surprize rigardante al Ana, kiu iris al ŝi renkonten, Natalia haltis. Ana rimarkis ŝian surprizon, sed ŝi ne sciis, kion Natalia admiras.

“Ana, neniam mi vin vidis tiom bela,” parolis Natalia. Soprano ŝia agrable impresis, dum ŝi daŭrigis: “Se mi estus viro, senpripense mi edziĝus al vi. Permesu, ke mi vin kisu.”

Ana volonte permesis pro la moro. Natalia rigardis ŝian vizaĝon kaj iom poste diris kun riproĉema voĉo:

“Estas domaĝe pudri la vizaĝon. Ĉu vi devas ĝin fari, malgrandulino mia?”

“Ĉu vi ne pudras vian vizaĝon?” konfide demandis Ana.

“Al kiu mi plaĉas, certe mi plaĉas, kia mi estas. Kial mi plibeligu mian vizaĝon? Ĝi estus por mi pli

bela, se ĝi eĉ estus nigra, nur ke ĝi estu natura, mia kara. Pli bele estus, se oni per simplaj rimedoj povus plibeligi la animojn de la homoj! Dio scias, ĉu tiaj maskoj allogus la aliajn pli ol la maskoj sur virinaj vizaĝoj.”

“Do, la vizaĝo povus eĉ esti, ĉu ne, tiel nature nigra kiel de la poeto Unulo kaj vi ĝin ankaŭ konsideras bela?” ŝi ruze ridetante demandis.

“Mi divenas la signifon de viaj vortoj. Ĉu vi ankaŭ tiel parolas pri mi? Nenion vi scias, ĉar nur pro malbona informiĝo oni povas tiel paroli. Vi egalas al ĉiuj aliaj, tion mi ĝis nun ne kredis. Ĉiutage mi dekovras iom de via masketo, karulino. Estu nur pli singardema, ĉar malbone starigita demando tuj montras la tendencon de la demandinto,” parolis Natalia ridetante.

“Ne, ne Nanjo, vi eraras, mi nur ŝercis. Nun mi estos pli sincera kaj diros al vi, ke vi amas lin, li amas vin kaj ambaŭ ne volas konfesi vian amon. Simpla afero ĝi estas, kial vi ĝin kaŝas? Unulo estas por vi konforma homo, vi do neniel devus honti pro tiu edzeco. Demetu vi fine vian masketon kaj sincere konfesu ĉion al la amikino.”

“Ana, via supozo ne estas vera. Ĉu ni devus kvaŝaŭ infanoj kaŝi tiajn aferojn? Kial fari tiajn sensencaĵojn, ni ja estas de neniuj dependaj homoj,” diris Natalia iom kolere.

Ana ridetis, kredante ke nun tamen klariĝos la tuta afero, kiu kiel enigmo jam dum monatoj turmentas scivolemajn fraulinojn en la societo. Tial ŝi obstine daŭrigis:

“Tre bona preteksto. Klarigu al mi, kiel vi povis iri kun li tra densa arbaro, se vi lin ne amas? Vere, li

estas bona kaj bela, sed ĉu li estas honesta, ĉu li vin ne kisis, aŭ almenaŭ provis kisi?"

"Strangaĵo. Mi malofte aŭdas paroli similaĵojn. Vi pli rapida ol ĉiuj aliaj estas, jam pri la kisoj vi parolas. Ankaŭ por vi li ŝajnas bela, tial vi certe min envias. Kio koncernas lian honestecon, ĝi egalas al tiu de Memo, almenaŭ en tio, kio koncernas la virinojn, tial li ankaŭ ne tiel rapide enamigas. Eble li min ŝatas, eble mi plaĉas al li, ĉar mi ne ŝatas komplimentojn flanke de viroj, dezirante ĉiam direktan esprimon de ĉiuj deziroj sen ia enkonduko, kio ne signifas, ke li min tial amas, kvankam li tion tre ŝatas. Kaj tio ĉi estas la unika afero, pri kiu ni samopinias; ĝi do ne povas esti nomata amo, por kiu estas bezonaj pli grandaj simpatioj ambaŭflankaj. Krome, ni tre diferencas laŭ niaj animaj ecoj.

Unulo estas la homo pensema, plena de iuj strangaj sentoj, al mi ofte nekompreneblaj, kaj se li pri tiu sento, pri kiu mi nun parolos, ne klarigus ĉion buŝe, mi ĝin neniam komprenus. Nome, survoje li kelke da minutoj haltis ĉe la akvofaloj, kaj eĉ ne rigardante ilian faladon li staris sur la rando de la abismo. Li ne movis sin kelke da minutoj, tial mi malpacientiĝis. Pli atente lin observante, mi rimarkis, ke liaj okuloj estas fermitaj, kio ŝajnis al mi stranga. Tamen, ĝeni mi lin ne volis. Farinte sian al mi nekompreneblan devon, li turnis sin al mi kaj mi lin riproĉis, ke li tiom longe staris kun fermitaj okuloj, eĉ ne rigardante akvofalon, kvazaŭ infano dormema. Li strange min rigardis, kun vizaĝo serena, nenion parolante, nek respondante. Ekestis mallonga silento, tia majesta silento, kia regas nur la regionojn, en kiuj la naturo kaj ĝiaj belecoj respeguliĝas en homa animo. Oni sentas dum tiaj momentoj la diecon en la ani-

mo kaj la animo respiras la grandecon de la naturo. Dum unu tia momento la unuan fojon en mia vivo aŭdiĝis tiom milde liaj vortoj kiel la respondo al mia riproĉo. Ĉu vi povus imagi, kiel ili laŭtis?”

“Li certe diris, ke lin feliĉigas via apudesto, pro kio li revis, aldonante kelkajn frazojn pri prefera eterna restado apud vi.”

“Mi nepre devas ridi pri vi, Ana. Nur vi povas tiel imagi lian respondon, ĉar en via cerbo bolas la deziroj pri la esprimoj de amo, kiujn vi ofte emus aŭskulti de la viroj. Se vi ilin ne aŭdas de iu fraŭlo, tiam vi ilin mem kreas, almenaŭ por la aliaj.”

“Li diris verŝajne ion similan.”

“Eble. Li diris jenon: ‘Ekzistas unu leĝo en homa animo, ĝia nomo estas la sento. Ĝi ordonas al mi eldiri la dankan preĝon al la patrino naturo, ĉar prezentiĝis la okazo eksenti ĝian belecon en la animo.’ Lia mieno tiam montris tian gajecon, pro kiu mi kredis lin feliĉulo, sentanta tian feliĉon en la animo, kia estas donacita nur al malmultaj elektitoj. Kaj li, efektive li estas la elektito, ĉar la naturo lin dorlotis, donacinte al li poetajn sentojn. Kontraŭ li ni ambaŭ signifas nenion.”

Ana kapklinis. Ŝia rigardo estis mallevita. Ŝi hontis, ne volante rigardi Natalion direkte en la okulojn, kvazaŭ sentanta sin la ofendinto de ŝiaj sentoj, de sentoj de la amikino.

“Ĉu oni ne ofendas ankaŭ miajn sentojn, ekzemple vi, Natalia, kiam vi parolas pri mia simpatiulo, kiu estas via amanto?” pensis la knabino kaj daŭrigis laŭte: “Natalia, mi ne kredis, ke li povus tiel paroli. Sed pardonu, ĉu vi neniam lin amis? Estu sincera kaj



forigu per tio miajn dezirojn je li. Tiam mi scios, ke li jam estas amata.”

“Ni ne parolu pri ĉi tiu afero, vi ĝin nebone komprenus. Ankaŭ vi estas revema, tial la ripeto de liaj vortoj impresis vin. Ni parolos pri tio ĉi dum momentoj de pli granda dispono. Mi jam konjektas, ion vi kaŝas en via animo, viaj vortoj tiom malgaje sonas, sed li elektu, ne ni. Vi estas bele vestita, kvankam vi devus ankaŭ vesti la blankan bluzon, por ke la tuta vestaĵo estu samkolora. Lasu ĝin nun, ni devas rapidi. Vere, ion mi konfesu, nome la franco multe interesiĝas pri vi. Li esprimis al Unulo tre flatemajn frazojn pri via beleco tiom lerte, kiel ilin povas esprimi nur unu franco,” vikle daŭrigis Natalia.

“Ĉu vere? Kion opinias Unulo pri li?” tute naive ekdemandis Ana, kvazaŭ estus por ŝi grava la opinio de nedestinita amato.

“Unulo? Ĉu li estas por vi kompetenta? Li diris preskaŭ nenion, kaj eĉ tion mi ne povas rakonti al vi. Iru ni.”

Ana sekvis ŝin. La interesiĝo de Miroir tamen impresis ŝin kaj ŝi denove meditis pri li. Meditante pri li, tamen ŝi ne povis forgesi, ke ŝia ruzeco malvenkis. Natalia estis pli ruza, ŝi evitis direktajn respondojn al sufiĉe mallertaj demandoj kaj eĉ sciigis pri unu sekreteto de Ana, kiu amis Unulon.

### III

La ĉielon ŝajne tuŝantaj pintoj de Alpoj sentas la kisojn de sunaj radioj, kiuj anoncas la finiĝon de la tago. Dezertaj altaĵoj de la montaro aspektas kiel la nubojn tuŝantaj fantomoj. La ŝtonoj, blankaj kalkoŝtonoj, ŝajnas dum tagmortado belaj, sed la altaĵoj

estas senarbaj, pro kio ili ne allogas la okulojn. Pli malsupre, apud la lago, estas densa verdaĵo. La lago rebrilas kiel perloj, lumigataj de la radioj de la suno. La blueta supraĵo de la lago avide glutas la radiojn. Ĝi ondigas kaj sur ĝiaj ondetoj rebrilas la lastaj kisoj de la kuprobila, ruĝa suno, sub kies influo estiĝas la vivoj. Tiu suno iom post iom malaperos kaj morgaŭ denove salutos tiun ĉi belegan ĉirkaŭaĵon.

Ĉirkaŭ la lago kun arbitaĵoj elkreskis ankaŭ pinoj kaj abioj, tra kies verdaĵo oni vidas ruĝajn tegmentojn de kelkaj domoj.

En la lago estas malgranda insulo, tute ornamita per la verdaĵo. Sur la insulo oni konstruis preĝejon, kiu estas bone konata pro sia malgranda sonorilo, kies sonorado ofte aŭdiĝas. Ankaŭ nun dum sunsubirado ĝi sonoras. La sonoj flugas super la tuta ĉirkaŭaĵo kaj ŝajnigas al homoj tiun ĉi regionon mistera. La sorĉa parto de la lando posedas krom sia beleo ankaŭ la preĝejon kun tiel nomata mirakloplena sonorilo. Ĝia sonorado en la animojn de ĉiuj kredemuloj enĝermigas la timon kaj la piecon, strangajn sentojn, dum dekjaraj transdonataj de homo al homo, pro kio la sonorilo fariĝis mistika, Sub ĝia influo ĉiujare venas ĉi tien la homoj, kiujn allogas la rakontado de la aliaj pri plenumitaj deziroj.

Akompanate de tiu ĉi sonorado kaj suna subiro, la societo marŝas en la valon al la lago. Flirtas klara lingvo, tremetanta tra la aero kun la sonoj de la malgranda sonorilo. Kelkaj homoj preterpasas la aron da ekskursanoj; iuj haltas, aŭdas du-tri vortojn de la lingvo belsona, por ili nekomprenebla, kaj daŭrigas siajn vojojn. Kelkaj el ili tre bone rimarkas verdan flagon kaj sur ĝi la steleton, sekvatan de

sennombraj miloj da homoj, esperantaj kaj kreantaj la novan epokon en la vivo de la homaro. Ĉar la stelo estas la simbolo de amo kaj paco, sub la standardo, kiun ĝi ornamas, regas ankaŭ la korojn de la ekskursanoj festaj dispoŝoj kaj ameco. El iliaj buŝoj aŭdiĝas karesaj vortoj; el ĉiu vorto spiras la inspiro de la amo, en ĉiu vorto estas kaŝitaj sorĉa muziko, majesta kanto, superpotenca sento kaj anĝela voĉo, anoncantaj al la homaro la novan epokon, la glorifikon de anima nobleco kaj eterna amo. Ili semas la noblecon, al malmultaj donacitan; la amon, kiu estas en ĉies koro kaŝita, nur ankoraŭ ne vekita.

Malantaŭ aliaj malrapide marŝas Unulo, Miroir kaj Ana. Miroir vigle diskutas kun Unulo.

“Permesu paroli al mi. Ne indas esti nervoza, se ni havas malsaman opinion pri la poezio,” parolis Unulo al Miroir.

“Mi estas trankvila, nur mi ne ŝatas la verkadon de poemoj, kiuj ne estas estetikaj,” respondis Miroir.

“Estetiko. Ĝuste ĝi, kiu por mi en la poemoj ne ekzistas. Ankaŭ vi ĝin misuzas. En viaj poemoj pri-skribitaj emocioj ne estas estetikaj!”

“Se la tuta mondo ne konfesus la estetikon en la poemoj, la poetoj devus ĝin prediki.”

“Diru ni, ke vi estas prava, sed mi opinias, ke la poetoj devus esti instruantoj. Kial skribaĉi surpape-re malesperajn vortojn, plori je iom da varmece en homa koro? Ĉu ne estus pli bone moki la malbonajn ecojn kaj doni al la aliaj instruon? Fine, ni vivas en moderna tempo kaj devas al niaj poemoj doni iom da tiu modernismo kaj dinamiko. Por mi ĉiu minuto estas kara, tial mi ne volas plorante pasigi miajn vivohorojn.”

“Vi ne estas prava. Mi enuas dum tre longaj tagoj kaj vivas ankaŭ en la memoroj, jen belaj, jen malbelaj; mi esprimas la belecon pervorte pli detale ol la aliaj homoj, pro kio mi estas verkisto. Miaopinie oni devus skribi kiom eble plej longajn romanojn, kun multaj vortoj kaj diversaj okazintaĵoj. Oni devas amuzi la homojn kaj ili pasigu la tempon legante kiel eble plej multe, por ke ili almenaŭ tiamaniere amuziĝu kaj eluzu la longecon de la tagoj,” respondis Miroir.

“Tre bone. La vivo tamen konsistas el pura batalo, pri ĝi oni devus instrui la homojn. Honeste ili batalu. Por mi la tagoj ne estas longaj. Kelkafoje eĉ ĉiu sekundo estas kara. La longeco de la tagoj estas nur imaga afero, ĝi konvenas al neniofaristoj, ĉar la laboruloj ĝin entute ne sentas; aliaj zorgoj ilin turmentas en pura vivobatalo, kiu al ili ne permesas eĉ trankvilan manĝadon. Kion signifas unu tago en la universo? Ĉu iu memoros, ke en la dudeka jarcento vivis dum unu longa vespero, diru ni, Armando Miroir, ne scianta, kion fari, pro kio li skribis longajn romanojn? Mi opinias, ke pri tio jam post kelke da jaroj neniu memoros. Hodiaŭ la homoj deziras post kelke da jaroj kiel eble plej koncizan enhavon. Oni vivas rapide. Ne plu oni zorgas pri longaj, dolĉaj vortoj de poetoj kaj pri centfoje prikantata banala amo, priskribata per kerne sensencaj vortoj de rimoj. La rimaĵojn ni evitu, en ili ofte estas sensencaĵoj de logika vidpunkto. Analizu ni por ekzemplo vian poemon ‘Paradizon teran vidis’. Kion ĝi enhavas? Nur la deziron delogi la virinon. Tiaj aspektas la poemoj de multaj hodiaŭaj poetoj, pri kiuj diris tre bonan kaj trafan opinion mia amiko, kiu skribis:

*“Hodiaŭ mi karesis la piedon de unu virino  
Tra silka ŝtrumpo,  
Eksentante la belecon de tuta mia poezio.”*

“Jen estas la portreto. Ĉu oni povus deziri ion pli?” daŭrigis pli vigle Unulo. “Ĉu oni devas en la fripono serĉi noblan senton, se evidentigaŝ la malnobleco? Ni devas esti absolutistoj kaj prijuĝi la homon tiel, kia li ĝenerale estas. Komprenoble, laŭ via opinio oni povus trovi absolutan belecon en piedoj de iu virino, se eĉ ŝia tuta korpo estas malbela, ĉar vi ĝin en viaj poemoj tute ne volis priskribi. Fine, tia poeto povus eĉ genuiĝi pro beleco de ŝiaj piedoj k.t.p.”

“Vi ne komprenis vian amikon. Tamen estas bela afero, se la homo surgenuiĝas antaŭ la virino, konfesante al ŝi tian amon, kiu eĉ humiligas kaj igas lin karesi ŝian piedon. Ĉu vi en tio ĉi ne vidas la grandecon de la poeto? Ĉu tio ĉi ne estas estetiko?”

“Estetiko. Bela estetiko. Ĝia loko ne estas tie ĉi. Sincere dirite, pro kio vi karesas ŝian piedon? Ĉu vi eble volas pruvi, ke vi estas ŝia servisto? Tute ne, via intenco estas iom alia. Dum vi karesas ŝin, viaj okuloj flamas, en ili ĝermas pura egoismo, nura deziro posedi la virinon. Ĝi estas ruza, mia sinjoro. Ne nur ruza, tial ke vi volas trompi per ĝi senteman estaĵon, kiu kredas kaj konfidas al vi, sed ankaŭ ruza tial, ĉar vi tian priskribon nomas estetika, dum via celo estas altrudi al la aliaj la saman deziron, doni eble al knaboj instruon pri la ruzeco en la nomo de la estetiko. Mi abomenas tian poezion. Tia estetiko ne estas plu estetiko, ĝi estas per poetaj vortoj lerte priskribita pornografajo.”

“Tro severe,” rompis lian parolon Miroir. “Ne estas nur la virinoj prikanteblaj. Oni povas glorifiki ankaŭ ion alian.”

“Mi scias, oni ne devas nur la virinon prikanti, sed mi tamen estas kontraŭulo de rimaĵoj pro ilia sensenco, trovebla en multegaj poemoj. Mi vin volas informi pri kelkaj sensencaĵoj, faritaj pro rimaĵoj en unu via poemo. Tie, se mi bone rememoros, troviĝas la rimaĵoj: doloro, koro, memoro, sufloro, volo, ploro, horo, koloro, kovri, dekovri k.t.p. El ili vi faris poemon, kiun la mondo siatempe ŝatis, nome, almenaŭ ĝi estis kantata en la amuzejoj.

*“Bela mia koro  
En vi la doloro  
Pro bela memoro.  
Ho, vi la sufloro  
De virina volo:  
La ruĝa koloro  
Dum matena horo  
Pro senĉesa ploro  
La okulojn kovris,  
Sekreton dekovris.”*

Al tio ĉi ni aldonu rimaĵojn, konsistantaj el verboj flui kaj ĝui. Jen estas la refreno:

*“El okuloj fluis larmoj  
Kaj mi ĝuis pro la ĉarmoj.”*

Jen, tion ĉi oni kantis, ĉar iu trovis por sensencaĵo belan melodion. Kiel kanto la versaĵo povus plaĉi de melodia vidpunkto kaj kiel poemo ĝi nenion, krom sensencaĵo, enhavas.”

“Johano, mi vin petas, ĉesu!” interrompis lian parolon Natalia. “La inĝeniero haltis, certe li nin atendas. Li ridos kaj babilos eble pri via malpacigiĝo, se

vi tiel daŭrigos. Ne kredu al Johano, sinjoro Miroir, siatempe li same tiel skribis.”

“Bone, bone, al li mi pardonas,” ridetis Miroir. “La diritan poemon iu notis, kiam mi ebria kuŝis sub unu tablo kaj faris la rimaĵojn.”

Miroir ankoraŭ diskutadis kun Unulo, dum vespera krepusko trenis sin en la valo kaj la societo enboatiĝadis. Altaĵoj de la montoj malheliĝis. Enĉiele, ie en nemezurebla malproksimo, aperis steloj, komence neklaraj, sed poste ili klariĝis. La tuta ĉirkaŭaĵo odoris je freŝeco, pro facile blovanta vento, portanta la odoron de pinarboj.

Gesocietanoj enboatiĝis en du boatojn, formante du grupojn.

Memo sidas kun juna sinjorino en pli granda boato. Apud li estas Armando Miroir kaj Ana. Johano Unulo estas kun kelkaj gejunuloj en pli malgranda boato. Baldaŭ ekremis fortaj remistoj kaj la boatoj glitis al la mezo de la lago.

En la orienta ĉielo aperis sanga lumo, kvazaŭ la purpura suno dum leviĝo, kaj magia luno montriĝis. El ĉiela bluaĵo la radioj de la luno lumigas la lagon. La planedo ŝajnas gaja vizaĝo de maljunulo, ride-tanta al la malgaja tero. De proksime ĝi estas simpla globo rebrilanta pro sunaj radioj.

Ana trankvile sidis apud la poeto Miroir, dum la boatoj malproksimiĝis unu de la alia. Post mallonga tempo ekfirtis ĉarmega kantado:

*“Rivermezen, de insulo  
Sur vastaĵon de l’ ondar’,  
Jen elnaĝas la belulo  
Stenjka Razina ŝipar’.”*

La voĉo tremetis super la lago. La unua strofo estis kantata per dolore tremanta voĉo. Kun doloriga komenco de la dua, en animo de Ana ekĝermis la doloro. Ankaŭ la remistoj demetis por momento la remilojn kaj eksilentis, por ke ili pli bone aŭdu ĉarman kanton, kiu daŭriĝis:

*“En la gvidboato tenas  
Razin manon de princin’  
Novedziĝon li nun festas  
Kaj ebrio regas lin.”*

“Novedziĝon?” demandis Ana sin mem. “Kial la kanto ĝuste tiel laŭtas?”

En la radioj de la luno oni vidis, ke ŝiaj okuloj demande rigardas al tiuj de Miroir. Li iomete konfuziĝis kaj por forgesigi sian konfuzon demandis ŝin:

“Fraŭlino Ana, kiu kantas tiel bele en silento sur la lago?”

“Ĉu vi ne scias? Ŝi, malgranda Natalia, en la alia boato. Mia, aŭ korekte, nia Nanjo.”

Ŝia voĉo sonis malgaje.

“La fiera balkananino,” diris Miroir. “Belega kanto, mola kaj dolora melodio, sed ni aŭskultu:”

*“Volga, Volga, panjo mia,  
Volga, rusa vi river’  
Vin regalis per nenio  
La kozak’ el Dona ter’.”*

“Agrablaj sonoj. Tiel povas kanti nur mildanima kreito,” parolis Miroir al Ana, kiu ne respondis, kvaŭ lia demando ŝin ne koncernus.



“Mildanima kaj feliĉa, diru tiel sinjoro Miroir,” rapide respondis Memo anstataŭ ŝi.

“Vi opinias ŝin feliĉa? Tial vi ankaŭ scias la kaŭzon de ŝia feliĉo, ĉu ne?” demandis Miroir.

“Grava afero, se mi ĝin scius.”

“Al mi ĝi ŝajnas sufiĉe grava. La lilio sentas feliĉon sub kiso de roso, vi sentas la feliĉon mokante al virinoj, sinjoro Duulo sentas la feliĉon pentrante, pro kio li verŝajne restis en la hotelo k.t.p., sed ŝi?”

“Pri la feliĉo de lilioj oni eĉ povus dubi, sed certe ŝi ĝin sentas, ĉar ŝi sidas apud via genia konkuranto Unulo. Ĉu ne Ana, vi tion ĉi scias pli bone ol mi, vi estas ŝia amikino?” demandis Memo.

“Esti amikino al iu ajn ne signifas babili pri sekretoj de sia amikino, sinjoro inĝeniero. Eble ŝi estas feliĉa, ĉar en via societo ŝi ne troviĝas? Jen, ni jam alvenis al la insulo, ĉu ni sonorigos?”

“Laŭvole,” respondis la inĝeniero. Li estis ofendita kaj turnis sin al Julinjo, plendante pri hodiaŭa junularo, ĉar ĝi ne scias respondi krom per krudaj vortoj.

“Mi aŭdis, sed la pereco de l’ mondo pro tio ne okazos! Via demando estis esprimita en maloportuna momento kaj mi povas al vi konsili unu alian fojon esti pli prudenta. Vi povas interesiĝi pri sekretoj de iu ajn persono ĉe ties amikino, certe vi pri ili aŭdos, nur ne demandu publike. Malbone vi konas la virinojn, tial vi ankaŭ ekkoleris. Ŝi respondis tre bone, konforme al via demando,” respondis Julinjo.

Memo ankoraŭ grumblis, dum gesocietanoj elboatiĝis. En malproksimo estis kantataj la lastaj versoj:

*“Ĝoja kanto tuj aŭdiĝu.  
Pro memor’ de l’ belulin’.”*

Post la lasta verso la lagon ekregis silento. La ĉielo estis plena de brilaj steloj, tremetantaj en la universo. Meze de l’insulo, inter densa verdaĵo, kun sia malalta turo kaj ruĝa tegmento la preĝejo aspektas kiel ensorĉita palaco. Sur la vojo paŝantaj homoj ŝajnas esti ombroj, enirantaj en la palacon.

El niaj konatoj vizitis la preĝejon ĉiuj krom Memo. Li restis ekstere kaj post kelkaj momentoj sidiĝis sur la ŝtuparon apud la lago. Du remistoj staris en la boato kaj interparolis. Malmulte li komprenis la interparoladon, ĉar ili uzis dialekton nesufiĉe konatan al li. Trankvile li sidis kelke da momentoj, pensante pri diversaj bagatelaĵoj. Iom poste lin ekĝenis la sonorilo per sia monotone sonanta: tam, tim, tam. . .

“Tu sonorigas,” pensis Memo. “La homoj estas strangaj. Ĉiutage, de mateno ĝis vespero, aŭdiĝas la sonorilkantado. Superstiĉa legendo multe influas la homojn. Oni devas, laŭdire, sonorigi kaj ion esprimi, la deziro nepre efektiviĝos. Kia sensencaĵo. Per aliaj vortoj: Vi nur sonorigu kaj ekdeziru, jen la aŭtomobilo kun rapideco de kvincent kilometroj. Nur tiam diablo direktu ĝin.”

Memo meditis apud la lago ankoraŭ pri tiu ĉi afero kaj pri ĝia senco. Poste en lia cerbo estiĝis pli strangaj pensoj kaj lin ekregis multaj deziroj, tute malpiaj. Kompreneble, li ne sciis, ke ĵus sonorigis sinjorino Julinjo kaj okaze samtempe la sama deziro ekĝermis en liaj pensoj. Post la esprimo de la deziro ŝi faris signon de kruco kaj transdonis la ŝnuregon al Miroir. Ŝin ne ĝenis, ke tia deziro neniel korespondas al piaj religiaj sentoj kaj eldiris ĝin tute senĝene.

Poste ŝi rapide alvenis al Memo, rakontante al li, kia maniere oni devas esprimi la dezirojn. Ŝi ankaŭ menciis, ke ŝi kredas, ke la deziro, esprimita per varma preĝo, ĉiel plenumiĝos.

“Mi aŭdis jam pri la maniero de esprimado de deziroj kaj vi ja kredas tiajn sensencaĵojn.” li mokis ŝin, rigardante la sinjorinon per la okuloj brilaj pro gajeco.

“Eble dum hodiaŭa vespero mi travivos la deziratan akcidenton kaj scios, ĉu ĝi estas sensencaĵo,” ŝi diris petole kaj iom poste al si mem ekflustris: ‘Se ĝi sukcesos, ĉu ĝi tamen ne estos sensencaĵo?’

Baldaŭ alvenis la aliaj partoprenantoj de sonorigado, krom Miroir kaj Ana. Iom da tempo ili forrestis. Per siaj nedireble belaj, bluaj okuloj, Ana rigardis la brilan ĉielon, malrapide paŝante kun Miroir, kiu ŝtelkaŝe observis ŝian vizaĝon, kiom ĝi estis en lunradioj videbla. Lian feliĉan rideton Ana ne rimarkis, ŝi pensis nur pri sia deziro, revante pri ĝia plenumiĝo, kiam li reveme ekdemandis:

“Ĉu vi kredas la efektiviĝon de deziroj?” kaj per flamantaj okuloj, en kiuj streĉiĝis ĉiuj vejnetoj, rigardis ŝin.

Ŝi ne respondis.

“Kion vi deziris?” li persistis ne movante sin de sur la sama loko.

“Neniam mia deziro efektiviĝos. Krome, vi tro multe postulas per via demando,” ŝi tamen respondis per ŝanceliĝanta voĉo kaj faris kelkajn paŝojn.

“Fraŭlino Ana, se via deziro estas samtempe la mia, kio okazos?” li petegis.

“Tiam. . . mi ne scias. Eble ne okazos tiel, kvankam mi kredas, ke tiu ĉi nokto estos por unu el ni malagrabla, kara sinjoro.”

“Ĉu vi scias mian deziron?” li demandis, kaptinte ŝian manon.

“Ne, sinjoro Miroir, mi ĝin ne scias, efektive ne scias. Eble ni komprenus nin pli bone, se ni povus ankoraŭ iom da tempo paroli pri tio. Bedaŭrinde, ni jam estas ĉe la ŝtuparo kaj ni devas eksenti ereton da doloro pro la deziroj, kiuj nur malfacile realiĝos, kvankam ili estas realiĝendaj, se mi ne eraras,” ŝi malgaje aldonis.

“Realiĝendaj, realiĝendaj, mi amas,” ŝi poste kelkfoje ekflustris dum la reveturado, ravita de belega, steloplena nokto.

Veninte al la bordo, la societanoj elboatiĝis. Ilin atendis la veturintoj de la alia boato, kiuj ne iris en la preĝejeton kaj tial pli rapide revenis. Nur mankis Unulo kaj Natalia. Memo vane serĉis ilin per siaj okuloj kaj, kiam denove aŭdiĝis la sonorilo, al li estis klara, ke Unulo kaj Natalia forveturis la insulon.

Dum malrapide marŝis la societo, akompanate de sonorado kaj steltremeto, Memo eksciis el interparoladoj de la aliaj, ke Unulo luis malgrandan boaton kaj sen remisto forveturis kun Natalia. Kelkaj komentariis tian konduton.

Oni aŭdis la sonorilon ankoraŭ du, tri fojojn, kaj en la valo ekregis silento. Ĉio estis trankvila, aŭdiĝis nenio krom kantado de griloj dum agrabla somervespero.

\* \* \*

Dum la majesta silento eliris Unulo kaj Natalia el la preĝejo.

“Johano, tie ĉi estas agrable,” diris ŝi, daŭrigante la paroladon.

“Sub ĉiela bluaĵo vagas du geamikoj. Rigardu Natalia, la ĉielo ŝajne ridetas, ĉu ne, vi vidas ĝin? Certe ne respoguliĝas ĝia rideto en via animo, ĉar viaj vortoj malgaje sonas. Mi komprenas la rideton de la ĉielo, ĉar nun mi ĝin sentas en la animo. La bela ĉielo. Kiom da fojoj mi verŝis la larmojn sur la tombejo tute sola, dezirante la reviviĝon de ŝi. Pensante pri tio, malgaji mi povus, se mian animon ne regus tute aliaj pensoj, kredu min Nanjo. Pro tiuj pensoj mi sentas la rideton de la ĉielo. Mi estas sur la vojo al forgeso pri la tombejo.”

“Ĉu vi esprimis unu deziron?”

“Multajn mi povus esprimi, se mi kredus. Kaj vi?”

“Mi deziris mian feliĉon,” respondis ŝi.

“Ankaŭ mi la samon por vi ekdeziris. Kompreneble estas, ke ankaŭ sen tio vi la feliĉon ĝuos, ĉar vi estas ankoraŭ juna kaj havas sufiĉe da tempo por florumo vian vojon en la vivo. Nu, bona vi ankaŭ estas, vi ne postulis milionojn. Nur, ĉu diri, ke vi estas egoistino, vi nur pri vi pensis, nur vi deziris. Se la deziroj plenumiĝas, vi ĝuos duoblan feliĉon, ĉar mi subtenis viajn dezirojn per la miaj. Vere, ridinda estas tiu formala esprimado de la deziroj, tiu tradicio, sed mi estas konvinkita, ke vi certe ne kredas, ke la deziroj plenumiĝas helpe de la sonorilo. Ĉu vere?”

“Mi ne kredas mian feliĉon,” diris Natalia. “Verŝajne estos al mi baldaŭ malagrade restadi proksime

de vi. Ni devos iri tute malsamajn vojojn, ĉar la deziroj je io neniam efektivebla turmentas min. Se oni ĉiam klopodas konfesi sian amon al iu per ĉiu ekmo-vo, ekrigardo k.t.p. kaj tiu ne komprenas, kredu, ĝi estas dolora. En tiu okazo estas pli bone disiĝi.”

“Strange, ĉu vi estas certa pri malkompreno?” li demandis, sidiĝinte en la boateto kaj iom poste daŭrigis: “Ĉu vi deziras, ke ni ankoraŭ veturu aŭ ni iru al la bordo?”

“Veturigu min ankoraŭ,” petis Natalia kaj la boateto ekglitis sur la ondiĝanta lago.

En majesta nokto aŭdiĝis ĉarmega kaj pie sonanta kantado:

*“Sur la lago sub Triglavo. . .”*

“Ŝi dankas Dion,” diris Unulo mallaŭte kaj ĝuis bellegan kantadon. Ravita per ĝi, li ĉesis remi.

Ili ĝuis sub la steloplena ĉielo kaj Unulo poste longe ne ekremis, ĉar ŝi daŭrigis kanti kaj li deziris ŝin aŭskulti. Ŝia voĉo estas bela, raviga, la melodioj, kiujn ŝi kantas, tuŝas la koron.

Jen la nokto por poeta koro de Unulo kaj time-maj sentoj de malgranda Natalia. Ĝi ŝajnis kiel bela didonaco, kiu forgesigas la suferojn kaj ĉiujn bagate-laĵojn de la vivo. Al ili ambaŭ ĝi kreis la novan mondon, almenaŭ por momento, kaj ili forgesis ĉiujn prozaĵojn.

\* \* \*

Dum ili ĝuas la aeron freŝan kaj agrablan, en la manĝejo, en malbonodora atmosfero, ĉe unu tablo sidas

la pentristo Duulo. Li parolas kun iu beleta fraŭlino. Preskaŭ la tuta societo vespermanĝis kaj iuj viroj trinkas dolĉan vinon. Apud unu al Duulo proksima tablo sidas la inĝeniero kun la poeto Miroir. La franco Anan ameme rigardas. Ŝi sidas kontraŭ li, apud sinjorino Julinjo.

Miroir ĉi-vespere estas tre silentema, kia li kutime ne estis, ĉar ĉiam kutimis li en la societoj amuzi la aliajn.

Ankaŭ kelkaj societanoj senvorte sidas, aŭskultante la muzikon, kvazaŭ ili estus sub ĝia influo. Nur nian inĝenieron ne ĝenis la muzikistoj, nek ilia ĉarmiga ludado, ĉar li tre ofte verŝis vinon en la glason. Sinjorino Julinjo rimarkis, ke liaj okuloj ekbrilas per ia stranga ekbrilo dum eltrinkado de glasoj da vino.

La tonoj de la muziko regas la halon. Sentimentalaj agordoj ekregis la animojn de multaj gastoj. Ili ankaŭ influis la poeton Miroiron, kaj lia vizaĝo, kvankam tre serioza, ŝajnis momente ploranta. En sia interno li sentis, ke Ana meditas pri iu malproksima, amata persono, ĉar ŝi apenaŭ post kelkaj momentoj respondis liajn demandojn, kvazaŭ ĵus vekiginta.

Post finiĝo de ludado nur Miroir ne aplaŭdis, dum lia apudsidanto Memo la lasta ĉesis. Pro aplaŭdado li verŝajne laciĝis, ĉar li denove eltrinkis sian glason ĝisfunde, ekkraketis per lango kaj denove plenigis la glason. Pro tio Julinjo riproĉetis al li, nominte lin profesia drinkulo, kiu vetis fortrinki la tutan provizon da vino el la kelo. Admoninte lin, ke Miroir sidas apude, kaj li eĉ ne zorgas pri la poeto, nek donas al li iom da sia vino, ŝi instigis lin paroli:

“Mi simple konfesas la eldiron: ‘Kio estas sur la

tablo, ĝi estas proponata'. Do, sinjoro Miroir povus mem servi al si. Ĉar," daŭrigis Memo iom pli rapide, "se li ne volas trinki, estus mia devo plenigi lian glason. Sed, ankaŭ mi ŝatas la duan eldiron, kiu laŭtas: 'Ne verŝu akvon en la maron', aŭ per aliaj vortoj 'Ne verŝu vinon en plenan glason,' tial mi ne povas proponi al li iom da mia vino. Se lia glaso ne estus plena, volonte mi farus tion ĉi. Cetere, vivu sinjoro Miroir."

Miroir aŭdis nur la lastajn vortojn de Memo, kiu etendis sian plenan glason al lia, dirante:

"Bonvolu eltrinki la glason da vino por feliĉa sukceso de nia ideo."

Miroir preskaŭ sukcesis atingi pardonon, ke li entute ne trinkas alkoholaĵojn, sed Ana subite ekdeziris bonan sanon al li, alportinte sian glason gracie al la buŝeto kaj ameme lin rigardante, pro kio li ekridetis kaj tamen trinkis.

"Mi vidas, vi povas," diris Memo gaje, "nur vi ne lernis trinki, ne havinte bonan okazon kaj la virineton, kiu vin instigus je tio. Nun ne forgesu, ke vi estas en unu el slavaj landoj, kiujn la Sinjoro feliĉigis, laŭ konstato de italo Ferrero, per du donacoj. Certe vi scias, ke Ferrero en sia libro pri Eŭropo karakterizis bone eŭropajn popolojn, respektive rasojn, per la eldiro: 'La germanojn Dio feliĉigis per pasio je virinoj, la romanojn per emo al trinkado kaj la slavojn per ambaŭ ecoj.' Tial vi devas ĉe ni lerni trinki."

"Brave, brave," ekkriis Duulo proksimiĝante al la tablo. "Vi estas nebonigebla kompilanto. Cetere, vi fariĝis kuraĝa, ĉar hodiaŭ vi trovis amatinon en la glaso. Tamen mi estas certa, ke tiu italo diris tion pri romanoj, kion vi volis perforte altrudi al germanoj."



“Mi ne konas la verkon de tiu italo, sed laŭ via korekto la citita frazo estas sufiĉe ĝusta,” aldonis Mirroir.

“Tia ĝi estas. Stranga estas slava raso, la plej bonan ekzemplon reprezentas sinjoro Memo,” rediris Duulo.

Memo ne respondis. Duulo ne kolerigis lin per siaj vortoj, tial li ekuzis la alian manieron por almenaŭ lin denove paroligi, dirante al li, ke lia babilado estas tre interesa, pro kio estus inde ĝin daŭrigi.

“De kiam vi interesiĝas pri miaj babilaĵoj? Vi eĉ ne estis sur la lago, ĉu vi timis droni en la akvon?”

“Tie mi ne estis nur tial, ĉar mi devis ordigi mian valizon. Mi devis ankaŭ aĉeti la kolorilojn, ĉar morgaŭ frumatene mi pentros la kastelon,” respondis Duulo. “Vi nur daŭrigu amuzi nin.”

“Ĉiam vi estas okupita, kiel bona komercisto, sed kiu kredas, tiu povas savi sian animon, ĉu ne? Verŝajne, vi ne havas sencon por luna ĉarmo? Mi hodiaŭ eksentis misteran forton de la steloplena ĉielo, eble pro vino? Ĉu vere pro vino? Ne, karulo, mia, nia amiko Unulo certe ne estas ebria de akvo kaj li tamen ne venis vespermanĝi, li preferas revii sur la lago.”

“Ĉu Unulo estas sur la lago?” demandis Ana, kvankam ŝi bone sciis, ke li estas tie.

Duulo komprenis ŝian intencon. Inter fraŭlinoj de la societo estiĝis denove la interparolado pri tiu ĉi afero. Jam delonge ili deziris kondamni Unulon kaj Natalian je malmoraleco, se iufoje ili sukcesus pruvi ion konkretan. La veturado sur la lago per si mem ne estas grava kaŭzo de tiu ĉi dezirata kondamno. La kaŭzo estas pli profunda. Ili enviis Natalian, kaj,

ĉar ili enviis ŝin, tio signifas, ke ili havis la samajn dezirojn, kiuj ne povis efektiviĝi. Ĉe la viroj la sama afero havas iom alian formon. Se la viroj envias, ili ankaŭ deziras posedi la samon kiel tiuj, kiujn ili envias, dum la virinoj ne kontentiĝas nur pri tio, precipe se temas pri alia virino kaj ŝia amanto. Ilia envio signifas eĉ malamon kaj nepre kalumniadon. Tiaj estis fraŭlinoj de la societoj, nur estas la demando, ĉu iu povus riproĉi ilin, tial ke la naturo pridonacis ilin ankaŭ per tia donaco. Kiu kuraĝus riproĉi la naturon pro tiu negativa donaco? Kiu kuraĝus diri, ke ĝi estas malperfekta.

Duulo tiun ĉi aferon komprenis tre bone kaj ne miris pri ĝi. Li nur koleris je Memo, kiu per siaj vortoj kaŭzis, ke la aliaj pri Unulo kaj Natalia parolis.

Sobra Memo neniam parolus pri tiaj aferoj. Kontraŭe, nun ebria Memo denove parolis pri la sama temo. Li uzis la vortojn, kiuj decas nek al lia aĝo, nek al la profesio. Li uzis ilin senĝene, spite tion, ke ilin aŭdas fraŭlinoj, kiuj al lia parolado aldonadis kelkajn vortojn por kompletigi lian opinion.

Tiun ĉi fojon sinjorino Julinjo ne partoprenis en la kalumniado (kion ŝi deziris), ĉar Duulo parolis kun ŝi. Tial ŝi ne povis partopreni la diskuton pri Natalia kaj Unulo.

Subite Memo, ne fininte unu frazon, ekkantis. Tial ĉiuj ĉeestantoj ekridis. Estas vere komike aŭskulti ebriulojn, kiel ili ekkantas kaj plu ne zorgas pri tio, kio ĉirkaŭ ili okazas, ne havante eĉ la senton, ke inter ilia interparolado kaj subita kantado estas kontinueco. Poste ili denove ion sensencan ekbabilas, denove kantas kaj senzorge pasigas la tempon. Okazas ankaŭ, ke dum la kantado kelkaj ekdormas, ĉar

alkoholo ilin tute ekregas. Tiel okazis ankaŭ al Memo, kies ronkadon akompanis rido de ĉeestantoj, dezirantaj al li feliĉan transiron en apartan mondon de dormantoj. Lia dormado daŭris nur kelkajn minutojn. Li vekigis iom pli konscia kaj plu ne parolis. Oni donis al li nigran kafon, kiun li avide trinkis kaj post duonhoro plisobriĝis.

Dum tio Julinjo mallaŭte parolis al Ana:

“Via amikino estas la objekto de diversaj babilajoj. Kiam la aliaj gesocietanoj, kiuj nun ne estas tie ĉi, ekscios, kie ŝi nun estas, denove oni babilos kiel antaŭ kelkaj minutoj. Konsilu al ŝi eviti tiajn aferojn. Ŝi amas Unulon kaj li estas honesta. Malgraŭ tio dumnokte neniu virino devas kredi al viro. Tiuj ĉi vortoj ankaŭ ne malutilos al vi, konservu ilin bone en via memoro.”

Sub influo de ŝiaj vortoj Ana naive respondis, ke ŝi komprenus la tutan aferon, se Natalia amus Unulon. Fine ŝi aldonis, ke Natalia eble riskas sian honestecon sen ia grava kaŭzo. “Se ŝi amus lin, la afero estus tute alia,” konkludis la junulino, kiu kredis, ke la amo ĉion senkulpigas.

Julinjo ne volis korekti la opinion de la junulino kaj daŭrigis pli laŭte:

“Hodiaŭa junularo estas vere malmorala. Pro la dirita akcidento mi riproĉas Natalian des pli, ĉar ŝi estas bone edukita.”

Do, se Memo eksilentis, Julinjo devis substreki denove, ke Natalia kaj Unulo estas sur la lago. Eble ŝi poste bedaŭris, ke per tio montriĝis ŝia malbona karaktero, kvankam ni ne kredas, ke tiu ĉi virino pro principo retirus sian opinion publike.

“Ĉiu balau unue antaŭ sia pordo,” rimarkis Duulo kaj foriris el la salono kolera, ke nun la kalumnion daŭrigos Julinjo.

Pro liaj vortoj Julinjo ruĝiĝis, ĉar ili koncernis ŝin. Ŝi ekdeziris sekvi lin kaj insulti, sed tamen ŝi restis, konvinkiĝinte, ke li estas prava. Ŝi eksilentis, kvankam al li ŝi ne pardonis la ofendon.

Post Duulo foriris ankaŭ multaj aliaj, tiel ke en la manĝejo restis el niaj konatoj nur Julinjo, Miroir kaj Memo. Miroir ridetante aŭskultis la babiladon de la inĝeniero, kiu parolis ankoraŭ sence, nur ne plu laŭte kiel de sur la tribuno antaŭ centoj da aŭskultantoj. Kiam de ekstere aŭdiĝis laŭta kantado, kvazaŭ ĝi deprenus lian parolpovon kaj li eksilentis. Natalia ekstere kantis:

*“Supre ĉiela bluspegulo,  
Plenigita per la steloj,  
Sur la tero mizerulo,  
Dolorplena, sen esperoj...”*

La kantado agrable impresis, ĝi estis doloriga, elvokanta larmojn, kiujn oni plej bone rimarkis en okuloj de Julinjo.

Kial Julinjo ekploris? Tial, ĉar ŝi aŭdis la voĉon de Natalia, kiun ŝi kalumniis. Nun ŝia voĉo rememorigis al Julinjo, ke tiel delikata estaĵo, kiu scipovas ravi la aliajn per sia kantado, bezonas konsilajn vortojn kaj admonojn, tial neniel oni ŝin devus kalumnii. Tiu ĉi sento de bedaŭro ne estis konstanta, ĝi ekĝermis en ŝia interno nur por momento, ĉar la kantado impresis ŝin.

Natalia kaj Unulo eniris en la salonon kaj ilia eniro estis akompanata de kelkaj enviaj okulparoj. Unu-

lo alvenis per pezaĵ paŝoj al la tablo de Memo, ekdeziris al li bonan dormon, kapkline salutis Julinjon kaj foriris. Li tute ne rimarkis sian francan kolegon. Oni vidis, ke li estas laca kaj dormema. Natalia perrigarde akompanis lin. Ŝi informis sin ĉe Julinjo pri Ana kaj baldaŭ foriris, tiel ke en la manĝejo restis kelkaj societanoj, kiuj iom post iom eliradis. Fine restis Julinjo kaj Memo, kiu denove trinkis la tason da kafo. Li demandis post mallonga paŭzo:

“Ĉu vi estas dormema, sinjorino?”

“Tute ne, mi havas nur kapdoloron. Se vi volus min akompani, mi promenus. Sola mi timas eliri sur la ŝoseon. Kiu scias, ĉu la friponoj ne atakus honestan virinon?”

Li konsentis. Silente ili ekiris la vojon. Estis beleĝa nokto, plena je mistiko. Ĝi regis la tutan ĉirkaŭaĵon, tra kiu ili marŝis. En la valo la lago rebrilis pro lunaj radioj. La branĉoj de l' pinoj aspektis kiel sin lulantaj nigraj monstretoj. Ili sin movis per kiso de facila venteto, blovanta de sur la altaĵoj de Alpoj.

Niaj konatoj marŝis sudan direkton sur mallarĝa vojo apud la polvoplana ŝoseo. De sur la vojeto estis klare videbla la tuta lago, kvankam ni dubas, ke ili ĝin vidis. Memo enŝovis sian dekstran manon en la barbon, marŝante per malcertaj paŝoj apud sinjorino Julinjo. Ŝi palpebrumis okule kaj timeme ĉirkaŭrigardis. Al ŝi estis malagrable la dumnokta vagado, ĉar ŝi timis. Kvazaŭ io tremus en ŝia interno pro timo. Krome ŝin regis ankaŭ unu alia al ŝi neklarigebla sento. Ŝia spirado estis malregula. En ĝi kaŝiĝis sekreta sopiro, kiu povus post iom da tempo esti vorte kaj age eldirita. Kontraŭe, la inĝenieron regis nur la ebrio, tiel ke li ne multe pensis pri la

celo de sia irado. Malcerte, ŝanceliĝante, li faletadis, sed ne falis. Apenaŭ post duonhora marŝado li estis falonta trans unu ŝtono, tial Julinjo ĉirkaŭbrakis lin.

“Mi ne permesas, ke vi rompu vian kolon pro malcerta marŝado. Tial mi vin tenos subbrake, por ke vi ne vundu vin,” ŝi diris kaj konvulsie kaptis lian brakon.

Memo, kiu estis, kiel ni jam akcentis, ebria, pro freŝa aero plisobriĝis kaj lin surprizis ŝiaj vortoj. Ŝi tenas lin subbrake. Balbutante li dankis ŝin pro la zorgemo, esprimante ankaŭ sian admiron pri bela, steloplena nokto.

“Tre strange,” rediris ŝi, ekmordinte sian malsupran lipon. “Kiel vi nun parolas? Antaŭ kelkaj jaroj ni interkonatiĝis kaj ĉiam ĝis nun mi kredis, kiel ankaŭ la aliaj, ke vi kiel teknikisto neniam volas atenti la belecon de la naturo, dum hodiaŭ tage kaj vespere mi aŭdis de vi strangajn vortojn. Vi ekamis la naturon.”

El lia respondo ŝi divenis, ke tiu ĉi sento ĝermis ankaŭ en lia interno. Li ĝis nun bridis ĝin. Al ŝia rimarko, ke ŝi ŝatas nur tiajn virojn, kiuj amas la naturon, li aldonis:

“Al mi ŝajnas, ke mi povus ĝin ami. Mi ankaŭ malŝatis la virinojn. Kelkfoje pro tio mi ŝajnis al mi mem stranga. Estas vero, mi vin ĉiam ŝatis. Hodiaŭ vi estas por mi de la ĉielo sendita anĝelo gardanto,” li babilis kvazaŭ infano.

“Mi konjektas, ke ĝis hodiaŭ neniuj virino atentis vin, neniuj zorgis pri vi. Miaopinio, se iu zorgus pri vi, ŝi estus via edzino, ĉar vi estas riĉa homo kaj tiaj aferoj allogas, kredu min. Tamen vi ne forgesu,

ke ekzistas la virino, kiu volonte vin amus, se ŝi ne timus vian ridon pro sia sincereco,” ŝi ruze aldonis, atendante la respondon kaj samtempe timante, ke li eble komprenos ŝiajn vortojn kiel la proponon, kiu ne estis esprimita en ĝusta momento.

“Ne povas esti la vero, tiu virino ne ekzistas. Tiu por mi valora. . .”

Ŝi petis lin fini la frazon. Memo ne volis, tial ŝi daŭrigis turmenti lin per la demandoj:

“Ĉu tiu virino estas en nia societo? Kiu ŝi estas? Ne turmentu min, vi bone scias, ke mi estas scivolema. Vi ne devis komenci la frazon, se vi ne intencis ĝin fini. Cetere, ni ne estas infanoj, sed mi estas tre kapricema virino kaj faros nek unu paŝon plu, antaŭ ol vi finos vian frazon.”

“Sinjorino,” diris li riproĉe. “Mia situacio estas iom malagrabla. Mi estas tamen infano, malgraŭ mia barbo. Kiom da fojoj mi volis fortranĉi mian barbon, tiom malŝatatan de la virinoj, ne povantaj imagi la amon sen kisoj. La amon mi, ankoraŭ en tiaj aferoj gimnaziano, timas konfesi al la virino, perdinta por la junuloj la tutan intereson. Vere, mi timas konfesi mian senton, sufiĉe malsaĝan, por esprimi malagrablan, kvankam varman senton, kontraŭ kiu mi batalas jam de jaroj kaj kiun mi preferus forigi. Bedaŭrinde, nenion mi povas diri al vi, ne decas, ke mi malkaŝu miajn sekretojn.”

Ŝi ofendiĝis pro lia konstato, ke ŝi perdis por la junuloj la tutan intereson, ĉar ŝi divenis, ke tiu virino estas ŝi kaj ke li baraktas en sia interno, timante ne ofendi ŝin per la konfeso de la amo. Tamen ŝi persistis kaj, se ŝi ne persistus demandi, eble por ĉiam

prokrastiĝus la provo devigi lin konfesi sian amon al ŝi. Tial ŝi daŭrigis:

“Ridinda homo vi estas, kara inĝeniro, pro vino vi perdis eĉ la prudenton. Aliamaniere mi ne povus klarigi vian konduton, ĉar ĝi similas al tiu de neplenaĝa fraŭlo. Jen ni estas tie ĉi, ludantaj kaŝoludon unu kun la alia. Vi min devigas konfesi la unua la tutan veron, diri al vi, kio min turmentas, esprimi la unua la senton, min jam delonge turmentantan. Nur ne forgesu, ke mi estas la edzino de iu alia kaj ne pritraktu tiun ĉi fakton malĝuste.”

Nun li kuraĝiĝis, eksentinte, ke la afero estas tute alia, ke ŝi ankaŭ lin deziras:

“Mi scias, ke vi estas edzinigita, sed via edzo estas malsana, tial li longe ne vivos kaj tiam. . .”

Li faris movon por ĉirkaŭpreni ŝin. Ŝi ne permesis. “Iom tro rapide, kara sinjoro,” ŝi ekflustris kaj por momento ekmemoris sian hejme kuŝantan, kadukan edzon. Ĉu ŝi perfidu lin, lin, kiu ŝin savis de malriĉeco, kiu ŝin sinjorinigis, kiu ŝin ĝis antaŭ kelkaj monatoj flegis? Ĉu ne estas ruze venĝi al li? Li ja ne malsaniĝis, por ke ŝi plu ne havu la plezurojn en la vivo. Tiel ŝi batalis en sia interno, malgraŭ sia varma deziro je inĝeniero, sed ŝiaj korposentoj baldaŭ forgesigis la tutan pasintecon, la belan tempon, kiun ŝi travivis kun la edzo. Kelkmonata lia malsano forgesigis la pasintan amon. Kvankam la amo ne estis sincera kaj ŝi vivis kun la edzo nur pro intereso, tamen ĝi havis tian formon, kiu almenaŭ je danko devus ligi la virinon, kies dezirojn plenumas la edzo malavare, ne meditante, ĉu tial lia materiala stato ruiniĝos.

Forgesante ĉiujn bonfaraĵojn kaj adoradon de la



edzo, ŝi diris, kvankam iom heziteme:

“Kion vi farus pro via amo?”

“Mi saltus en la lagon, lageton, lagegon, kien ajn vi ordonus,” infanĝoje ekparolis Memo.

“La lago estas nur la lago,” daŭrigis ŝi kolere-me. “Mi ne vendas mian amon por la vivoj, kvankam iu malsaĝulo pro mi mortigis sin. Kompatindulo. Mi nun estas pli reala. Hodiaŭ mi estas tie ĉi, do mi estos la via. Ĝi estas la realeco, kara inĝeniero. La salto en la lagon, almenaŭ por bona naĝanto, kia vi estas, ŝajnas stranga infanaĵo, simila al eldiroj de junaj geamantoj. Tiaj vortoj, uzataj de gejunuloj kaj efektivigitaj, estas tragikaj kelkafoje. Eldirataj de vi, ili ŝajnas ridindaj, karulo. Estas pli bone daŭrigi la vojon, kiun ni ekiris nenion parolante, eltrinki plenan glason da ebrieco. Pri mia devo mi ankaŭ ne pensu, ĉar virino mi estas malzorgata, nekaresata jam kelkajn monatojn. Vi komprenas, kion ĝi signifas por mia junaĝo. Nun mi vivas kvazaŭ rozo en la vazo, sen suna ardo, nombrante la tagojn de perdita juneco.”

Se la inĝeniero estus sobra, li certe ne dirus, ke li benus la tagon de morto de ŝia edzo.

“Ne benu lian mortotagon,” ŝi diris per tremeta voĉo, sentante sin momente kulpa pro kruela esprimo. “Mi ĝin ne deziras, forgesu nur por momento, ke li ekzistas, almenaŭ por hodiaŭ plezurigu min. Ĉu ne, vi forgesos?”

Ili ambaŭ ĉion forgesis, ŝi daŭre, kaj li iom poste cerbumis, kio okazis.

Interese estas, ke li serĉis poste la manieron por forgesigi sian agon kaj ŝi kiel virino eĉ ne pensis plu pri la reveno al edzo, nek intencis forlasi la inĝenieron.

Intence ŝi riskis kaj okaze gajnis. Li entute ne havis la intencon riski kaj tamen riskis, sed perdis, escepte se oni kredas, ke la virino estas gajnaĵo.

#### IV

Antaŭ aŭroro Duulo ordigis la materialon por la pentrado. Li prenis sian lornon por trarigardi la ĉirkaŭaĵon, kovritan de matena krepusko, por ke li ĝin de pli proksime vidu. Post kelkmomenta rigardado li ekflustris:

“Bone mi konjektis, virinmalamanto.”

Je la sepa horo matene la pentraĵo estis preta. Duulo demetis siajn penikon kaj kolorilojn kaj sidiĝis sur la seĝo apud la preta laboraĵo. Poste li rigardis la pentraĵon de sufiĉe malproksima distanco. Al li ĝi ŝajnis la plej taŭga el ĉiuj liaj ĝisnunaj pentraĵoj.

“Jen, mi finis ĝin,” eksopiris Duulo. “Se ŝi estus tie ĉi, ankaŭ ŝi ĝojus pro ĝi. Ŝiaj sentoj estis puraj, noblaj; la plej bela el ili estis tiu por la arto. Memorante pri ŝi, mi estas feliĉa. Kiam mi pentras, al mi ŝajnas, ke ŝi alvenos kaj ĝojos pro sukcesa laboro.”

Duulo memoris pri la knabino, kiu iam per siaj delikataj, bluaj okuloj, atentis ĉiun lian ekmovon. Per ŝi en lia animo vekiĝis la novaj sentoj kaj la senco por la vivo, kiun li, pro sia stranga sentilo de antaŭvidado, ekmalamis. Bedaŭrinde, unu monaton antaŭ edziĝotago la knabino malvarmumis kaj baldaŭ mortis. De tiu tago Duulo vivis sola, li vizitis nenium societeton, nur malregule oni lin vidis inter esperantistoj. Li plejparte revis pentrante. De post malfeliĉa akcidento pasis dek jaroj. Tamen ĝin li ne forgesis. Li memoris pri ŝi hodiaŭ dum la pentrado, tial ke ŝi

kutimis dum sia vivo apud li sidi, kiam li pentris. Tiu memoro estis tiom forta, ke al li dum kelkaj momentoj ŝajnis, ke ŝi sidas efektive apud li kaj konsilas, kiel li laboru.

Ekstere la malgranda sonorilo ekaŭdiĝis. Singultantaj ĝiaj sonoj tremetis tra la aero.

“Jen, dek jarojn mi nenion antaŭsentis kaj hieraŭ la sama malsaĝaĵo denove okazis,” li diris kaj meditis pri tiu strangaĵo. Li analizis siajn sentojn por dekovri la veron:

“Pri kio min memorigas tiu ĉi sonorilo? Pri la malĝojo? Eble, eble, sed la sonorilo ne estas la sama kiel tiu, akompaninta ŝin al eterna ripozo. Ĝi estis la sonorilo de doloro, tiu ĉi estas la sonorilo de l’ espero. Tiu akompanis ŝin kaj multajn aliajn al tombejo, ĉi tiu akompanas la dezirojn al mistera kreinto. Mi ankaŭ esperas, eble estas eĉ la vero, ke ni iam kuniĝos.”

Li povis nenion diveni, nur li faris la menciitan komparon, post kiu en liaj pensoj vekiĝis malproksima estinto kaj li revis pri ĝi.

Poste li leviĝis de sur la seĝo, por ke li lavu siajn penikon kaj paletron. Dum tiu laboro vizitis lin Miroir. La poeto admire rigardis sur la tolo streĉitan pentraĵon, lumigatan de sunaj radioj. La malnova kastelo ŝajnis tute natura. Tra la fenestro Miroir vidis la saman scenon. Malnova, malzorgata kastelo estas sur alta monto. Ĝiaj muroj ŝajnas malnovaj, sed la fortikaĵo ne estas ruino, oni ĝin antaŭ kelkaj dekjaroj renovigis.

“La sceno estas belega. Al mi ŝajnas la pentraĵo pli bela ol la modelo. Ĝi estas tiel majeste situita kaj aspektas kiel obstina monstro, kaŝita en la verdaĵo

kaj ornamita per ĝi. Belega pentraĵo, mi vin gratulas, talentulo. Kiom belega devas aspekti la kastelo, prilumata de lunaj radioj. Kiel agrable estus foje de supre rigardi ĉirkaŭen kiel aglo el ĉiela bluaĵo. La konstruinto de tiu ĉi kasteleto estis verŝajne la homo, amanta la naturon? Ĉu vi scias, kiu ĝin konstruis?”

“Lian nomon mi ne konas. Estis iu episkopo, tion mi scias. La konstruaĵo devenas el mezepoko. Hodiaŭ oni plu ne konstruus tiajn fortikaĵojn, kiuj disfalus pro unu kanona pafado kiel la domo el ludokartoj. La episkopo estis riĉa. Li fondis tie malgrandan muzeon, ian kolekton de malnova armilaro. Verŝajne vi hodiaŭ vidos ĝin, ĉar mia opinio la societo hodiaŭ vizitos la kastelon. Tiam vi povos rigardi de supre en la valon. Ĉu ni parolu ankoraŭ iom pri la kasteloj, se ni jam komencis pri ĉi tiu, por ke vi estu informita ankaŭ pri tiaj konstruaĵoj, kiujn oni povas trovi en la tuta lando. Ili similas unuj al la aliaj kaj servis iam kiel defendiloj kontraŭ turkoj. Ĉi tien ne venadis turkoj, sed la episkopo tamen konstruis al si fortikaĵon, ĉu pro rabistaj bandoj, ĉu pro iu alia kaŭzo, tion mi ne scias. En aliaj regionoj de la lando tiaj fortikaĵoj servis nur kiel defendiloj dum la militoj. Tiuj militoj dauris longan tempon kaj la tuta historio montras, ke oni iam okupiĝis plejparte pri la militado. Ŝajnas al mi, ke la progreso de la homaro perdis almenaŭ kvincent jarojn pro la militoj. Precipe plena de militado estas la historio de nia popolo.”

“Strange. Do via popolo ĉiam militis? Malbona signo,” respondis Miroir.

“Kial ĝi estas malbona signo? Iam ni militis pro necesego. Dum ni mortadis je miloj kaj miloj, vi okcidenteŭropanoj kreadis vian kulturon. Via tuta kulturo estiĝis helpe de niaj korpoj. Pro dankemo vi nin

eknomis barbaroj. Se ni lasus la turkojn veni al vi, ĉu vi kredas, ke la cirkonstancoj en la mondo tiel aspektus?”

“Kompreneble estas, ke okazus iaj ŝanĝoj, se la historion oni povus neniigi kaj denove komenci direkti la vivon de la homaro laŭ nia volo. Tamen, barbareco estas militi, tial ni vin nomas barbaroj.”

“Vi estas tute prava, la saman opinion pri la milito mi mem havas! Mi volis rakonti nur la historiajn faktojn, kiujn oni ne povas nei. Akcenti mi aparte devas, ke ni slavoĵ, precipe ni balkanaj slavoĵ, estas pacamaj. Ĉiam troviĝis la aliaj, kiuj nin ne lasis trankvilaj, precipe antaŭ mallonga tempo, kiam ni eĉ militis unuj kontraŭ la aliaj pro malnoblaj interesoj de eŭropaj politikaj gvidantoj, kiuj ĉiamaniere volis gardi eksplodeman pulvujon sur Balkano. Mi demandis min mem ofte pri veraj kaŭzoj de tiu malamo, kiu tiel ofte ŝajne ekregis balkanajn popolojn kaj kaŭzis, ke ili atakis unuj la aliajn. Ĉiam mi trovis la veran intencon, per kiu oni celis la malfortiĝon de balkanaj popoloj. Sub tre mallerta masko sur Balkano eksplodis la terurega mondmilito, kies sekvojn ni ankoraŭ sentos longan tempon. Granda teknika progreso, unika utila produkto de la milito, signifas nenion kontraŭ milionoj da kripluloj kaj suferuloj, kiujn la homaro tiel baldaŭ ne anstataŭos per homoj, kapablaj perlabori mem. Teknika progreso ne mankus ankaŭ poste, sed la suferoj de la homaro ne estos forgesitaj multajn dekjarojn. Ĉio ĉi estas nur malgranda paĝeto el grandega libro de militaj malbonaĵoj kaj pri la krizo, ekreginta ĉiujn partojn de la mondo, kiu ĉiutage pliakraĝas kaj nepre minacas al financa stato de ruinigita Eŭropo, al kies plena ruiniĝo ni ĉiutage alproksimiĝas, ni eĉ ne bezonas paroli. Pro malgran-

daj interesoj de unuopaj naciaj gvidantoj tiu krizo pliakriĝas, sed lerte ili sukcesas ĝin kaŝi.

“Kiu scias, ĉu oni denove ne provos bruligi la pulvujon en iu el balkanaj landoj, kvankam mi ne kredas, ke ĝi plu eksplodos, ĉar barbaroj nun estas laĉaj; la barbarismon ili per siaj sango kaj vivoj pagis trioble pli kare. Ankoraŭ tra niaj urboj kaj vilaĝoj rampas senpieduloj kaj almozpetas blinduloj, kiuj rememorigas nin pri ’bonfaraĵoj’ de la milito.”

“Vi estas prava, sed pri tio ni rakontu iun alian fojon. Mi venis por vidi tiun ĉi belan pentraĵon, kaj mi petas vin, vendu ĝin al mi.”

Duulo koleretis pro lia propono, sciigante al li, ke li ne vendas la pentraĵojn, ĉar lia patro al li heredigis sufiĉe grandan kapitalon. Miroir tial kredis, ke li ofendiĝis kaj tuj senkulpiĝis al Duulo, kiu afable respondis:

“Ho ne, vi ne ofendis min! Mi forgesu vian proponon.” lom poste li daŭrigis. “Rigardu, la kastelo super la lago estas tri foje tiom alta kiel la distanco inter mia fenestro kaj la tero. Pro rigardo de sur ĝi antaŭ la okuloj nebuliĝas, tiel rakontas kelkaj personoj.”

“Via fenestro estas ankaŭ tre alte, se iu tra ĝi falus, tiu ne restus viva. Al diablo, la tero tie ĉi mal-supreniĝas, tial via tria etaĝo estas preskaŭ tiom alta kiel kutime la kvina. De alia flanko la hotelo ’Mondo’ ne estas tiom alta konstruaĵo.”

“Mi estas konvinkita, ke ĉi tien ne kuraĝus alrampi gasto vizitinta pasintan nokton fraŭlinon Ana?” per demando respondis Duulo.

Pro tiuj ĉi vortoj Miroir iom konfuziĝis. Tamen li respondis tre rapide:

“Eble li tamen kuraĝus, tiajn friponojn ne ĝenas alteco de iu konstruaĵo, se temas pri grava amafero.”

“Stranga opinio. Ĉu vi kredas lian amsopiron tiom grava, ke li eĉ riskus sian vivon? Al Ana estis tre facile veni, kvankam mi kredas, ke vi pli bone pripensus vian decidon, se ŝi loĝus en mia ĉambro.”

“Eble vi bonvolis diri, ke mi estas la fripono, ŝin vizitinta?”

“Vi mem diris, sinjoro Miroir. Viaj vortoj klare konfirmas mian opinion, sed sidiĝu. Sincere mi malfermos al vi mian koron. Ne nur, ke mi diras, mi estas tute certa, ke vi estis tiu fripono. Komprenu la esprimon ĝuste, mi ne volas per tiu ĉi vorto vin ofendi. Vi ne neu la fakton, ĉar via pantalono montras la makulojn de verda herbo. Kiam vi malsupren rampis, per genuoj vi ektuŝis la herbon, malsekan de matena roso. Nur tiel oni povas klarigi freŝajn makulojn sur via pantalono.”

Malvarma ŝvito aperis sur la frunto de Miroir, kiu nun ankaŭ rimarkis, ke lia pantalono estas verdigita, kaj post mallonga momento li diris:

“Ĉu vi ĝin distrumpetos?”

“Neniam. Mi vin komprenas, kara Miroir, vi volis diri al Ana, kion vi dumtage ne povis al ŝi diri! La decido estas malsaĝa; al tiaj virinoj, kia estas Ana, oni ne iras, antaŭ ol ili konsentas, kaj vi certe havas nur la spertojn kun facile konkereblaj virinoj. La bruo, kiu okazis, pravigas mian opinion pri ŝi.”

“Mi bedaŭras mian malbonan agon. Kiel mi povis eĉ pensi, ke la afero sukcesos kaj misuzi vian gastamon? Se Ana la veron ekscios, ŝi min eble ekmalamos. Tia supozo turmentas min ege.”

“Eble ŝi forgesus sian malamon. Vi estas simpatia al ŝi, malkaŝe mi povas diri. Pliigu ŝian simpation kaj, kio koncernas min, jam delonge mi pardonis vian malicecon, kvankam min ĝi ne rilatas. Mi ne povus malami eĉ la homon, kaŭzantan al mi ian malbonon, malfeliĉon, aŭ ion similan, do kial mi vin malamam, kiu al mi nenion faris? Ana vin simpatias. Vi povus esti unu el la plej feliĉaj homoj en la mondo, ĉar ŝi estas riĉa. Vi ankaŭ posedas sufiĉe, kaj kie la riĉeco estas kun la amo, tie la vivo povas esti agrabla.”

“Bedaŭrinde, mi ne kredas, ke tio plenumiĝos,” rezigne respondis Miroir. “Per kio vi povus pruvi viajn vortojn?”

“Vi volas tuj la pruvojn pri ŝia amo? Al vi ne sufiĉas miaj vortoj pri ŝia simpatio, malesperulo. Mi ne povas al vi helpi, krom per la konsilo, ke vi devas ŝian simpation flegi. La amon oni devas iom atendi, ĝis ĝi ekregas ambaŭ korojn. Vi mem pensis ĝojigi fraŭlinon Ana, serĉante la oportunan momenton kaj la ilon por via celo. La plej oportuna ilo vi trovis mian pentraĵon, ĉar en Bled ne troviĝas io pli konvena, tial vi deziris ĝin aĉeti. Mi vin tuj komprenis, sed mi ne volis ĝin vendi. Tamen mi dezirus konvinki vin pri mia amikeco, kvankam laŭ mia konjekto, vi ĝin ne meritas. Tial, ĉar mi komprenas viajn dolorojn, mi donacas al vi la pentraĵon, kaj vi ĝin donacu al Ana.”

“Vi ne estas homo, sed anĝelo. En via koro ĝermas nek envio nek riproĉo, sed konsolo kaj kompreno de miaj doloroj. Kiel mi povas danki al vi?”

“La ĉefa celo de mia vivo devas esti la feliĉigo de aliaj homoj, ĉar mi ne volas plu serĉi mian feliĉon. Per tio mi diris ĉion. Nun prenu la pentraĵon, se ĝi servos kiel ilo por alporti al vi kelkajn feliĉajn momentojn, memoru pri mi,” li diris kaj enpakis sian



penetraĵon en iom da papero, transdonante ĝin al Miroir. “Vi aŭdas la sonorilon,” li diris al Miroir, dum ili iris en la manĝejon. “Jam komencis flugi deziroj de ridinduloj, atendente, ke ĉio venu el la ĉielo kaj ili mem faras nenion por efektiviĝi siajn dezirojn.”

La kelnero alportis por ili kafon kaj baldaŭ alvenis Memo, salutante Duulon kaj Miroiron oscedante:

“Bonan matenon. Vi min hodiaŭ trompis, leviĝinte pli frue ol mi. Mi ĉi-nokte ne povis dormi, ĉiumomente mi vekigis. De longe mi ne dormis tiel malbone. Ankaŭ la aero estas tre sufoka kaj mia korpo ŝvitas pro la varmeco. Malbenitaj hundaj tagoj kaj la vojaĝo dum ili.

“Vi nun ne vojaĝas, sed ripozas, kaj la noktoj tie ĉi ne estas varmaj, tial mi ne komprenas, ke oni povas maldormi pro varmeco, kiu ne ekzistas. Viaj okuloj estas ruĝaj, tial vin mi bedaŭras, ne konsiderante veran kaŭzon. Certe vi ankaŭ aŭdis, kio okazis en la hotelo dumnokte? Vi ankaŭ loĝas en la unua etaĝo. Estus tre interese aŭdi, ĉu vi ektimis kaj fermis viajn fenestrojn post la akcidento?”

“Certe vi ŝercas. Kio okazis en la unua etaĝo, mi vere ne scias,” respondis Memo. “Se iu mortis, memkompreneble estas, ke mi ne povis aŭdi.”

“Mia sinjoro, estis sufiĉe granda bruo. Iu alrampis ĝis la fenestro de ĉambro de fraŭlino Ana, kiu ektimis kaj vekis preskaŭ la tutan hotelon. Ĉiuj kuris al la unua etaĝo, al ŝia ĉambro. Nur ne ĉeestis vi kaj la sinjorino.”

“Pro diablo, ĉu mia imago estas tiel forta kaj mi ne povas diferencii, ĉu mi sonĝas aŭ maldormas? Tiam mi certe sonĝis pri la varmeco. Efektive, strangan

akcidenton vi raportis. Ĉu oni scias, kiu estis la fripono, kies kapon mi frakasus, se mi lin konus?"

"Ne estas grave, mia sinjoro, sed ĉi-nokte vi tamen ne dormis bone, aŭ vi ne estis en la hotelo. Felicŭlo, vi vin bone amuziĝis kaj ne aŭdis, kio okazis! Nun, post la akcidento, vi frakasus la kapon al la fripono."

La mieno de Memo koleriĝis, kion ankaŭ Miroir rimarkis, kvankam li ne povis diveni, kion signifas la vortoj de Duulo. Ke ili ion signifas, pruvis la inĝeniero, kiu ekkriis:

"Kion vi kuraĝas diri, sinjoro Duulo? Vi opinias, ke mi mem, tio signifas inĝeniero Petro Memo, estis la persono, vizitinta fraŭlinon Anan?"

"Pro Dio," ekkriis Miroir. "Ĉu vi ne komprenas, ke sinjoro Duulo nur ŝercas kaj vi tion serioze pri-traktas. Mi estas certa, ke pri vi li eĉ ne pensis, ke vi povus ion similan entrepreni. Silentu ni pri tiu akcidento, vi malpacigiĝos pro ĝi."

"Ne estu nervema, sinjoro inĝeniero, ne estu time-ma, sinjoro Miroir," diris Duulo per krediga kaj iom malica voĉo. "Ni ambaŭ bone komprenu la aferon, sinjoro virinmalamanto. Neniu povus eĉ songi, ke vi volis viziti dumnokte Anan. Estus tute alia afero, se mi dirus, ke vi volis viziti sinjorinon Julinjon."

Inĝeniero Memo faldis sian frunton, respondis nion, sed al li estis klara, ke Duulo iamaniere eksciis la kaŭzon de lia maldormo. La situacio estis nun tre danĝera por bona reputacio de sinjorino, tial li volonte cedis al Duulo kaj ne volis paroli pri tio. Duulon li pro tio ne ekmalamis, sciante, ke li certe ne babilos pri tio. Li konis Duulon silentema homo, al

kiu oni povas konfidi ĉion. Li sentis la impreson de liaj vortoj, estis ekscitita, sed sukcesis ŝajne trankvile fortrinki la tason da blanka kafo.

Miroir nemulte komprenis la vortojn de la pentristo, sed estis gaja, ke ili plu ne disputas, ĉar la temo estis samtempe por li tikla.

Inter la gastoj, venantaj en la manĝejon, la lasta venis sinjorino Julinjo kaj sidiĝis apud la inĝeniero. Duulo salutis ŝin afable. Ŝi resalutis per facila kapklino, preskaŭ malgrave, kvazaŭ nur pro konveneco ŝi resalutas. Post pasinta nokto ŝi fieriĝis, konkerinte unu el la plej famaj homoj de la lando, riĉan kaj bone konatan inventinton. Lia populareco plaĉis al ŝi pli multe ol riĉeco de la edzo, kies aĝo diferenciĝas tre multe de ŝia. Nome, li estis sesdekjara.

Apud la sama tablo sidas Ana kaj Natalia. Vizaĝo de Ana estas tute gaja, sur ĝi oni ne vidas eĉ la postsignon de la pasintnokta timo. Natalia ankaŭ estas gaja. Ŝi kaŝe rigardas ofte al Unulo, kiu aŭskultas la paroladon de Miroir. Kiam Unulo levis la kapon, liaj profundaj, vivecaj okuloj rigardis al sinjoro Miroir afable, tiel ke neniuj povus pensi, ke tiuj ĉi homoj hieraŭ preskaŭ malpaciĝis.

La societo restis ĉirkaŭ duonon da horo en la manĝejo. Post la propono de iu samideano ĉiuj eliris por promeni al la kastelo. Ĉiu el ili trovis al si konvenan societon. Unulo kaj Natalia akompanis la inĝenieron kaj la sinjorinon. La lasta eliris Duulo kun unu sinjoro, kiu lin akompanis nur ĝis la eliro. Nia pentristo adiaŭis lin kaj sekvis la aliajn.

Gesocietanoj marŝis malrapide al la monto. Unu grupo de ĉirkaŭ dek kvar personoj, do pli ol la duono de la ekskursanoj, restis malantaŭ la aliaj. En tiu

grupo oni denove klaĉis pri Natalia kaj Unulo. Unu sufiĉe bela fraŭlino direktis la interparoladon. Ŝi akcentis, ke Natalia pro sia malbona konduto malutilas al sia reputacio. La ĉefaj argumentoj kontraŭ ŝia konduto estis ŝia irado kun Unulo tra Vintgar kaj la pasintnokta foresto sur la lago.

Malgraŭ ĉiuj konvinkaj vortoj de tiu fraŭlino, kies temperamento ŝatis klaĉon, anoncis sin iu sinjoro, kiu ne volis konfirmi ŝian opinion, dirante, ke ŝi troigas la aferon, ĉar li konas Unulon eksterordinare honesta homo, kiu certe neniam ofendus la sentojn de Natalia.

Lia peno estis vana, ĉar la fraŭlino sukcesis konvinki siajn kunulojn, ke ŝi parolas la veron kaj konvinkis ilin eĉ pri tio, ke Unulo timigis ĉi-nokte Anan, ĉar li volis veni al Natalia kaj uzis pluvkondukan tubon kiel helpilon, sed li ne povis pro rompiĝo de la fenestro efektiviĝi sian intencon. Ŝi do jam esploris, ke la fenestro de Ana estas apud pluvkonduka tubo kaj tuj apude troviĝas la fenestro de Natalia.

Se ni interesiĝus pri pliaj klarigoj de la fraŭlino, ni aŭdus tiom da kombinaĵoj, kiom da haroj enhavas ŝia hararo. Laŭ ŝia babilado jam multaj fraŭlinoj patriniĝis, multaj edzoj eksedziĝis, kaj se iu kredus, ŝi povus aserti, ke el la lakto de birdoj oni faras tre bongustan fromaĝon, kiun ŝi en la laktejo tre ofte gustumas.

## V

La societo alvenis al la kastelo sur la monto. Sur verda herbo sidas kelkaj pli junaj membroj kaj babilas. Kelkaj el ili venis ĝis la barilo kaj rigardas la lagon de supre. De sur la montoj oni sentas bloveti facilan

venteton, refreŝigantan la ekskursanojn. La ĉielo, alta kaj blua, estas pura, sen nubetoj. La varma julia suno brilas kaj varmigas la tutan ĉirkaŭaĵon. Estas tamen sufiĉe agrable, ĉar la suno ne leviĝis ankoraŭ tre alten en la ĉielo.

La malnovaj muroj de la estinta fortikaĵo estas parte kovritaj per musko. Ili nigriĝis pro pluvoj, dum centjaroj sur ilin falantaj. Hodiaŭ ili estas lumigataj de la sama suno kiel antaŭ centjaroj. Tamen, kia diferenco inter la tiama tempo kaj hodiaŭ en la vivmaniero de la homoj! Dum la suno restis la sama, ne fariĝinte pli varma, nek pli malvarma, kion oni povas konstati, la vivmanieroj multe ŝanĝiĝis kaj ankaŭ la kondiĉoj de la vivado.

Unulo rigardas la murojn per siaj profundaj okuloj, apogante sin je la barilo super la lago. Natalia staras apud li. Ŝi ankaŭ rigardas la lagon. Unulo meditas. En lia cerbo ŝajne aperas la tuta filmo de memoroj. Li memoras la rakontojn kaj la fabelojn pri la malnovaj kasteloj, feoj kaj feinoj. Pro tiuj fabeloj, kiujn al li rakontis la patrino, dum sia infanaĝo li ofte dolĉe ekdormis. La patrino heredigis al li poetan talenton; ŝi povis belege rakonti eĉ pri tio, kio ne estis skribita. Unulo amis la fabelojn, kiujn li mem ankaŭ verkis.

“Ne ekzistas plu la homoj, la konstruintoj de la kastelo. Kial ili ĝin konstruis? Ĉu pro tio, ke ĝiaj estroj loĝu pli alte kaj ĝuu la freŝan aeron? Ĉu tial, ke ili montru sian superecon, loĝante pli alte ol la aliaj homoj, iliaj subuloj, tiom ofte nomataj brutaro malinda por vivi? La kastelo similas al akcipitra nesto; la estroj al akcipitroj kaj agloj, ofte forflugintaj en la valon por forporti sian kaptiĵon malproksime

de tiuj, malvolonte ĝin donantaj. Eble estis kelkaj foje elverŝita sango de subuloj? Certe. Okazis ribeloj kontraŭ estroj. Hodiaŭ en la kastelo vivas homoj tute humilaj. La fortikaĵo fariĝis loĝejo de pacamaj homoj. Tie ĉi eĉ gastejo ekzistas. Kia diferenco inter hodiaŭ kaj iam. Iam tie ĉi loĝis la homoj, sin pritraktantaj pli noblaj ol la aliaj; hodiaŭ estas tie ĉi la homoj, laŭleĝe sin ne diferencantaj de tiuj en la valo. Hodiaŭ plu ne fluas sango pro ribeloj kontraŭ estroj. Efektive, la mondo ŝanĝiĝis kaj fariĝis pli bona. Aŭ ne, ĝi restis la sama. Ankaŭ hodiaŭ la homoj elverŝas santon kaj konstruas fortikaĵojn por similaj celoj kiel iam, do, la kerno restis tute sama, ŝanĝiĝis nur la formo. Kaj li ripetis la frazon de granda saĝulo: "Nenio estas nova en la mondo." Oni uzas modernajn rimedojn, sed la homoj havas la saman deziron, la deziron, kiun la naturo al ili donacis: eluzi unuj la aliajn, vivi per la aliaj. Ŝanĝiĝis nur iomete la manieroj de la vivo.

La homoj ankaŭ hodiaŭ amuziĝas. Ili iamaj amuzoj estis lumigataj per kandeloj, hodiaŭ per elektra lumo, morgaŭ eble per radio-lumo. Iam oni veturis en veturiloj kaj iris piede, hodiaŭ oni iras piede kaj veturas en vagonaro, aŭtomobilo k.t.p. Sur la akvo oni veturis per boatoj kaj velŝipoj, hodiaŭ oni veturas per vaporŝipoj. Morgaŭ oni eble ridos eĉ pri tio, ĉar grandegaj aerŝipoj anstataŭos, pro sia rapideco, ĉiujn aliajn trafikilojn. Pro sia komforto multaj homoj eĉ ne vizitas diversajn koncertojn, ĉar ili povas ĉion aŭdi per radio-telefono en sia hejmo. Post iom da tempo ili ĉion eĉ vidos el sia loĝejo, kion ajn ili ekdeziros. La sorĉa spegulo el 'mil kaj unu noktoj' fariĝos tute reala afero.

Iam oni devis perdi multajn tagojn por viziti sian

parencon aŭ amikon en iu malproksima loko; hodiaŭ la vizito ebligas post kelkaj horoj; morgaŭ ĝi ebligas post kelkaj minutoj. Telegrafo havas hodiaŭ la saman sencon kiel iama rapidrajdanto, nur hodiaŭ ĉiu povas uzi telegrafon, sed iam ne ĉiuj povis posedi ĉevalon kaj pagitan rapidrajdanton. Ĉio ĉi estas nur teknikaj progresoj, de aliaj vidpunktoj la homoj restis preskaŭ la samaj, malkulturaj kiel iam, ĉar ili ankoraŭ mortigas siajn proksimulojn. De mia vidpunkto estas tute egale mortigi la homon per lanco aŭ pafilo, forranĉi al li la kapon per gilotino, mortigi per elektrokurento aŭ venena gaso. Kvankam neniu rajtas forpreni la vivon de iu alia, oni tamen mortigas, oni militas kaj verŝajne okazos ankoraŭ militoj, malgraŭ ĉiuj pacaj kontraktoj surpapere skribitaj, se la homoj en sia interno ne eksentos la bezonon ĉesi kun la ĝisnuna praktiko kaj ne permesos al si altrudi tiajn malsaĝaĵojn. La homaro estos turmentata, ĝi suferos pro kulpo de malplimulto, ĝi pentos la pekojn de multnombraj gvidantoj. La historio ripetiga, sanga, malkultura. Ploras patrinoj, ploras vidvinoj kaj ploras pro la militoj daŭre, senĉese la puraj boneco kaj la amo. Ĝis la mondo estos tia, ploras la boneco kaj la amo, korepuraj idoloj de ĉiuj suferuloj kaj mizeruloj, moke pritraktataj idoloj de senanimaj homaĉoj. Ho jes, mi povas diri, ke proksimiĝas la tago de la venĝo, sed la boneco kaj amo venĝos je malamo, tiel ke ili venkos ĉion malnoblan en la animoj de la homaro. Proksimiĝas la tago, nur miriadoj da minutoj plenumos la intertempon. Ili pasados monotone en takto de horloĝo: tik-tak-tik-tak, kaj ĉe ĉiu tiktako haladzos al la altaro de malamo varma sango de senkulpuloj. Fine la horloĝo, mezuranta la tempon en tiu interspaco, ĉesos tiktaki kaj amo parolos al amo

per la lingvo belsona, flua, refreŝiganta la animojn. Samtempe estos benata ĝia heroldo, la lingvo, uzata hodiaŭ kiel komuna, per kiu, kun granda ideo ligita, la homaro konstruas la vojon de amo elektitan. . . ”

Natalia interrompis lian meditadon per malĝojigaj vortoj, akompanate de kelkaj larmoj el siaj okuloj:

“Vi denove revas. Sed Johano, proksimiĝas la tago de mia feliĉo. Tiam. . . ”

Unulo mire rigardis ŝin. Ŝiaj pupiloj flamis. Li komprenis la signifon de ŝiaj vortoj, almenaŭ al li estis klara ŝia intenco. Tamen li ne trovis la ĝustajn konsolajn vortojn por respondi al ŝi.

“Natalia, ĉu vi povus foriri el nia urbo? Eble tio estos pli bona por ni ambaŭ, ĉar la instinkto min devigas skribi novajn verkojn, kio postulas la solecon. Vi revenus certe pli pacienca kaj prudenta, ol vi ĝis nun estis, infano de mia animo. Ho, kial min vipas la mortinta amo?”

“Vi devas verki? Ĉu mi estas la persono vin ĝenanta en via laboro? Ĝis hodiaŭ mi tion eĉ ne konjektis. Mi petas vin, ne parolu plu pri tio ĉi, nek pri la pasinteco, kiu vin turmentas. Mi ankaŭ plu ne parolos pri miaj sentoj al vi, ĉar malgraŭ tio vi restus ĉiam la sama, mia malfeliĉo ne povus vin aliigi. Ho, kiel malfeliĉa mi estas.”

“Oni mem devas krei sian feliĉon, mia kara. La malfeliĉon fermu en la koron kaj sekvu la vojojn de la vivo. Al la homoj oni devas faciligi la suferojn, nobligi iliajn animojn, pensi pli multe pri la aliaj ol pri si mem kaj pri siaj doloroj. Jen estas la celo, kiu povus forgesigi vian imagan malfeliĉon.”

“Maleble, tio ne havas sencon, mi ne plu povas tiamaniere vivi. Sed ne pensu, ke pri mia malfeliĉo



vi estas kulpa. Tre bona kaj nobla vi estas, amanto de mia animo. Tamen vi min vipas, mia koro krias. Viaj vortoj estas vipofrapoj, pro kiuj la animo konvulsias.”

“La esperoj konsolas, esperu kaj kredu je via feliĉo.”

En okuloj de Natalia aperis multaj larmoj. Ŝi turnis sin al la lago, por ke li ne vidu ilin, iomete rigardis la bluan akvon kaj ekiris kun li al la kastelo. Unulo iom poste komprenis la ĝustan signifon de ŝiaj vortoj, esperante tamen, ke ŝi ne faros ion malbonan al si. “Kial ŝi trovis ĝuste min, al kiu momente la amo al la virino ŝajnas superflua? Ĉu tio estas la vero, ke mi ne rajtas ŝin ami?” pensis la juna poeto. “Ĉu ŝi, malaperinta kiel ombro, tamen restis kun mi? Ĉu ŝiaj bluj okuloj kaj anĝela vizaĝo restis por mi ĉiam adorindaj kaj ŝi la unika idolo de mia vivo? Ne, ankoraŭ mi ne povas ŝin forgesi, mi povus al Natalia esti nur amiko kaj nenio plu. Bedaŭrinde resti amiko al la virino, vin amanta elkore, signifas pliigi ŝian doloron, vipi ŝian koron. Tial mi foriru, ŝi forgesos min. Se ŝi ne forgesos?”

\* \* \*

En la kastelon tra malnova pordo eniris la lastaj Unulo kaj Natalia. En la unua etaĝo kolektiĝis jam la tuta societo. Maljuna loĝanto kaj gardanto de la kastelo montris al la gastoj la malnovan liton el la ebono, plenan de polvo, en kiu jam dum centjaroj neniu dormis.

“Jen, tie ĉi dormis la episkopo. La malgranda por-do kondukas en la kapeleton,” diris la maljunulo kaj montris la muron. Li palpis kelkajn sekundojn kaj ĝis

nun nevidebla pordo malfermiĝis. “La episkopo iris ĉiutage preĝi en la kapeleton,” estis ĉio, kion povis klarigi la maljunulo al multaj demandoj pri la konstruo de la pordo.

La kapeleto mem ne estas interesa. En ĝi troviĝas tute simpla altaro, kun kelkaj kandelinoj, elora kaliko, lucerno kaj diversaj necesajoj por beneficantoj. Kelkaj sanktaj bildoj estas la ĉefa ornamaĵo de la muroj. Ili reprezentas neniajn artajn pentraĵojn, pro kiuj alvenus ĉi tien aĉetantoj de antikvaj pentraĵoj.

La episkopo, kiel oni vidas, ordigis al si la loĝejon tre komforte; rekte el la lito li povis eniri en la kapeleton. Liaj domanoj devis ĉiumatene partopreni diservojn, sed ilia vojo en la kapeleton estis pli malproksima.

Post trarigardado de la kapeleto la societo eniris en unu grandan ĉambron. Ĉe la muroj en la ĉambro pendas diversa armilaro: la lancoj, sagoj, kaskoj, hakiloj kun longaj teniloj, frapilegoj kaj ĉiaspecaj antikvaj mortigiloj. La episkopo, laŭ klarigo de la maljunulo, havis la sencon por kolektado de armilaro kaj estis samtempe mem bona soldato. “Episkopo kaj samtempe militanto,” pensis Unulo. “Kiamaniere li komprenis la vortojn de Kristo? Kial tiu nazaretano kun bluaj, allogaj okuloj ne reviviĝis, por denove savi la mondon de tiaj paŝtistoj de lia ŝafidaro?”

La societanoj parolis pri la armilaro. Natalia kaj Unulo iris, kiel kutime, la lastaj. Ili haltis ĉe hakiloj kun longaj teniloj, kiam la aliaj eliris el la ĉambro. Unulo sulkis sian frunton, dirante:

“Rigardu, Natalia, tiun strangan hakilon. Min naŭzas pro nura ekpenso, ke ĝi servis por frakasado de kapoj. Efektive, la halo estas muzeo, malgran-

da, sed sufiĉa por ni. Sufiĉas por naŭzi. Jen estas la frapilego, kiel delikate ĝi aspektas. Fine, rigardu la sagojn. Kelkaj el ili estas streĉitaj sur pafarko. Ĉu mi unu deprenu? Tamen ne indas preni ĝin en la manon, povus okazi malfeliĉo, eble kelkaj el ili estas venenitaj, kvankam ŝajnas maleble. Diru al mi, kio estus, se mi vin okaze mortigus?”

Natalia rigardis Johanon per stranga rigardo, ĉar li parolis al ŝi pri sensecaj aferoj, kio ne estas lia kutimo. Neniam li pensis pri tiaj aferoj.

“Nenio estus, vi liberigus min de la suferoj. Diru,” ŝi daŭrigis iom pli rapide, “ĉu vi egale plorus, se mi min mem mortigus, kiel se mi mortus pro iu alia kaŭzo? Diru nur sincere!”

Unulo sciis, kion ŝi deziras aŭdi, sed li ne volis respondi malsincere. “Mi opinias,” li diris malgrave, “ke ambaŭ specoj de mortoj estas bedaŭrindaj, se temas pri la junuloj. Ili povus min malĝojigi, sed neniel plorigi. Sufiĉe mi ploris en la vivo ĝis nun.”

En la dekstra okulo de Natalia, tute en la angulo, aperis por la poeto nevidebla larmo kaj ŝi rediris per melankolia, singultanta voĉo:

“Dankon. Nun, Johano, ni estas en tiu ĉi halo tute solaj, tial mi povas reciti al vi kelkajn frazojn el unu romano: ‘Iam iu knabino demandis sian amanton la samon kiel mi, li respondis simile kiel vi, ne sciante, ke liaj vortoj estis ŝia kondamno.’ Malsage, ĉu ne?”

“Mi vin ne komprenas Nanjo. Ĉu vi dezirus aŭdi de mi malsinceran respondon, kiu konvenus al vi? Mi plu ne povus pro vi, nek pro iu alia, plori, ĉar ion pli teruran ol estis tiu akcidento, mi ne povus travivi. Tial mi sincere parolis, kion mi ne bedaŭras, ĉar mi

ne povas flati kaj diri tion, kion vi deziras. Malsincera mi ne povus esti, Natalia.”

“Ne parolu plu, Johano, en mia koro ĝermas nun io terura. Vi eĉ ne imagas, kiom ĝi doloras. Vi eĉ ne volas scii, kiu kaŭzas miajn dolorojn. Pli bone estas, ke vi ne scias, ĉar mi kredas, ke vi vengŭs, eĉ se vi mem tiu estus. Mi bone memoras vian eldiron, ke ne estas noble dolorigi la aliajn. Ne pensu, ke mia turmentanto vi estas, ĉar vi ne estas kulpa. Ne suferu do pro mi, karulo de mia animo. Malvero eĉ estas, ke via proksimeco min ĝenas kaj dolorigas, malvero eĉ estas, ke viaj vortoj vipas min, mi mem ne scias, kion mi efektive volas, tial ne koleru kaj pardonu min pro stultaj demandoj, kiujn mi direktis al vi.”

Unulo aŭdis ŝiajn milde sonantajn vortojn. Ŝajnis, ke ili venas de ie el malproksimo, kiel la voĉo el la tombo de lia amatino. Li komprenis ŝin bone, ŝi ludis malsinceran rolon, nur por ke li ne pensu, ke ŝi amas lin. Tia virina kaŝoludo plaĉis al li kaj li ekrevis pri la malgranda feino, kiu antaŭ sia morto gaje dancis kaj gajigis sian princon, kiun ŝi ne kuraĝis ami. En sia revo li deziris ĉirkaŭpreni Natalian, sed vidante ŝin jam sur la sojlo, kun gaja surbuŝa rideto, li miris, kiom strange ŝiaj vortoj impresis lin kaj li eĉ ne rimarkis ŝian deflankiĝon. Ankaŭ li miris pro subita ŝia gaja rideto. “Ĉu virinoj povas laŭvole aktori kun siaj sentoj?” En lia animo luktis du sentoj; la amo al la mortinta anĝela knabino, sed por momento plifortiĝis la amo al la nobla animo de Natalia, al kiu li sentis eble pli grandan amon, ol li mem povis imagi. Li de sur la sama loko rigardis Natalian, kiu milde ridetis, kaj ŝia vizaĝo ne plu estis pala. Rigardante lin, ŝi ankaŭ ne konjektis, ke ŝi evitis la ĉirkaŭprenon, tiom longe deziratan kaj songatan.

Ofte en la vivo ni lasas nian feliĉon preterpasi, volante ĝin kapti apenaŭ tiam, kiam ĝi plu ne estas kaptebla.

Post la eliro el la kastelo la gesocietanoj eksidis sub unu arbo kaj komencis ludi. Natalia intertempe foriris al la lago. Neniu krom Duulo rimarkis ŝian foriron. Unulo eniris en la rondon de la ludantoj, kiuj amuziĝis, piridante la mallertecon de kelkaj personoj dum kaptoludado.

Natalia aliris la altan muron super la lago. Ŝi turnis sin por vidi, ĉu iu akompanas ŝin. Tiam ŝi suriris la muron, kiu ĉirkaŭbaras la abismon. Ŝi hezitis. En la animo de knabino ĝermis la doloro; antaŭ ŝiaj okuloj estis la profundaĵo kaj la blua alloga akvo. “Nur unu paŝo baras mian vivon kaj morton,” ŝi parolis al si mem. Preninte malgrandan ŝtoneton de sur la muro, ŝi ĵetis ĝin al la akvo, nombrante duonvoĉe: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ. . . kaj la ŝtoneto falis en la akvon, dum ŝi faris la lastan ekmovon. . .

“Dek. Vi obstina knabineto,” diris ies voĉo kaj ŝi kuŝis en la brakoj de alta homo. “Vi estas stranga, ĉu vi volas mortigi la korojn de la aliaj, se la via nenion jam valoras por vi? Vi eĉ nombris por konvinkiĝi, kiom alta la distanco inter la lago kaj vi estas.”

Natalia hontis. Ŝi silentis. Tiam ŝiaj okuloj, plenaj de larmoj, ekrigardis al Duulo, tenanta ŝin sur la brakoj. La pentristo komprenis ŝin. Li sciis, kio okazas en la koro de Natalia, tial li ŝin bedaŭris.

“Pardonu, se mi plilongigis viajn suferojn, fraŭlino Natalia. Tamen mi opinias, ke vi konvinkiĝis pri mia silentemo. Neniu scios pri via intenco. Komprenu, ke estas pli malfacile vivi ol morti. Kial vi elektis

pli facilan vojon? Ni ne rajtas esti al ni mem ekzekutistoj, se ni eĉ pekis kontraŭ moroj de la homoj, kontraŭ iliaj leĝoj. Ankaŭ neniu alia rajtas esti nia ekzekutisto, eĉ ne tiu, kiu donis al ni la vivon.”

Natalia silentis. Ŝi rigardis per siaj larmoplenaj okuloj malproksimen al la montoj. Post mallonga paŭzo ŝi ekparolis:

“Mia koro estas mortigita. Ankaŭ mian animon mi volis mortigi. Kial vivi en doloroj?” mi demandas min. “De nenie mi vidas eĉ la radieton de la espero, por miaj animaj suferoj ne ekzistas kuracilo. Vivi, vivi, facile estas diri, sed kiam la vivo ne plu havas sencon, ĉu mi ĝin ŝatu.”

“Ĝi devas havi la sencon. Ekzemple, konsolu la aliajn suferulojn. Nun vi pli bone komprenos fremdajn dolorojn, ĉar viaj propraj torente ekfluis trans la rando de ebleco. Oni devas forgesi sian propran malfeliĉon, laborante por la feliĉo de la aliaj. Utila al homoj vi povus esti, ĝis via vivo pro senkompata leĝo de la naturo finiĝos.”

“Vi parolas, ho ve, same kiel li. Kion ĝi signifas? Mi ne povas kompreni tiun ĉi misteron. Ĉu estas eble, ke du homoj la samon pensas, la samon parolas kaj per tute samaj vortoj konsolas min? Kial vi al li neniam parolas, kial vi ne estas lia amiko, kvankam viaj pensoj tiom konkordiĝas?”

“Ne serĉu la veron, fraŭlino. Mi scias, pri kiu persono vi parolas, kaj petas vin, ne provu serĉi la veron. Neniam vi komprenos ĝin. Eĉ ne estas bezone mediti pri ĝi. La vivo ŝajnas esti la afero malsaĝa, kvankam krom la malsaĝaĵoj oni trovas tre ofte la idealojn pli fortajn ol la bagateloj de la ĉiutaga vivo. Se la vivo

eble ne havas sencon por mi mem, ĝi havas ĝin por iu alia. Do, vi vivos,” li aldonis per certiga voĉo.

“Vivi,” ekflustris Natalia. “Vi denove parolas kiel li, sed plu mi ne meditos pri tiu ĉi strangaĵo. Mi vivos, kondiĉe ke vi aŭ li, estas tute egale, helpu al mi. Vi devas helpi, vi eĉ deziras helpi, ĉar vane vi ne plilongigis mian doloron.”

“La Patro permesis sian filon krucumi, por ke li savu la homaron. Ĝi ne estas nur religia frazo, kiel simbolo ĝi signifas multe. Ĉu vi komprenas min?”

“Mi komprenas, simile ankaŭ li parolas,” diris ŝi kaj ekiris kun li.

La pentristo meditis pri la lasta frazo de Natalia. “Li. Natalia pensas pri li. Ni du neniam parolis unu al la alia, sed tiom proksimaj ni estas. Egale pensantaj personoj eĉ ne bezonas interparoli, ĉio inter ili estas memkomprenebla. Ne ekzistas la bezono por interŝango de pensoj. Li certe scias, ke ŝia doloro estas granda, ke ĝin ŝi ne povas elteni. Tamen, li permesis, ke mi savu ŝin. Espereble, ŝia doloro ne daŭros longe, la homoj rapide ĉion forgesas. Ili trovas ofte la novan celon en la vivo, nur oni devas al ili doni la direkton, kiam ili seniluziiĝas.”

“Levu la kapon supren, via kunfrato al vi diras, ke per la estonta vivo vi pli multe utilos al la homoj, ol vi utilis per via morto,” ŝajnis al Natalia aŭdi ies voĉon. Ŝi ĉirkaŭenrigardis. Proksime de ŝi estis Duulo, kiu ne parolis. Tamen ŝi sentis, ke li pensis pri la samaj vortoj. Ŝi decidis vivi, ĝis ŝi falos sub la ŝarĝo de la vivo. Sur ŝia buŝeto aperis gaja rideto. Ĝin pligajigis la vortoj de Unulo:

“Mi multe timis pri vi, Nanjo. Feliĉa mi estas, vidante vin tiom gaja. Kie vi estis, dum ni ludis?”

\* \* \*

La suno brilas en la altaĵo. La vojo malsupreniĝas. La gesocietanoj marŝas apud la ruinigita muro, kiu estas la barilo kontraŭ falo en la profundaĵon, ĉar la monto estas tre abrupta. Iuj gesocietanoj ekkuris, por kiel eble plej rapide veni malsupren. Natalia ankaŭ kuris. Unulo estis post kelkaj sekundoj antaŭ ŝi, ĉar li kuris pli rapide. Tiam li subite haltis. Natalia alkuris post kelkaj momentoj je lia dorso kaj estis ĵetita al la muro. Ŝi iom senhaŭtigis sian maldekstran manon. Unulo timeme diris:

“Mi estas kulpa pro via malfeliĉo. Vere estis malprudente ekhalti antaŭ vi, dum vi rapide kuris, nur mi tiun momenton ne pensis pri okazebla malfeliĉo. Ĉu la vundo vin doloras?”

La lipoj de Natalia moviĝis kvazaŭ dirante: “De nove unu doloro pro vi.” Survoje en la valon Unulo ŝin kompateme rigardis. Ĉe la malgranda rivereto li prenis sian poŝtukon, malsekigis ĝin kaj delikate forviŝis la sangon de sur ŝia mano.

“Nanjo, vin doloros la vundo post iom da tempo. Tamen mi opinias, ke mi devis ĝin lavi. Atendu, mi bandaĝos viajn fingrojn, ili estas plej forte vunditaj.”

Natalia estis pala en la vizaĝo, dum li bandaĝis ŝiajn fingrojn, kaj ŝi rigardis lin per dankema rigardo. Ŝi ĉirkaŭbrakis lin, apogante siajn fingrojn al liaj, dirante:

“Tiel mi deziras kun vi marŝi, estas pli agrable.”

Li ne ribelis. La koro doloris lin. Nun, sentante la varmecon de Natalia mano, transirantan sur la lian, li eksentis agrablan senton. La malgranda Nanjo sentis verŝajne ion similan kaj forgesis la fizikajn dolorojn.



Almenaŭ, ke ŝi estu unu momenton feliĉa. La unuan fojon, nun, kiam ŝi estas vundita kaj li sentas sin kulpa pro tio, ili proksimiĝis unu al la alia. Kial ĝuste fizikaj vundoj proksimigis ilin fizike kaj anime, dum animaj vundoj kaj sentoj ne povis ĝin kaŭzi?

La gesocietanoj bone vidis la tutan akcidenton. Pro maliceco kelkaj el ili moke parolis pri braksubbraka irado de Natalia kaj Unulo. La klaĉado daŭris ĝis la alveno en la hotelon.

Tiaj estas malicaj homoj.

Post la alveno en la hotelon Natalia tuj foriris en sian ĉambron, kie ŝi kuŝiĝis tute vestita sur la kanapo. En ŝia kapo bolis. Ŝi kuŝis laŭlonge sur la kanapo, kun sub la kapo submetitaj manoj. Maldekstra mano ŝin doloris. Malgranda Nanjo eksopiris. Ŝiaj belaj, brunaj okuloj aspektas dolore. Iom longa vizaĝo estas pala, donante al ŝi la aspekton de martiro. La lipoj, tiuj malkutimaj lipoj, en kiuj malmultaj trovus la belecon, flustras ion, kvazaŭ ŝi al si mem parolus. Ŝi meditas. Ofte ŝi kutimis mediti. Ŝia alta frunto montras, ke ŝi posedas tre senteman talenton de rimarkebleco kaj artismo. Ĉar ŝi kombis siajn harojn supren, la alteco de la frunto estis pli rimarkebla.

Natalia nun memoras pri Unulo, pri la veturado sur la lago kaj pri liaj vortoj en la preĝejo. “Kion li diris? Mian feliĉon li deziris? Tamen, kruda li estas. Ĉu li povus al mi helpi? Kiel? Kial? Kial li silentis, dum mi parolis pri disiĝo? Ĉu li havis neniun vorton de konsolo por mi? Ĉu li ne povis min demandi, kial mi estas malfeliĉa? Ho, bone li scias, ke mi suferas, sed iu vivas ankoraŭ en lia animo, en kiu mi plu ne havas la lokon, kvankam mi estas al li la plej kara el ĉiuj. Mi lin komprenas. Al neniu estas tiel bone konata lia vivo kaj kia li estas, nur mi bone tion scias.

Tial mi komprenas lin. Efektive, min li ne amas, ĉar en tiu okazo li malhelpus mian hodiaŭan malbelan intencon. Li ne lasus min sola, se li min amus. Do, venis Duulo, tiu alia strangulo de nia societo, kiu min savis el la ungegoj de la morto. Se tiel ne okazus, mi estus priplorata flanke de miaj amikoj. Li venis min savi, sed de kie li sciis mian intencon? Ĉu li spionis nin, ĉu li aŭdis, kiam ni parolis? Nekredeble, tute nekredeble, li estis malproksime de ni. Li ne povis esti en la halo, ĉar ni trovis lin en la korto. Tamen, iamaniere li eksciis ĉion, ĉar nekredeble ŝajnas, ke tiu ekscio devenus de tiel granda simileco de iliaj pensoj. Nur, kial li ordonis, ke mi ne meditu pri tiu simileco inter ili? Mi ne meditu. Tamen mi devis mediti, kvankam mi promesis ne okupiĝi pri tio. Tiel mi trovis la veron konsistantan el tio, ke ili estas du korpoj kaj unu sama animo. Estu tiel. Liajn vortojn mi ankaŭ obeos kaj provos serĉi la novan celon en la vivo, helpante al la aliaj. Tio ĉi estas la plej bona vojo, ĉar mi estas tiel malbela, ke neniuj povus min ami. Nenio sur mia korpo estas plaĉinda. Tial ankaŭ Johano ne povas min ami ĉar. . . aŭ ne, ne estas noble tiel pensi pri li. Ho Sinjoro, mi estas vere malfeliĉa, vi ne donis al mi belan vizaĝon. Vi donis al mi nur la vivon, por ke mi pro ĝi suferu, por ke mi ĝin toleru. Jes, vi donis ĝin al mi, sed vi ne permesis al mi mem ĝin redoni. Maljusta vi estas!”

Ŝiaj okuloj denove pleniĝis per larmoj. Kiom da fojoj ŝi hodiaŭ ekploris, ŝi mem ne sciis.

“Ĝis kiam vivi tiamaniere? Ho Dio, kial vi min lasis, kial vi ne donacis al mi belan vizaĝon?”

“Tamen li ne donacis al vi malbelan vizaĝon, kvankam vi ne estas belulino. Krome, li donacis al vi belan animon, kvankam vi antaŭ kelkaj minutoj kontraŭ li

pekis. Via animo estas pli nobla ol multaj aliaj, pli bela kaj pura ol kelkaj ŝajne noblaj kaj vere kruelaj, malicaj,” ŝajnis, ke ies voĉo parolas al ŝi. Tian voĉon ŝi aŭdis tre ofte. Tre ofte dum noktaj promenoj kun Unulo, kaj nun, lia voĉo sonas denove en ŝiaj oreloj, konsolas ŝin, donas al ŝi la novajn esperojn.

“Kaj Unulo, kara Johano, kie vi estas?” ŝi demandis sin mem. “Profunde en via animo Nanjo, tre profunde interne mi estas,” ŝajne respondis la sama voĉo.

“Sidiĝu apud mi, ho karulo!”

Kaj li ekvivis en ŝia fantazio. Ŝia temperaturo plialtiĝis. La vundita mano doloris.

## VI

Dumnokte iom pluvis, tial matene la aero estis pli freŝa. La suno leviĝis el la orienta ĉielo, lumigante belajn altaĵojn de la montaro. La birdoj kantas sur la arboj kaj salutas la novan tagon. Tiu ĉi nova tago nemulte diferencigas de la aliaj, la suno leviĝas kaj, proksimiĝante al la okcidento, ŝajne promenas en la ĉielo. Tiel ripetiĝas ĉiutage, nur la ĉielo estas kelkafoje serena, kelkafoje kovrita per nuboj. Dum sia vagado sur la tero unuj homoj ridetante salutas la vivon, ĝuante ĝiajn belaĵojn; la aliaj suferas, malfacile portante sian ŝarĝon ĝis la morto. En tio ĉi estas la diferenco inter la homoj. La vivo marŝas antaŭen senĝene; la morto de unu homo estas ĉiam anstataŭata per la naskiĝo de unu alia. Neniam la homaro sentas gravan mankon. La homo estas nur la kreito, plenumanta sian devon sur la tero jen, je la utilo, jen je la ŝarĝo de la aliaj. Krom la laborantoj ankaŭ en la besta vivo estas multaj parazitaj; ĉe la homoj do ne

povas esti esceptoj, ĉar ĉiuj ni estas nur la dorlotataj kreitoj de nia komuna patrino naturo. La bestoj ofte mortigas la parazitojn kaj la homoj ne rajtas mortigi la siajn. Se ili estus tiaj, almenaŭ la triono de la tuta homaro devus esti destinita al la morto. En la krueleco la homoj eĉ superas la bestojn kaj tiam ili trovas por la mortigado en amasoj la nomon: milito, kiu ŝajnas tute laŭleĝa. Pro ĝi suferas plejparte la laborantoj. La parazitoj restas kutime vivaj. Tia estas la vivo, kun siaj strangaj, kruelaj leĝoj, parte elpensitaj de la homo mem. La homoj postulas de la vivo ĝenerale la rajton de ekzisto. Dum sia vivo la plejparto adoras nur krudan materismon. Nur malmultaj serĉas la idealan flankon en la vivo.

Tiel meditis Unulo en sia ĉambro.

El niaj konatoj la pasintan nokton ĉiuj bone pasigis. Miroir leviĝis tre frue. En la manĝejon li venis la unua. Poste li revenis en sian ĉambron, prenis kelkajn objektojn kaj iris al Ana. Sian viziton li ne anoncis al ŝi. Enirante en la ĉambron, kun malantaŭ la dorso tenantaj manoj, li trovis Anan apud la fenestro. Pro la alveno de Miroir ŝi iom maltrankviliĝis. “Kial li venis?” Post tiu ĉi demando ŝi eksentis strangan dolĉan premon en sia interno, kiun ŝi ĝis hodiaŭ ne konis. Ia agrabla sento ekregis ŝian animon. Tamen ŝi tute indiferece demandis Miroiron pri lia deziro. La poeto ekridetis, petante la pardonon pro sia alveno, klarigante al Ana, ke li kuraĝis ŝin viziti tial, ĉar li opiniis, ke ili estas bonaj konatoj.

Al Ana ekplaĉis tia klarigo, tial ŝi tuj proponis al li la seĝon.

“Vere, bonaj konatoj povas viziti unu la alian, sed diru la kaŭzon de via vizito,” ŝi petis.

Miroir aŭdis ŝiajn afablajn vortojn. Malgraŭ tio li sentis iom da krudeco en ŝia demando. Li ne pensis, ke li ne meritis esti alparolita per tiel mildaj vortoj, kiujn elparolis la ĉasta knabino. Rigardante ŝin en la okulojn, preskaŭ impertinente li respondis:

“Se vin vizitas via amikino, ŝin vi certe ne demandas, pro kio? Ĉu vere? Nun vi demandas, kvankam al mi ŝajnas, ke ni ankaŭ estas amikoj. Mi eble estas impertinenta, sed nepre mi deziras paroli kun vi. Estas tre multaj aferoj, kiuj nin interesas, bonvolu do dediĉi al mi kelkajn minutojn, ĉarma fraŭlino.”

Ana leviĝis, respondante:

“Evidu flatvortojn. Ĉarmeta, ĉarma, ĉarmega, tute egale. Se al vi plaĉas, vi povas resti tie ĉi, kiom longe vi deziras, nur vi permesos al mi foriri, kiam mi volos. Antaŭ foriro tamen mi ion klarigu. Nome, ne decas, ke mi parolu kun vi en mia ĉambro. Por tio ekzistas aliaj, pli konvenaj ejoj. Rigardante la aferon per la okuloj de la aliaj homoj, ĝi estas por iu ajn fraŭlino malagrabla. Se vi jam kuraĝis malutili al bona reputacio de unu fraŭlino, kion mi faru? La afero viaflanke ŝajnas impertinenta! Kiel mi scias, tre ofendema homo vi estas, tial vi konsideras miajn vortojn tro severaj. Vi eĉ mian demandon, direktitan al vi pro nura konveno, pritraktis tre stranga, ĉar preskaŭ ĉiuj vejnetoj en via vizaĝo ekstremitis. Bone mi rimarkis. Viaj okuloj strange min rigardas. Mi bedaŭras eĉ mian hieraŭan konduton kontraŭ vi. Pasintan vesperon, kiel vi scias, mi diris, ke ekzistas friponoj, kiuj ludas per delikataj sentoj de la knabinoj. Parolante ĝenerale pri tiu afero, mi ne konjektis, ke vi povus vin senti trafita per tio, ĉar mi ne kredis, ke vi travivis kelkajn tiajn aventuretojn. Pardonu min, tre mi bedaŭras iom akran esprimon pri tiaj homoj, kiujn mi

nomis friponoj. Pro mia senkulpiĝo tamen ne imagu min bonanima anĝelo, ne imagu min malgranda, naiva knabineto. Mi ne ŝatas tiajn homojn, kiuj ludas per la sentoj de la knabinoj, tial mi ne havas tre belan opinion pri vi, kvankam mi vin persone multe ŝatas, eĉ tro multe. Jen estas la enkonduko, por ke vi povu kondukti, kaj nun diru, kion vi tenas malantaŭ via dorso? Vi eble intencis surprizi min, sed la spegulo malantaŭ via dorso jam dekovris la objekton. Ankaŭ per tio vi ne sukcesis”

La vortoj el ŝia buŝo fluis torente kaj Miroir ne povis tuj trafi ilian ĝustan sencon, des pli, ĉar la logika sinsekvo de la frazoj mankis. Li ne povis diveni, ĉu ŝi parolas por aŭ kontraŭ li. Poste li klarigis al ŝi, ke li decidis donaci al ŝi la pentraĵon de Duulo, sentante la devon donaci ĝin al ŝi, ĉar en Francujo (li mensogis) estas kutimo ion donaci al siaj novaj konatoj, precipe al fraŭlinoj.

Ana ne meditis multe pri la ekzisto de tia moro, kaj al ŝi ne venis eĉ la ideo en la kapon esplori la aferon, demandi, ĉu ĝi vere estas la moro aŭ la elpensajo de Miroir, kiu ne trovis pli oportunan manieron por ion donaci al ŝi. Ŝin tio tute ne rilatis, ĉar ŝi tre deziris akcepti de li la donacon. Tial ŝi diris:

“Tre bela moro, tre ĉarma. Ĉu vi ne bedaŭras donaci tiel belan pentraĵon, tiom belan memoraĵon pri tiu ĉi lando?”

Tiam ŝi entuziasme montradis per sia fingreto diversajn punktojn sur la pentraĵo. Tiamaniere refreŝiĝis ŝia memoro pri la objektoj, kiujn ŝi vidis hieraŭ.

Miroir atente aŭskultis ŝin. Li observis ŝiajn delikatajn fingrojn, vikle montrantaj diversajn punktojn

sur la tolon, akompanate de agrable sonantaj vortoj. Ŝi staris proksime al li, kaj pro la proksimeco li sentis la odoron de ŝiaj haroj, kvazaŭ de freŝa fojno, kiu incitetis lian flarsenton. La sango pli rapide ekfluis tra liaj vejnoj. Ĝi estis unu el tiuj momentoj de homa vivo, dum kiuj oni forgesas ĉion, dum kiuj oni ofte ne povas respondeci pro siaj agoj. En homa korpo vekigas dum tiaj momentoj la deziroj, kiuj jam delonge ĝermis en la interno de la korpo, nur ne prezentiĝis oportuna momento por ilia vekigo.

Ana tuj ne rimarkis, ke ŝiaj sentiloj ankaŭ vekigas, ankoraŭ pensante pri hieraŭaj vidindaĵoj, kiujn nun prezentas la pentraĵo. Tamen estis tiel. Ŝi baldaŭ eksentis, kio kun ŝi okazas, sed sukcesis al ŝi bridi siajn sentojn kaj ekparoli pri kutimaj aferoj, deflankiĝinte sian kapeton de Miroir.

“Duulo donacis al mi la pentraĵon, por ke mi ĝin donacu al vi, nur pro vi mi akceptis la donacon,” li parolis.

Ana ruĝiĝis.

“Akceptu ĝin, fraŭlino Ana. Ĝi estas unika valora donaco de mi, kvankam mi dezirus al vi donaci pli multe ol artan pentraĵon. Mi ne hezitus, se eĉ temus pri mia vivo.”

“Miroir!”

“Ana!” aklame respondis la poeto, premante ŝian manon. “Vi prononcas mian nomon, kvazaŭ ni estus tute fremdaj unu al la alia!”

Parolante ĉi suprajn vortojn, li rigardis ŝian vizaĝon pli kaj pli ruĝiĝantan. Ŝi ne provis liberigi sian manon. Post momento la pentraĵon ŝi faligis sur la tablon kaj ekparolis:

“Bone, de nun mi nomos vin Armando. Mi dankas vin pro la donaco. Ĉu mi povus scii, kial vi donacis ĝin al mi? Ĉu vi opinias min inda je tiu ĉi pentraĵo kaj tiom da agrablaj vortoj? Ho, mi timas viajn vortojn, Armando, mi timas. Strangaj estas miaj sentoj, sed aŭskultu la sonorilon, ĝi kuraĝigas. Ĉu vi kredas je plenumiĝo de la deziroj? Ili povus nun plenumiĝi, se mi permesus, ke okazu tio, kion mi deziris. Lasu mian manon, Armando! Kia stranga varmeco trafluas el ĝi en mian korpon. Mi timas.”

Li ne lasis ŝian manon, kvankam li komprenis la timom de la juna knabino. Li sentis, ke ŝi ankaŭ deziras la unuan kison, sed natura virina fiereco kaj la hontemo defendis sin per petantaj vortoj kontraŭ ĝi. Tamen ĝi okazis, estis sincera, arda kaj longedaŭra, ebria feliĉesprimo de du korpoj, sopirantaj je kuniĝo.

Dum ĝi okazis, en la alia ĉambro Duulo ekspiris. Stranga sonorilkantaĉo maltrankviligis denove lian animon. Antaŭ liaj spiritaĵoj aperis maltrankvila lago kaj en ĝi la virina korpo, ankoraŭ vivanta, kvankam senmova. “Kion ĝi signifas?” Li volis decifri tion, kio devus okazi en la estonto, dum Ana kaj Miroir ĝuis la estantecon, ameme rigardante unu la alian, vekiginte de la unua ebrio.

Ili ekparolis pri la efektiviĝo de iliaj deziroj, nun konfesante unu al la alia, ke ili sonorigante deziris ami unu la alian. Ŝi starigis denove la demandon, ĉu iliaj deziroj nur okaze plenumiĝis, sed anstataŭ respondi al tio, Miroir ŝtelis la trian kison, per kiu iliaj animoj ekflugis en la altajn sferojn de la feliĉo, delikateco kaj amo. Pro internaj impresoj ambaŭ forgesis, ke krome ekzistas io alia, maldelikata, senkompata en la vivo, kiu enhavas ankaŭ malfeliĉajn momentojn. Nenion



pensante, nenion rimarkante, ili ankaŭ ne aŭdis, ke la pordo malfermiĝis.

Venis Natalia. Ĉu ŝi estas ilia satano, deziranta forigi ilian feliĉon, aŭ ŝi estas anĝelo gardanto de Ana? Ŝi ŝanceliĝis volante foriri, sed Miroir kaj Ana rimarkis, ke ili ne plu estas solaj en la ĉambro. Miroir rapide leviĝis de sur sia seĝo, dum Ana restis sur sia loko, ŝi mallevis la okulojn, kvazaŭ hontante pro sia ago.

“Ne permesu vin ĝeni, miaj gekolomboj. Mi nur volas la unua gratuli vin. Mi deziras al vi tiom multe da feliĉo,” diris Natalia kaj etendis la brakojn kiel eble plej malproksime de sia korpo, volante tiamaniere per gesto montri la grandecon de sia deziro. “Samtempe bonvolu min pardoni, maloportunan momenton mi elektis.”

“Armando, nia Nanjo estas tre bona, tiom da feliĉo ŝi deziras al ni,” diris Ana infanĝoje kaj leviĝis. Ŝi plu ne hontis.

“Mi deziras la feliĉon al vi,” diris por si mem Natalia, “ĉar mi ne povas ĝin deziri al mi.” Tiam ŝi gaje laŭte aldonis:

“Ne laŭdu min tro multe, mi envias vin!”

“Envii vi povus tiam Nanjo, se vi la saman feliĉon ne ĝuus.”

“Lasu ĝin, kara mia. Mi vin nun ĝenas, tial mi foriras, dezirante al vi el la tuta koro tre multe da feliĉo.”

“Restu,” apenaŭ diris Ana, sed Natalia jam foriris. En ŝiaj okuloj aperis la larmoj. Ŝi ploris pro ĝojo, vidante sian amikinon feliĉa. Pri si mem ŝi plu

ne pensis, konvinkita, ke oni povas ankaŭ esti feliĉa kaj ekplori, sentante la feliĉon de aliaj.

Natalia estis malfeliĉa, kiel ĉiu amanta kaj ne amata knabino. Almenaŭ ŝi pensis tiel.

“Vidu, ili estas feliĉaj,” ŝi diris al Unulo posttagmeze dum promeno.

“Vi ploras. Ĉu vi envias ŝin?” li demandis.

“Mi ne envias ilin, ili flustru unu al la alia amajn vortojn. Mi ploras, ĉar estas agrable rigardi ilin. Nur pro tiu agrabla, kortuŝa sento, mi ploras. Ĉu ne estas agrable ilin rigardi, diru sincere.”

Unulo ne respondis. “Efektive,” li diris al si mem, “tie en la altaĵo oni eble ne konas la bagatelojn de la ĉiutaga vivo. Aĉe estas mediti pri ĝi. Bedaŭrinde, nenion mi povas fari por savi min kaj liberigi mian korpon de naturaj leĝoj. Mi estas nur la homo. Pro tio mi ankaŭ promenas kun ŝi, al kiu mi por nun ne deziras konfesi la veron.”

“Nanjo, ĉu vi estas malfeliĉa?” li demandis ŝin. Baldaŭ li bedaŭris sian demandon, ĉar ĝin li multfoje ĝis nun starigis al ŝi, kaj ŝi ĉiam konfesis sian malfeliĉon. Nun ŝia respondo estis alia:

“Plu mi ne estas malfeliĉa. Mi sciiĝis pri la feliĉo pli bela ol ĉiuj bagateloj de la vivo. Se mi pro la memoroj iam aliigis, tio daŭros nur momenton. Mi baldaŭ denove ĉion forgesos kaj obstine persistos konsoli la aliajn.”

Ili ne plu parolis.

Jam estis la sesa horo vespere, kiam la societo ĉirkaŭiris la lagon. Je la sepa horo multaj pretiĝis por la vojaĝo. La aŭtomobilo de Memo estis sur la

strato. Li adiaŭis la aliajn, kiuj decidis veturi per-vagonare. Kun sinjorino Julinjo li veturos al la lago de Bohinj, kies beleco superas tiun de Bled. Tien ni ilin ne akompanu kaj revenu al niaj konatoj, kiuj jam estas antaŭ la stacidomo.

Ili adiaŭis Duulon, Miroiron kaj Anan, kiuj restas en Bled. Natalia estis sufiĉe bone disponita kaj parolis al Ana:

“Mi devas foriri, kaj vi restos tie ĉi! Al vi ne mankos bona amiko. Tial vi ne bedaŭros mian foriron. Ankoraŭ foje, restu feliĉa kun via Armando.”

Ĉi-suprajn vortojn ŝi elparolis en sia nacia lingvo kaj tuj esperante demandis Miroiron pri diversaj aferoj, kiel pri la daŭro de lia estado en Bled kaj pri aliaj similaĵoj.

Miroir estis poete disponita. Respondante ŝiajn demandojn, li uzis malkutiman parolmanieron.

“Mi restos tie ĉi, ĝis komenciĝos aŭtuno, ĝis la vetero malvarmiĝos kaj mi ekdeziros por ĉiam forlasi vian landon, tiom belan, tiom ĉarman, kun tiom da belegaj naturvidindaĵoj.”

Natalia ne havis tiom da senco por la poezio de sinjoro Miroir, esprimante sian opinion, ke la lando mem lin ne ligus je Bled, se ne ekzistus iu pli grava kaŭzo, kiu stimulas lin je tiel stranga esprimado. Ŝi rekomendis al li zorgi pri Ana kaj gardi ŝin, ĉar tien ĉi venas diversaj homoj, pro kiuj la virinoj povas havi eĉ malagrablajn.

Fine ŝi adiaŭis Anan, dum Unulo jam forportis ŝian valizeton en la vagonon. La gvidanto de la vagonaro signalis, kaj ĝi ekmoviĝis ĵus en tiu momento, kiam Natalia saltis sur la ŝtupareton. La vagonaro

malrapide moviĝis. Antaŭ okuloj de Natalia aperis Duulo, kiu antaŭ kelkaj momentoj parolis kun la aliaj en la antaŭa vagono. Ŝi aŭdis liajn vortojn, dezirantaj al ŝi bonan vojaĝon, sed post momento ŝi nenion plu aŭdis pro la vagonara bruo. Tamen ŝi vidis, ke liaj lipoj ankoraŭ ion parolas.

“Ŝi foriras,” pensis Duulo, “kaj ŝi en la laboro forgesos momentan malfeliĉon. Kial mi tiun ĉi fojon trompis la sorton kaj savis ŝin, kvankam mi ne rajtus eluzi mian aĉan econ, kiu ebligis al mi konjekti, ke ŝi deziras morti?” Tiam li parolis al Miroir kaj Ana:

“Iru ni, gesinjoroj, nun estos Bled dezerta, nia hotelo povos akcepti novajn gastojn.”

Duulo intencis resti ankoraŭ tri tagojn en Bled kaj poste kun el Bohinj revenonta inĝeniero Memo reveturi aŭtomobile hejmen. Ĝis la reveno de Memo li estos en Vintgar, kie li pentros. El la urbo li intencis forveturi en Germanujon. El liaj vortoj Miroir kaj Ana komprenis, ke ili baldaŭ restos solaj en Bled, pro kio ili ĝojis.

Post la vespermanĝo Duulo tuj enlitiĝis, intencante je la kvara horo matene foriri en Vintgar.

Ana kaj Miroir promenis.

Falis belega nokto, plena de steloj. La luna brilo tremetis sur la supraĵo de la lago. Al la lago, sur la vojo gvidanta malsupren, Ana kun Miroir promenis. Ŝia mezalta staturo moviĝas malrapide apud Miroir kaj ŝia maldekstra, kiel marmorblanka, ĝis la kubo nuda brako estis apogita al la brako de Miroir. Ŝiaj malgrandaj, delikataj fingroj tremetis inter liaj fortaj fingroj. Longaj, brunaj haroj pendis trans la ŝultrojn. La bluaj, mildaj okuloj rigardis la stelo-plenan ĉielon, kaj ŝiaj ruĝaj lipoj ridetis. Malrapide

marŝante ili venis ĝis la benko sub pina branĉaro kaj senvorte sidiĝis sur ĝin. Kial oni devus paroli, se la amo la vortojn ne konas? Ĝi nur ardas en la koro, plenigante ĝin per agrablaj sentoj, kies devenon ni tiom malmulte deziras koni, ĉar por ni estas grava nur la fakto, ke ĝi ekzistas. Ĉirkaŭprenitaj ili ameme rigardis unu la alian; etaj fingroj de Ana ludis per liaj haroj, kaj dum tiu ĉi momento ŝi lin naive ekdemandis, ĉu li iam en la vivo estis tiel feliĉa kiel nun? Miroir konfesis al ŝi, ke li ofte serĉis la feliĉon ie malproksime ĉe la steloj, ke li nur songis pri ĝi. Li karesis ŝiajn harojn. Ŝi ridetis. La vortoj de Miroir estis por ŝi tute novaj; tiajn vortojn ŝi ĝis nun ne aŭdis dum tiel dolĉaj momentoj. Ŝi ne sciis al li respondi kaj naive starigis la demandon pri ilia eterna amo. Ŝi kredis ĝian eternecon kaj estis kontenta aŭdi de li jenon:

“Vi min demandas, sed la respondon al vi flustras la steloplena ĉielo kaj laodoro de la pinoj. Ĉu vi vidas, kiel tremetas la stela perlaro, sub kiu la freŝecon respiras la tuta naturo? La tero sentas sian feliĉon pro la kiso de la nokto. La nokto ĝin karesas. Vi aŭdas la flustron de la pina branĉaro super ni. La branĉoj flustras pro la kisado de apenaŭ sentebla venteto. Ili estas feliĉaj pro kareso de tiu ĉi venteto, tial ili kantetas la kanton de la amo. Mi estas feliĉa, ĉar mian animon trapenetras agrablaj sentoj, kaj mi sentas vian proksimecon. Per la vortoj mi ne povas ĉion esprimi, la sentoj mem pli klare kaj karese parolas.”

Sub la impreso de liaj vortoj Ana pliproksimiĝis al li. La steloriĉa nokto, plena je sentemo, estis belega. La lakta vojo longiĝas trans la tuta ĉielo, ĝis kien oni povas vidi. Ĝi longiĝas trans la ĉielo, ornamita

per miloj da steloj videblaj, kaj ie en nemezureblaj malproksimoj plena je miriadoj da diversaj mondoj kaj sistemoj de senombraj sunoj.

Ana kaj li forgesis sub nia ĉielo la tutan mizeron de la homoj kaj la elturmentitan mondon, kun ĝiaj ĉiutagaj zorgoj. Ili ĝuis la kisojn. Nur aŭdiĝis kelkaj vortoj, kiel refreno post la sobriĝo de la kisa ebrio. La sobriĝo daŭris nur kelkajn momentojn, ĉar ili devis ĝui la novajn kaj pli ebrigajn kisojn.

Post tia freneza kisado, dum kiu la naturo kantis unu el siaj plej belaj kantoj, aŭdiĝis kelkaj pli realaj vortoj:

“Sciu Ana, ni estos feliĉaj. Vi iros kun mi al la varma sudo, kie ni tra nia fenestro rigardados la forveturon kaj albordiĝon de la ŝipegoj. Ni estos kontentaj, nian vivon akompanos senfina feliĉo.”

Ŝi kredis lin, ĝoja kiel infano.

Plu oni aŭdis neniun vorton. La luno leviĝis alten en la ĉielo. Iliajn korpojn regis pli kaj pli ardaĵ sentoj. Ana imagis la idealan feliĉon. Miroir tute alie pensis. Per la kisoj li superŝutis ŝiajn okulojn, vangojn kaj frunton. La korpo de Ana tremetis, ĝin trapenetrus pasia, agrabla sento. Baldaŭ al ŝi ŝajnis, ke ŝi naĝas ien en senfundan malproksimecon kaj ŝi senkonscie redonadis al li la kisojn. Kvazaŭ en la sonĝo ŝi eksentis, ke li ŝin premas al si forte, maldelikate. La figuro de Armando Miroir, la brilo de la luno, la steloplana ĉielo kaj la konscio pri tio, kio ĉirkaŭ ŝi okazas, tute malaperis por ŝiaj sentiloj, donante la lokon al iu kruda dolĉeco, miksitita kun momenta doloro kaj konvulsiado de la korpo.

La abismo de voluptemo malfermiĝis. . .

## VII

Malsupreniĝis el la nuboj aŭtunaj pluvoj kaj la sonĝa naturo surmetis sian doloran vualon. Estas malgaja aŭtuna nokto, dum kiu ne brilas la steloj kaj la ĉielon ne ornamas la luna brilo. La homoj moviĝas tra la stratoj kiel malhelaj ombroj, rapide irantaj, por kiel eble plej baldaŭ atingi celon. Prilumate de palpebrumantaj strataj lampoj, la geirantoj rapidas al sia celo, nur la paŝoj de nokta policisto eĥas konstante, monotone, preskaŭ de sur la sama loko.

Sur malseka pavimo de la strato Metrono estas marŝanta alta homo per rapidaj paŝoj. Li baldaŭ alvenis al iu domo kaj elektra lumo ekbrilis en la koridoro, lumigante al li la vojon.

Natalia sidis apud la tablo. Li demetis sian mantelon. En tiu ĉi alveninto ni rekonas la pentriston Duulon, kiu vizitis Natalion, al kiu li promesis post sia reveno el Germanujo alporti la pentraĵon pri Vintgar.

Li pardonpetis pro sia malfrua reveno, pro kio la promesitan pentraĵon ŝi devis longe atendi. La sama pentraĵo multe plaĉis al la vizitintoj de la ekspozicio, kiun li aranĝis en Germanujo, sed vendi li ĝin ne volis, ĉar li pensis pri sia promeso.

Densa arbaro estis videbla en fundo de la pentraĵo. En unu angulo staras la ŝtonego, de sur kiu la akvo falas malsupren en profundan abismon, disgutiĝante je milionoj da perlaĵ gutetoj.

Natalia rigardis la pentraĵon, klinis per kapo al ĝi, kisante tiun lokon, kie estis pentrita ligna ĉirkaŭbaro antaŭ la abismo. Duulon malĝojigis ŝiaj larmoplenaj okuloj. Li demandis pri la kaŭzo de ŝia ago.

“Iam, amiko mia, mi estis ĉe tiu ĉi akvofalo rigardanta lin, kiel li fermis siajn okulojn, eĉ ne rigardante la akvofalon, sed en sia interno li sentis la tutan belecon de la naturo, kiun li adoris. Tiam mi estis feliĉa. Hodiaŭ mi povas nur memori pri la feliĉo. Promenante tra tiu arbaro, en mia animo ĝermis la ĝojo, ĉiu vejneto gaje en mi tremetis, kaj super ni, en la altaĵo ĉiela, brilis la arda suno, la ĉefa atestanto pri la eterna harmonio en nia ĉiela mondo. Nun tio apartenas al la pasinteco, nur la pentraĵo estas la rememorigilo pri la iama feliĉo. La realeco estas hodiaŭ pli kruela, eĉ paroli pri ĝi ne indas. La tutan ŝanĝon vi tralegos en lia letero. Mi mem ne povus rakonti pri ĉio, tro malforta mi estas por informi vin pri la malfeliĉo de la aliaj. Neniam mi imagis, ke fremdaj doloroj povus mian koron tiom vundi. Neniam mi kredis, ke la malfeliĉo de la aliaj povus min tiom impresi. Tro multe da egoismo estis en mia koro, kiu plu ne ekzistas, nur dum kelkaj momentoj ĝi reaperas, sed rapide mi ĝin forigas. Bonvolu legi la leteron; vi ekscios ĉion, vi konvinkiĝos, ke la vivo estas grandega rado, kiu turniĝas kaj kun si portas jen malfeliĉon, jen feliĉon. Ĉio ŝanĝiĝas, nur nia universo en sia senĉesa movado restas la sama. Bedaŭrinde, ni estas nur la teranoj. Legu!”

*Napolo, la 10-an de novembro. . .*

*Kara mia Nanjo,*

*La duan vian leteron mi ricevis en la urbo “de eterna beleco kaj juneco,” kvankam ĝi estas malpura kaj ĝia nokta mizero montras la tutan veron.*

*En mia animo tamen ardas io granda, forta, potenca. Mi ne povus nei la influon de la varma sudo je miaj korpo kaj animo. Mi bedaŭras, ke vi sentas la*



*alproksimiĝon de la vintro, dum min agrablaj, freŝaj vesperoj ravas kaj mi skribas pensante pri vi ĉiuj. . .*

*Vi skribas al mi multe pri la okazintaĵoj en nia urbo; tiel mi danke al vi havas la rilatojn kun la personoj al mi bone konataj. Nur kelkaj linioj de via letero impresis min malagrade, precipe tiuj pri Ana. KREDU, mi timis, ke tiel okazos. Sed, ĝi tamen ne estas terura, ĉar Miroir, espereble, vizitos nian landon, por ke li riparu antaŭ la homoj sian senpripensan agon. Efektive, la amo estas mirinda aĵo, blinda, per ĝi venas la plej grandaj agrablaj kaj ankaŭ la plej grandaj doloroj.*

*Vi diras, ke Ana koleras, ĉar ŝin forlasis ĉiuj amikoj. Sufiĉas, ke vi ŝin amas. Diru al ŝi, ke ne malaperis ĉiuj esperoj; tiuj, hodiaŭ ŝin per fingro montrantaj, estas eble pli grandaj kulpuloj ol ŝi, nur ili pli lerte scipovas kaŝi siajn agojn. Ana kulpis pro la amo kaj ĉiu ama kulpo kaŝas en si samtempe la doloron. Kiu volas, tiu povas ŝin abomene preterpasi, ŝi ne ofendiĝu. Miaopinie ŝi devus forvojaĝi kiel eble plej baldaŭ, por tiamaniere eviti tiujn personojn, kiuj deziras kraĉi en ŝian vizaĝon, ĉar ili ne povas surkraĉi sian propran. Kompreneble, mi persone restus tamen tie, fiera, ke mi povas toleri iliajn mokojn.*

*Do, la edzo de sinjorino Julinjo mortis kelkajn tagojn post ŝia reveno, kaj jam la unuan de novembro ŝi fianĉiniĝis al la inĝeniero Memo. Tro rapide, sed mi komprenas ŝin. Memo nenion skribas al mi, kva-zaŭ li forgesus min. Pro tio mi ne koleras, ĉar post mia reveno mi ne malfruos diri al li mian opinionon.*

*Mi finas Nanjo, nun vi plu ne skribu al mi. Kiam mi en iu urbo haltos pli longe, mian adreson vi ĝustatempe ekscios.*

*Nun adiaŭ, mia Nanjo, se mi iam revenos, mia animo estos pli trankvila. Mi en Napolo jam la plejparton de miaj memoroj forgesis, kaj mi ĉiutage sentas, kiel ie malproksime spiras iu nekonata estaĵo, sed ĝi estas tiom proksima al mi. Jes, iu tre konata min atendos, certe ŝi atendos, ĉu ne, mia la plej kara?*

*Johano*

Post la tralego de tiu ĉi letero Duulo esprimis sian konsenton en tio, kio koncernas Anan. Li ankaŭ kredis, ke la situacio ne estas tiom danĝera kaj ke ĉio finiĝos feliĉe.

Pro liaj vortoj Natalia ekploris. Li kredis, ke ŝi ploras pro malespero, ke Unulo eble ne revenos. Iom poste ŝi trankviliĝis kaj klarigis al li la kaŭzon de sia ploro:

“Ĉesu paroli kaj eĉ moki min pri Unulo, ĉar viaj vortoj nun moke sonas. Kial? Mi ne ploras pro mi, sed pro Ana. Mia doloro plu ne estas doloro, ĉar mi povas esperi, vi ja mem legis. La letero de Unulo alvenis antaŭ du tagoj kaj hieraŭ Ana ricevis la leteron de Miroir, kiun okaze tralegis ŝia patrino. Ĝi enhavas krudajn vortojn. Li skribas decideme, ke li ŝin ne edzinigos. Interalie li konsideras sin malprudenta pro sia iama stranga opinio, ke francaj virinoj nenion valoras. Nun ili plaĉas al li des pli, ĉar ĝis nun li ne havis kun ili tiajn malagrabraĵojn. Tia klarigo estas ruza; mi kredas, ke tieaj virinoj ne estas malbonaj, la samaj suferoj ilin turmentas kiel nin. Mi abomenas lian dubemon pri la fideleco de Ana. Li dubas, ke iu povus al li garantii, ke la infano estas ĝuste lia. Jen la tuta aĉaĵo de tiu ĉi malnoblulo, kiu venis tien ĉi, eluzis nian gastamon kaj ludis la rolon de bonintenca kavaliro. Tamen ni devas pardoni lin, ĉar li ne estas

kulpa. En malbona medio oni edukis lin. Verŝajne liaj amikoj estas pli kulpaj ol li, ĉar antaŭ sia foriro li tute alie parolis kaj finis ĉiujn formalajojn ĉe la gepatroj de Ana. Neniu lin je tio devigis, Ana eĉ ne volis, sed li tamen ĉion ordigis. Tial mi opinias, ke nun iu alia konsilas al li eviti siajn devojn.”

“Terure,” diris Duulo, kunpreminte siajn pugnoj. “Mi venĝos, mi venĝos. Ho ve, eĉ mi helpis al li; se mi ne estus la peranto, certe neniam ili interkonatiĝus pli intime. Mi mem ĉion aranĝis, ne sciante, ke mi malfermos la abismon de l’ doloroj al tiom naiva knabino, kia estis Ana.”

“Vi ankoraŭ ne scias ĉion,” diris Natalia. “Ana ne plu havas hejmon. Mi devis al ŝi per mia tuta mono helpi, ke ŝi forvojaĝu.”

“Ĉu vi helpos al ŝi ankoraŭ foje?”

“Mi ne plu povos multe helpi. Baldaŭ ekestos vintro kaj al mi mankas la plej necesaj vestaĵoj, kiujn mi devis forvendi. Kiamaniere mi povos al ŝi doni tion, kion mi mem ne havas? Oni devas vivi, pro tio manĝi. Tamen mi disdonos ĉion, kion mi posedas. Tiel ni vivos, ĝis ŝi trovos ian okupon. Mi opinias, ke antaŭ la akuŝo tio ne estas ebla. Tamen, restas ankoraŭ Unulo, lin mi petos, li havas sufiĉe da mono!”

“Ne, neniel, fraŭlino. Mi ankaŭ kredis, ke la situacio estas malagraba. Ne petu Unulon por helpo, tion mi de vi petas. Mi estas kulpa pro ĉio, mi devas ripari almenaŭ materiale ĉion, tial mi disponigas al vi mian grandan domon kaj enmanigos al vi morgaŭ la akton, laŭ kiu vi kaj ŝi estos posedantoj de tiu domego.”

Natalia prenis la manon de Duulo, ŝi volis ĝin kisi, kaj li ne permesis.

“Anĝela animo, mi devus antaŭ vi genui. Al mi ŝajnas,” li diris genuiĝinte antaŭ ŝi, “ke mi nun aŭdas la sonon de la mistera sonorilo de Bled. Mi sentas la feliĉon kaj en mia animo ardas la stranga flamo de venĝo. Samtempe ardas en mi la feliĉo, ĉar mi sentas vin ĉi tie, vin, kiu estis preta forgesi vin mem, kiu ploris ne pro vi, sed pro ŝi, kaj vi donis ĉion al ŝi, eĉ la koron, ne pensante pri vi mem. Ho, pli bona vi ol mi estas, ĉar mi riskas nek unu dekonon de mia havaĵo, dum vi riskis pli ol la duonon, se eĉ ne ĉion, ĉar helpante al ŝi via honoro povus esti kalumniata. Oni ĉe ni, bedaŭrinde, diras: Vi estas tia, kia estas via amikaro. Amata mia Nanjo. . .”

Li leviĝis, sciiĝinte, ke li ne havas la rajton tiel al ŝi paroli. Antaŭ ol li foriris, Natalia diris:

“Vi scias, amiko mia, ke Kristo, laŭdire, pardonis siajn alnajligintojn, kiam li estis krucumita. Iam vi eĉ mem diris, ke la Patro oferis sian filon pro la bono de la homaro, tial vi ne venĝu al Miroir, mi vin petas. Restu tie ĉi, ni ne petu iom da amo por Ana de li, ĉar ni al ŝi decidis donaci niajn amikecon kaj korojn. La suferuloj kaj de l’ realeco vipataj homoj mildigu la vipofrapojn al la aliaj.”

“Via deziro jam plenumiĝis,” diris li elirante el la ĉambro. “Helpante al ŝi, mi jam venĝis, ĉar per la decido helpi al ŝi mi jam venkis parton da malbono, kiun kaŭzis Miroir. Mi iomete mildigis la sorton de la forlasita amatino, kies malfeliĉon mi mem plejparte kaŭzis.”

“Kial mi ekamis ŝin?” demandis Duulo sin mem post la eliro. “Kaj li? Li nun ĝuas agrablajn tagojn en Italujo, kuracas sian koron kaj sukcesos plene ĝin kuraci. Mi? Mi ekdeziris forporti de li iom da feliĉo

pro envio, mi ekdeziris ŝin ami, ŝin posedi, ŝin forrabi el liaj manoj, krevigi lian koron, venenigi al li la vivon. Kial, kial? Ĉu mi havis la rajton eĉ ekpensi pri ŝi, ĉu mi ĝin havis? Neniel! El la ungegoj de la morto mi ŝin eltiris, el la ungegoj, kiuj preskaŭ kaptis ŝin. Kaj de la morto mi volis ŝin forrabi por mi. Por kiu alia? Ĉu por li? Vere, por mi mem, por la plej granda egoisto de la mondo. Mi sugestis al ŝi, ke ŝi ekamu la vivon, nur ke mi ŝin havu, ke mi ŝin posedu kaj anstataŭigu miajn revojn per realaj pasioj. Per pasioj al la virino, kiu tiom belan animon havas. Mi ekdeziris forrabi tiun animon, mi ĝin deziris sklavigi por venĝi al li, al mia unulo, kies parto mi nur estas. Kial mi trompis la morton nur pro tio? Ĉu mi volis venĝi? Ho, for tiajn sentojn, for, for! Neniam plu vekiĝu la deziro je ŝi, neniam plu vekiĝu la diablo de pasioj.”

Sur la stratoj pluvis. Per rapidaj paŝoj li marŝis. Ekhaltinte ĉe unu domo, li ekvidis ĝiajn lumigatajn fenestrojn. “Jen la domo de Memo, li ne sentas la suferojn de humiligataj kaj vipataj.” Post tiu ĉi ekpenso li pli rapide marŝis tra duone lumigataj stratoj sur la monton en sian loĝejon. Li evitis sian luksan domon apud tiu de Memo, ĉar ĝi ne plu apartenas al li, fariĝinte pro lia decido la propraĵo de Ana kaj Natalia. “Se per ĝi estus eble pripenti miajn malnoblajn dezirojn je Natalia, mi estus feliĉa,” li pensis.

Aŭtunaj pluvoj balbutis daŭre malgaje. Malvarma vento de sur malproksima monto blovis. La duan duonon de novembro povus neĝi. Tiel ankaŭ okazis, sed la neĝo rapide degelis. Dum Kristnasko ĝi denove aperis, estis sufiĉe alta, kovrante per blanka tapiŝo la teron ĝis fino de februaro. En marto aperis la unuaj signoj de printempo, en aprilo montris sin kelkaj

verdaj folioj kaj dum ĝia dua duono estis iom pli da verdaĵo. Tamen estis sufiĉe malvarme, kelkafoje eĉ devojiĝis neĝflokaj al la tero.

Ana estis dum la dua duono de aprilo ankoraŭ en Bled. Nun ŝi sidas sola kaj meditas. Tre ofte aŭdiĝas la sopiro el ŝia brusto. Ŝia, iam tiom ĉarma vizaĝo paliĝis, kvazaŭ la doloro elsuĉus la iaman freŝecon. Ŝiaj bluaj okuloj, kiuj ŝajnis tiom profundaj kiel ne-mezureblaj profundaĵoj de la maro, ne perdis sian belecon, nur sub ili aperis bluetaj rondetoj. En la okuloj estas videbla ia ruĝo, kvazaŭ la postsigno de longedaŭra ploro aŭ malsufiĉa dormado. Ana efektive multe ploris, ŝi ankaŭ malsufiĉe dormis, ĉar dum la nokto ŝin ofte vekis seka tusado. Unu fojon ŝi estis nesufiĉe vestita kaj malvarmumis.

Kial ŝi ploras?

Ĉu pro la perdita feliĉo, ĉu pro la abomeno de homoj, aŭ pro la mizero? Nek pro iu el la diritaj kaŭzoj, ŝi ja ploras pro la abomenata amo. El ŝia buŝo aŭdiĝas la ofte por ŝi neforgesebla nomo: "Armando. Armando, revenu, animo mia, mi vin pardonas." Nature, neniue aŭdas ŝian alvokon. "Armando, ne pro mi, nur pro via infano vi revenu." Li ne revenis, kvankam ŝi tre deziris lian revenon.

Tiel pasas la tagoj. Ana skribas longajn leterojn sen ia ajn rezulto. Ĉiutage ŝi sentas la alvenon de nova kreito, ĉar jam delonge komencis bati ankoraŭ unu koro; baldaŭ oni aŭdos la ploron de la infano. Poste ĝi etendos la manetojn kaj malfermos la buŝeton je mola, varma patrino brusto, por ke ĝi suĉu. Ĝi kreskos. Eble ĝi demandos pri sia patro, sed ŝi volos nenion diri. Aliaj ĝin nomos bastardo. Tion Ana timis.

Kaj, kiam efektive aŭdiĝis la ploro, ŝi kuŝis mal-

forta en sia lito, kun velkita vizaĝo. Ŝi sentis animan doloron.

La tagoj post tiu ĉi akcidento foriĝadis tre malrapide. Apenaŭ dek tagojn, post kiam ŝi donacis la vivon al sana knabeto, ŝi kuraĝis voki Natalian. Natalia telegrafis la tagon de sia alveno. Pri la helpo de Duulo ŝi nenion sciigis al Ana, ĉar li deziris tion.

\* \* \*

La vento blovas dum senstela, malhela nokto. Tute pala kaj laca Ana sidas apud sia lito, en kiu kuŝas la novnaskito. Momente la infano ekploras. Ŝi ĝin dorlotas kaj trankviligas.

Ekstere la vento hurlas, portante la malvarmon, kaj dezerta, mistika nokto etendiĝas en la tuta ĉirkaŭaĵo. Ana karesas sian infanon. Ŝi atendas iun. La horloĝo montras la dekan horon vespere. Baldaŭ alvenos la vagonaro kun atendata amikino.

Ana pensas:

“Nun venos Natalia. Tiel bona estaĵo ŝi estas. Ŝi min gratulis la unua pro la feliĉo, ne sciante, ke ŝi gratulas mian malfeliĉon, kaj poste ŝi min konsolis en mia doloro. Jen ŝi venas.”

Ŝi volis tion klarigi al sia knabeto, kiu ankoraŭ nenion komprenas. “Eble neniam li eksentos la veron pri sia patro. Mi sola kaj malriĉa malaperos en la mondo. Mi malaperos kvazaŭ steleroj dum somera nokto.” Sed ne. Ŝi levis la okulojn al la ĉielo, “min helpos tiu, kiu scias mian doloron. Tiu, kiu punas la maljustaĵojn. Ho, la Mistero kara kaj bona, se vi vere punas, ne punu tamen Armandon pro mi. Li ne scias, ke li pekas.”

Subite tre stranga deziro ekregis ŝian koron. Ŝi ne aŭdis, kiel dum la hurlado de vento eksonis fajfado de lokomotivo. Rapide ŝi vestis siajn ŝuojn kaj la ĉapon, kovrinte iom poste la infanon per ellana tuko.

“Al espersonorilo, Armando eble revenos.”

Survoje ŝin akompanis la blovado de vento, trape-  
netranta ŝian vestaĵon, malvarmiganta ŝian korpon.  
En la mallumo ŝi palpante trovis inter la aliaj boatoj  
unu malpli grandan kaj metis la infanon en ĝin. Pos-  
te ŝi malligis la boateton. Ŝi eniris en la alian boaton,  
kaj tenante tiun, en kiu estis la knabeto, ŝi volis ĝin  
liberigi de la aliaj. Pro tio ŝi ĝin ekpuŝis antaŭen.  
Dum tiu ĉi ekpuŝo ŝi perdis ekvilibron kaj tiun ĉi  
akcidenton akompanis ŝia malespera ekkrio.

Ŝi naĝis. En la mallumo nenion ŝi vidis. Portata  
de malvarmaj ondoj al la alia bordo, ŝi penis savi sin.

La vento trankviliĝis kaj iom poste eĉ ĉesis blovi  
por momento. Baldaŭ ĝi denove ekblovis, portante la  
belsonan, laŭtan voĉon:

“Ana, Anaaa.”

“Anaaaa,” aŭdiĝis baldaŭ forta vira voĉo.

Ana aŭdis la alvokojn, sed ilian ĝustan direkton  
ŝi ne povis diveni. Ĉar la vento blovis al kontraŭa  
direkto, ŝian kriadon la alvokintoj ne aŭdis.

Sur la bordo aŭdiĝis ies paŝoj kaj laŭta ploro de la  
infano. Apud la lago estis du personoj, unu viro kaj  
unu virino. La brilo de elektra laterno lumigis iun  
objekton en la lago kaj ĝin akompanis laŭta virina  
ekkrio:

“La ĉapo de Ana, ŝi dronis,” kriis Natalia kaj  
kovris la vizaĝon per la manoj.



Duulo rapide deŝnurigis unu boaton. Natalia lin sekvis. Apud la ĉapo de Ana Duulo per remilo serĉis ŝian korpon. Li enmetis kun la remilo sian manon ĝis la kubutoj en la akvon, kie li nenion trovis. Pro la malvarmecoj de la akvo iom li ekremis.

“Profundaĵo kovras ŝian korpon, Natalia,” li diris per dolora voĉo kaj ekremis. Post mallonga momento li estis apud la boateto kun la infano, kiun la vento por kelkaj paŝoj deflankigis de la bordo. Natalia elprenis la knabeton kaj demetis la tukon de sur lia vizaĝo, kisante lin.

“Mia doloro estos nun pli granda! Mi petas, ni veturu al la esperplena sonorilo. De Dio mi nenion por mi mem ricevis, nun mi provu peti por la infano.”

“Kial?” demandis ŝin Duulo kaj pro ŝia insista peto ekremis. Lia voĉo tremis, dum li elparolis sian demandon.

En la preĝejo, lumigata per la lucerno, aŭdiĝis post alveno lia voĉo:

“Deziru ni, Natalia, ke la patro revenu al sia filo kaj estu lia gardanto. Deziru ni, ke oni pardonu lin pro lia krimo kontraŭ Ana.”

Liaj okuloj pleniĝis per larmoj kaj lia tuta korpo tremis. Li aspektis kvazaŭ homo, staranta sur eŝafodo kiel kulpulo.

“Deziru ni,” aldonis Natalia, tute ne rimarkante lian teruraspektan mienon.

Singultanta sono de la sonorilo aŭdiĝis tra la muta nokto kaj ĝia preĝanta, esperplena sono, kia ĝi ŝajnis al Natalia, portata de ventoblovado, disvastiĝis tra la tuta ĉirkaŭaĵo.

Duulo tiradis la ŝnuregon tre forte, tial la sonorilo sonoris pli laŭte ol kutime. La tutan loĝantaron ĝi vekis.

Subite la sonorado ĉesis. Oni aŭdis nur obtuzan sonon kaj poste feran ektinton sur la ŝtona planko de la preĝejeto, akompanate de la ekrio de la homo.

La batilo falis sur la kapon de Duulo.

Natalia ekkriis kaj lasis la infanon sur la ŝtuparo, kondukanta al la altareto. Ŝi genuiĝis apud Duulo. Liaj lipoj malrapide moviĝadis, kvazaŭ li dezirus diri: “Pri mia propra sorto mi povis nenion klaran deĉifri en la estonto, mian morton mi ne povis eviti, sed vian belan animon, la plej amata, mi nun klare vidas. Vivu, vivu feliĉege, Natalia,” ŝajnis al ŝi, ke li diras kaj liaj okuloj, kiujn torente minacis fermi la sango, ankoraŭ momenton rigardis ŝin kaj baldaŭ por ĉiam fermiĝis.

“Miroir, Miroir, lin vi ankaŭ mortigis,” ŝi krietis. “Tamen, mi ne kredas, ke vi mortis, kara, nobla homo, vi revenos, vi revenos certe, kaj rakontos al mi pri la signifo de la sfinksoj, longe, tre longe. . .

Konvulsie ŝi premadis lian sangan kapon, flustris al li delikatajn vortojn kaj kisis lian buŝon.

Iom poste apud ŝi genuiĝis Ana. Ŝi frostetremis, vipata pli de amo, ol pro malvarmo.

Ĉirkaŭ ili staris kelkaj fremdaj, bonanimaj homoj.

(Fino de la unua parto)

# Dua parto

## I

La angla ŝipego 'The King' veturis sub la serena, per la varma suno heligita ĉielo, tra la akvoj de la Araba Maro. Vojaĝantoj sur ferdeko ludis, dum la sonoj de l' muziko estis akompanataj per la unusona bruo de maŝinoj kaj plaŭdado de la maro. Estas monato aprilo, preskaŭ je sia fino.

Sur la ferdeko kolektiĝis vera internacia publiko, en elegantaj tualetoj. Ĉiuj eblaj lingvoj estas parolataj. En tiu ĉi miksaĵo de la lingvoj, simila al la babela turo, oni sin sentas sufiĉe malagrabla. La interkomprenado sukcesas pene, duone, kaj la homoj rigardas unuj la aliajn malkonfideme. Iu malgrasa anglo ĵus ridas impertinente kun sia kunulino. Ili pri-ridis la rakontadon de iu italo, skribanta perfekte la anglan lingvon, sed parolanta ĝin malbonege. Per sia prononcado li ŝajnis ridinda al la naskitaj angloj, kiuj poste komentariis la eblecon de bona prononcado flanke de fremduloj.

Dum la sama tempo en la hejtejo estas ankaŭ tre vive. La homoj, nudaj ĝis talio, viŝas la ŝviton de sur siaj pro karbo kaj fajro nigriĝintaj vizaĝoj. Malkontente ili atendas la albordiĝon, alportontan la distron kaj forgeson pri tiu ĉi pena devo ĉe la maŝinoj. Ili interparolas, dum spirego de vapormaŝino strange interrompas ilian interparoladon kaj la varmega elvaporigo de kaldronoj brogas la korpojn.

"Jim, Bombay vin atendas, ne faru tiel malgajan mienon, feraĵoj atendas, ke vin akceptu iu negrino," moke parolas du hejtistoj al la tria, sidiĝinta sur unu krado en la angulo kaj forviŝanta la ŝviton.

“Vin atendas la miopa ĉinino kaj vi pensas, ke via gusto estas pli elektema ol la mia. Mi ne interŝanĝas bonan anglan monon por rupioj, ĝin atendas jam de longe la edzino kun la infanoj,” respondis la mokito.

Tiaj interparoladoj en ŝerca tono estas aŭdeblaj ĉe la hejtistoj, plenumantaj sian enuigan devon. La mencio de feraj kaĝoj estas la aludo al unu strato en Bombay, kun ĝiaj skandalaj publikaj ejoj en formo de feraj kaĝoj.

Inter la vojaĝantoj de la unua klaso, el kiuj kelkaj staras ĉirkaŭ la kapitano, oni rimarkas homon, kies gestoj estas tre viglaj. Atentemaj legantoj rekonis sinjoron Johano Unulo, kiu demandas la kapitanon:

“Sinjoro kapitano, kie ni nun estas? Ĉu la vojaĝo estos same tiel agrabla kiel dum la pasintaj tagoj?”

La kapitano, altkreska homo, sufiĉe malgrasa, kun preskaŭ agla nazo sur per la suno brunigita marista vizaĝo, rigardas ĉiujn ĉeestantojn gaje kaj post ioma pripensado respondis:

“Mi kredas, ke ni ĝuste transiris la kruciĝon de sesdekkvina grado kaj kvina minuto de okcidenta longitudo, kaj dekoka grado kaj kvina minuto de norda latitudo. Kelkaj sekundoj pli aŭ malpli ne ludas gravan rolon. Per ĉio ĉi, mi kredas, sufiĉe klara estas al vi nia pozicio. Ĝis Bombay, miaj sinjoroj, ne restas tro longa tempo kaj mi timas, ke pli gravaj amuzaĵoj, ol estis ĝisnunaj, ne povus esti aranĝataj. Vi devas kontentiĝi ĝis albordiĝo per tio al vi disponebla, ĉar la ŝipo, bedaŭrinde, ne estas unu parto de kontinento, ke ĉiu povus ĝin forlasi, se io ne konvenas. Cetere, mi opinias, ke en tiu ĉi naĝanta urbo vi fartas sufiĉe bone. Pri la vetero mi nenion povus profeti, ĝi ne dependas de mi,” li aldonis iom zorgeme.

De ĉiuj flankoj sekvis la aproboj. Oni laŭdis la hieraŭan bokskonkuron kaj la luktadon, kiujn aranĝis la maristoj por amuzi la vojaĝantojn de la unua klaso. La interparoloj vigle daŭriĝis kaj Unulo sin retiris. Lin ĝenis la laŭdado de ‘nobla lerteco.’ Antaŭ liaj okuloj aperis la maristo, kiun lia kontraŭulo perpugne ĵetis surteren. El lia nazo fluis tiom da sango, ke eĉ la kuracisto longe penis por ĝin haltigi. Tio ĉi amuzis la ulinojn, sentantaj la simpatian al kruela venkinto. Kun granda ĝojo akompanis la venkinton aplaŭdo kaj iu gracitalia hispanino saltis kvazaŭ kato de sur sia loko, kisante publike la venkinton sur la lipojn. Kion ŝi diris? “Jes, domaĝas, ke vi estas maristo, sed kreita vi estas por torero<sup>1</sup>, ĉe ni en Hispanujo vi povus brile daŭrigi vian veran karieron.”

El ĉiuj sinjorinoj helpis al la venkito nur unu, pli aĝa sinjorino, verŝajne patrino de kelkaj infanoj. Ŝi certe estis patrino, ĉar nur la patrinoj povas senti kompaton je fremdaj infanoj, ne havantaj patrinon en momento de malbela, sanga akcidento.

“Mi estas sur la vojo trovi la ĝustan veron. Tamen mi trovas nur la krudaĵojn de la vivo! Pli multe ol la belecojn,” flustris Unulo. “La homoj laŭdas la fortecon de la korpo, kvazaŭ estus ankoraŭ la sezono de herooj-kavaliroj kaj profesiaj duelistoj de mezepoko. Ilin oni tiam pritraktis veraĵoj, donantaj la ekzemplon al la aliaj, kia la homo devus esti, dum sur bruleŝafodoj ĝemis Galileoj<sup>2</sup> kaj beste estis

---

<sup>1</sup>Hispana nomo por luktanto kontraŭ virbovoj, esperantlingve: toreadoro.

<sup>2</sup>Galilejo Galilei, sciencisto, konstantinta, ke la tero turniĝas ĉirkaŭ la suno. Fama pro sia eldiro: ‘Tamen ĝi moviĝas!’ (Ndlr: Unulo eraras. Galilejo neniam estis kondamnita je brulŝtiparo, sed nur je domaresto, ankaŭ ne pro sia astronomia aserto, sed nur, ĉar li ne volis difini tion scienca tezo,

turmentataj la ceteraj herooj de la spirito per nekredeblaj turmentiloj de la inkvizicio. La tempoj ne ŝanĝiĝis, kvankam hodiaŭ oni ne bruligas Galilejojn, sed ilia gloro dum la vivo estas pli malgranda ol la gloro de korifeoj de la boksado.”

Unulo staris sur la antaŭa ferdeko, rigardanta en malproksimon. Ĉie estis la serena ĉielo, ĝis kien oni povis vidi, nur ĉe la horizonto, tie ĉe ŝajna kuniĝo de la maro kaj la ĉielo, estis videblaj malhelaj konturoj, similaj al nuboj. Post mallonga tempo Unulo konstatis, ke la nigraj konturoj, en la nordorienta direkto de la ŝipo, estas efektive la nuboj. Ŝajnis, ke ili kreskas el la maro kaj leviĝas al la ĉielo, kreante diversajn fantaziajn figurojn. Li vidis la kapitanon sur la ponto por komando, de kie li rigardis la saman vidaĵon, atentigante pri ĝi la oficiron. Ili decidis ion gravan, ĉar post kelkaj momentoj aperis el la interno de la ŝipo kelkaj maristoj, preparantaj sin por ordigi la ferdekon kaj dekroĉi la streĉitajn eltolajn tukegojn, servantaj por ŝirmi la vojaĝantojn de la suno. Ili ne rapidis, farante nur la necesajn preparojn, dum la kapitano kaj lia oficiro ankoraŭ serioze parolis. Baldaŭ la kapitano forlasis la komandponton, malsupreniĝante al kelkaj vojaĝantoj. Kun ili li parolis, dum muzikistoj kun siaj instrumentoj retiradis sin en la internon de la ŝipo. Iom post iom ankaŭ la pasaĝeroj foriradis kaj, kiam sur la ferdeko restis nur malmultaj, la maristoj tre rapide malsuprenigis la ŝirmilojn, tiel ke post kelkaj minutoj ĉiuj kuŝis sur la planko. Faldiginte ilin per fabela rapideco, ili malaperis en la internon de la ŝipo. Unulo rimarkis, ke preskaŭ neniu pasaĝero plu troviĝas sur la ferdeko. Ĉiuj retiriĝis, ĝis li sola sidis sur la antaŭa ferdeko,

sed insistis je ĝia definitiva scienca vero.)

rigardante nigrajn nubojn pli kaj pli proksimiĝantaj al la ŝipego.

“Ĉu pluvos?” demandis li la mariston, kiu proksime de li ordigadis la seĝojn, metante ilin en unu aron, dum la aliaj ilin forportadis en la ŝipon.

La demandon li devis ripeti, ĉar la maristo tuj ne komprenis.

“Mi povas nenion scii, sinjoro, ĝi estas la afero de oficiroj. Cetere, ankaŭ mi vojaĝas la unuan fojon al tiu direkto. Tamen, ĝi similas al ventego, aŭ io simila,” respondis la maristo al lia dua demando.

Unulo leviĝis kaj observis laŭlonge kaj laŭlarĝe la ŝipon, kvazaŭ li volus ĝin mezuri. “Ĝi havas almenaŭ kvardek metrojn,” li kontente konstatis post mallonga meditado. “Fine, oni povus perdi nur la vivon, nenion plu, en la plej malfavora okazo.”

Li ne ŝatis ŝercajn eldirojn, kvankam li unu ĵus uzis. Iom poste, mallevinte la rigardon de la nuboj, kiuj alproksimiĝadis rapide por baldaŭ ŝirmi la brilan sunon, Unulo elpoŝigis sian horloĝon: “Jen, estas jam la sepa.” Li tenis la horloĝon ankoraŭ en la mano kaj daŭrigis: “Pasis iom pli ol naŭ monatoj de post mia foriro el la lando kaj mi ne reguligis mian horloĝon. Ĝi ankoraŭ montras la mezeŭropan tempon. Montru ĝi laŭvole,” li aldonis enpoŝigante ĝin. “Tute egale estas, kioman tempon ĝi montras. Dum la kelkmonata vagado tra Afriko min ne interesis preciza tempo, ĉar mi ne sentis la bezonon je tio. Fine, kion signifas la tempo? Io ekzistanta inter du akcidentoj. Por mi estas malgrava afero, kiom da tempo pasis inter du diversaj akcidentoj. Krome, la ŝipanoj sonorigas por alvoki al tag- kaj vespermanĝo laŭplaĉe. Jam nun ili invitas al vespermanĝo, kvankam helas la tago, nur

la nuboj donas la iluzion de la vespera krepusko, minacante ŝirmi la sunon antaŭ ĝia kuŝiĝo.”

Kiam la sonorilo, invitanta al vespermanĝo, eksonoris la trian fojon, la horizontoj estis de ĉiuj flankoj kovritaj de nuboj. Oni eksentis pli viglan spiron de l' vento, kun ĝi pli viglan ondiĝadon de la maro. Tamen estis ondoj, kiuj fariĝis pro la naĝado de la ŝipo, ankoraŭ pli grandaj ol tiuj fariĝantaj pro ventoblovado. La ŝipo fiere tranĉis la maron, restigante post si blankan, serpentsimilan, longan linion, kvazaŭ iu monstro fulmorapide moviĝadus tra la ŝaŭmanta maro. La akvo ŝprucis kelkafoje sur la antaŭan ferdekon kaj ĝiaj gutoj glitis malrapide tra truetoj de ŝmirita planko en la maron. Malantaŭ la ŝipo saltetis el la maro strangaj bestoj, ludante sur marnivelo kaj post momento perdiĝante en la profundaĵon. Unulo kredis rekoni delfenojn, la petolulojn de la maroj. Li eraris, ili ne estis videblaj, nur ondiĝadis la maro kaj kelkaj ondoj ŝajne salte moviĝadis, vivigante en lia fantazio la aperon de delfenoj, tiom ofte vidataj dum brilaj sunotagoj.

Perokule akompanante la mirindan dancadon de la ondoj kaj aŭskultante la murmuron de la maro, li preskaŭ forgesus, ke estas la lasta momento por vespermanĝi, se unu maristo lin ne admonus:

“Ne tiel agrable estas tie ĉi, sinjoro. Ne brilas la hela suno. Krome, vi forgesis, ke la vespermanĝo komenciĝis. Pardonu mian admonon, mi ne parolus, se la kapitano ne ordonus, ke ĉiuj pasaĝeroj nepre iru internen. Post mallonga tempo la ondoj pligrandiĝos, la vento ekblovegos.”

Senvorte Unulo malsupreniris en la manĝejon de la unua klaso, kie la kapitano amuzis kelkajn pli junajn, elegante vestitajn sinjorojn, per la rakontado



el marista vivo. Tie estis du angloj, unu franco kaj holandano, apud kiuj li sidiĝis. Ilin Unulo ekkonis la unuan tagon post la foriro el Kairo, interŝanĝinte kun ili ĝis nun nur kelkajn plej kutimajn frazojn. La rakontoj de la kapitano ankaŭ lin interesis, tial li petis ripeti kelkajn frazojn, ĉar kelkfoje li ĝuste ne komprenis, pri kio temas. La samon petis ankaŭ la franco kaj holandano, ĉar ĉiuj posedis la anglan lingvon nur malplene. La kapitano tre volonte ripetadis la koncernajn frazojn, eĉ pli ofte ol estis bezone, akompanante ilin per gestoj kaj ridetante kun siaj kunsidantoj. La muziko ankaŭ ludis. Inter paŭzoj, daŭrantaj ĉirkaŭ dek minutojn, la pasaĝeroj aŭskultis radiosciigojn de iuj anglaj stacioj. Poste la kapitano klarigis, ke la sciigoj, akceptitaj dumtage per radiotelegrafo, estas nur nun komunikataj al la pasaĝeroj, kaj ke tion ne emisias anglaj radiostacioj, sed la propra stacio de la ŝipo. Tiamaniere efektiviĝis la ideo de nepresita gazeto ankaŭ sur ŝipoj, kiuj troviĝas malproksime de kontinentoj. “Kaj jen, pri kio ni antaŭ kelkaj jaroj eĉ ne songis, la gesinjoroj povas telegrafi, kien ajn ili volas. Se estas bezone, vi povas ricevi post kelkaj horoj la respondon el via hejmo. Ĉio ĉi prezentas la grandan komforton sur mia ŝipo,” aldonis grave la kapitano.

“Tial mi veturas per anglaj ŝipoj,” respondis flate la franco.

“Se tio ĉi ne ekzistus, mi veturus nur per anglaj ŝipoj,” base rimarkis unu el la angloj.

Unulo ekridis, dum holandano restis tute trankvila, ne dirante eĉ unu vorton.

Tiumomente aŭdiĝis en la manĝejo la sonorileto. La kapitano leviĝis, svingis per mano al la muzikistoj kaj rapide, preskaŭ kurante, eniris en la kajuton

de telegrafistoj. La muzikistoj laŭte ekludis viglan marŝon. Apenaŭ rimarkeble renversiĝis kelkaj glasoj sur la tablo. Kelneroĵ rapidis, metante ĉiujn glasojn en metalajn ingojn, por ke ili plu ne renversiĝu.

Unulo rimarkis la kaŭzon de renversiĝo de la glasoj, leviĝis kaj foriris en sian kajuton. Sidiĝinte en la apogseĝo li rimarkis, ke la ŝipo sin lulas pli ol kutime.

“Tie ĉi estas ĉio tiel lerte aranĝita, por ke la pasaĝeroj ne divenu, ke la ŝipo ne plu estas tiel sekura kiel antaŭ kelkaj horoj. La kapitano estas trankvila, kvazaŭ plej sekura estus lia ŝipo, tiu ĉi eta ŝelo dum la vera furiozeco de la maro, povanta ĝin senĝene forgluti. Kvankam ŝajne trankvila, certe li pensas pri siaj edzino kaj infanoj, pri kiuj li hieraŭ rakontis entuziasme. Certe li tremas pro ilia estonteco, aktorante sur la ŝipo la rolon de la plej senzorga pasaĝero. Vere, la homo devas havi tre firman karakteron por povi pensi pri la aliaj pli multe ol pri si mem. Nur ne ĉiuj homoj estas kapitanoj-maristoj. Zorgante unue pri la sekura vivo de la aliaj, poste pri sia propra, povas nur malmultaj, tial la vivo ne estas tiom agrabla kaj la historio ne pasis sen sangaj militoj.”

Pli vigla balancado de la ŝipo, sed konstanta kaj kvazaŭ laŭtakta, instigis lin fermi la okulojn kaj re-  
vi pri si, pri siaj konatoj kaj pri ĉio al li kara. En la revoj la pensoj lin forportis malproksimen en la hejmon, hodiaŭ dezertan, en kiu loĝas nur la malnova servistino, servanta tie ankoraŭ dum la vivo de la gepatroj. La patro, tipa slavo, grandanima homo, al kiu plaĉis la tuta mondo. La patrino, delikata estaĵo, kun subtilaj sentoj kaj fantazio, viva libro de rakontoj, vera poetino. La rememoro pri tiuj du estaĵoj, vivintaj konkorde, sen iuj disputoj, kiom li memoris,

ravis lian animon. Per pensoj li vizitis iliajn tombonjn, tre vivaj en lia fantazio, kun bela monumento de li starigita. Tamen, pli firma ol la monumento en centra tombejo estis en lia animo la sento de dankemo por ĉio heredigita al li. La tutan delikatecon, ĉiujn belegajn sentojn, kiujn povas heredi nur la virino super la virinoj, la patrino al sia infano, li travivadis tie ĉi sur la ŝipo ankoraŭ foje. La patro, rakontinta pri estintaj militoj kun doloro en la animo, parolis pri teruraspektaj kadavroj kaj pri la buĉejoj, ekstantaj dum freneza batalo. Tiaj estis la rememoroj, kiuj per doloro vundis lian animon kaj Unulo kunsentis la kompaton, revinte kun li pri ĝenerala frateco de ĉiuj homoj. Tiun ĉi senton de frateco plifirmigadis la komuna lingvo de la gepatroj, parolintaj Esperanton kaj donintaj al li la okazon vivi en la spirito de la lingvo, pledanta tiel laŭte por estonta harmonio de la tuta homaro. La konatoj nomis siatempe la patron utopiisto, kiu kredas, ke per Esperanto ĉiuj povus interkompreniĝi. Por pruvi al ili la kontraŭon, li menciis kiel ekzemplon la patrinon, la virinon de la alia raso, kun kiu li povas paroli pri la plej belaj kaj profundaj sentoj kaj plej altaj temoj. Li menciis ankaŭ la malgrandan homon, sed en la spirito grandegan Majstron, kies viva vorto fluis kiel balzamo kaj estis komprenata tra la tuta mondo ĝuste kaj plej precize. Li menciis la entuziasmon de kongresanoj dum la unua kongreso en Bulonjo, esprimante sian konvinkiĝon pri la estonto de Esperanto. Unue ili ne volis lin kompreni, ne aliigante sian opinion pri la neebleco de tia projekto. “Jes, de tia, sed ne tiu ĉi.” La kompatinda patro, kiom da mokoj li devis toleri, tamen ne kolerante je tiuj homoj, pardonante al ili senlime kiel Kristo. “Ili ne kredas,” li parolis. “Mi,

filo mia, kredas, via patrino kaj vi kredas. Ni persistu sur tiu ĉi vojo kaj la venko apartenos al ni. La ideo torento disvastiĝas, alproksimiĝas al ĉies koro. Estas ĝi kiel grandega nubo dum somera sekeco, kiu iutage elverŝos sian refreŝigan pluvon sur la pacosoifan kaj turmentatan homaron.”

Mirindaj estis la sentoj de la patro kaj revema spirito de la patrino desegnis en la fantazio malproksiman landon Esperantujon, regatan de eterna harmonio, en kiu ĉiuj homoj senescepte fariĝas veraj homoj. Ŝia spirito ne haltis nur ĉe tiu ĉi projekto, ĝi imagis nur unu lingvon sur la tuta terĝlobo, krom kiu plu ekzistas neniu. Por ŝi ne ekzistis la limoj inter la ŝtatoj, nek tiuj inter la popoloj. La projekto estis unu el tiuj fantaziaĵoj, kiuj por nedefinita tempo estas tute neefektiveblaj, sed kiuj nepre realiĝos. Ĉio tio estis la sentoj, ĝermantaj profunde en la animo, kaj ŝia fantazio per etaj literoj konfidis al la papero siajn projektojn. Nun ili ankoraŭ kuŝas kiel la heredaĵo post ŝia morto. Li intencis ĉion publikigi, doni al la mondo pristudi la projekton, kio ne efektiviĝis, tial la skribaĵo restis manuskripto. “Ĉu ne estus por nun peko aperigi la ideojn de brila spirito, dum homoj vivas en ĥaoso de malamo kaj en sia malamo ĵetus la ŝtonon sur la projektanton, kuraĝintan profeti por la mondo alian ordon, ol estas la ĝisnuna?”

Unulo ĉesis mediti pri siaj gepatroj, promesante al si denove, ke tiujn ĉi sentojn li flegos ĝis la fino de sia vivo kaj laboros por ilia efektiviĝo.

Lia fantazio transiris en mirindan, sunoplenan landon apud la maro, kie la naturo odoras je freŝeco. Tie malproksime, en vespera krepusko, kuŝas la malgranda domo en la ĝardeno. De malproksime estas

aŭdebla kantado kun akompano de gitaro. En la ĝardeno sidas li, apude eta, orehara knabino. Ŝtona estas la benko, sur kiu sidas la geamantoj unu apud la alia, frustrante senfine pri la amo, pri la feliĉo. Li enskribas la poemon en la albumon sur la lasta paĝo. Ŝi fermas la libron dirante: “Tio ĉi estas la lastaj linioj, kiujn la albumo akceptos.” Ankaŭ estis tiel. Post kelkaj jaroj denove sekvas la revido. Tiam estas la ekskurso per la ŝipo kaj li ne povas al ŝi diri sian amon buŝe, tial li skribas la vortojn: “Mi amas vin.” Ŝi kun milda voĉo respondas: “Ni vidos, kiom da vero estas en viaj vortoj.” Pri tiu ĉi frazo li devis nun pli longe mediti. Depost ĝia eldiro pasis jam naŭ jaroj, sed ĝi restis viva en lia memoro, kvazaŭ ĝi estus nun dirita. Pro la rememoro el lia buŝo eliĝis la sopiro: “Mi entombigis vin, mi devis vin entombigi kaj ne ĝui la amon kun vi, sed vi brilas en miaj rememoroj kiel iam. Kun indigno mi kraĉus en la vizaĝon al ĉiu, kiu dirus pri vi al mi eĉ unu malbelan vorton.” Li amis tiun knabinon, forgesinte ŝin neniam. Li meditis pri ŝi kiel pri sanktaĵo, li rememoris ŝin dum belaj kaj malbelaj momentoj de la vivo.

Poste reaperis en lia fantazio Armando Miroir kaj Ana. En la kapoj sonis la vortoj de Natalia pri ilia sorto. “Stranga homo estas Miroir, li foriris, forgesis ŝin kaj amuzas sin kun la aliaj ĝuste en la momento, kiam lia helpo estus al ŝi necesa, almenaŭ pro la homoj. Eleganta, sprita, ŝajne delikatsenta, sed tamen tiel kruela kontraŭ Ana.” Kvazaŭ li aŭdus lian voĉon el buŝo de la franco, tiom flateme esprimanta sian laŭdon pri la angla ŝipo, al kiu fiere respondis naskita anglo, fierega pri ĉio angla.

“Pri Miroiroj, ekzistantaj en ĉiuj partoj de la mondo, oni ne devus mediti. Multnombraj ili estas,

ne konsiderante, al kiu nacio aŭ raso ili apartenas. Oni povas ilin trovi ĉe romanoj, germanoj, slavoj, hebreoj, mongoloj, negroj k.t.p. Se ekzistas ili, ekzistas ankaŭ sennombraj knabinoj kiel Ana, nur ekzistas malmultaj Duuloj kaj knabinoj kiel Natalia, oferantaj sian bonan reputacion, pardonante samtempe al la aliaj pekojn.”

“Duulo?” demandis sin Unulo. “Kial li riskis sian havaĵon, pli bone, donacis ĝin? Kial Natalia kaj li estas bonaj amikoj kaj kial mi ne estas ĵaluza pro tio? Mi ne envias la homon, kiu havas tiom da feliĉo, ke li povas restadi apud ŝi, tiel bona kaj bela animo, kia estas Natalia. Tute ne, mi ne envias kaj ne estas ĵaluza je li. Eble tial, ke ni estas tiel proksimaj unu al la alia, kvankam ni neniam interparolis? Foje mi volis alparoli lin kaj alproksimiĝi al li. Anstataŭ proksimiĝi mi malproksimiĝis. Sur la lipoj restis rigidaj la vortoj: “Sinjoro, ni ne interkonatiĝis ankoraŭ.” La vortoj ne estis elparolitaj, kvankam mi penis tion fari! Mi eksentis, ke iu nekonata forto ne permesas tion kaj ke li foriras, kvankam li mem penas turni sin al mi. Strangaĵo. Poste, kiam Natalia malbone komprenis miajn vortojn en la malnova kastelo, mi eksentis, ke mi parolas kun ŝi tiun tagon la lastan fojon, se mi ne atentos ĉiun ŝian paŝon. Konscia pri tio kaj tute konvinkita pri ŝia malbela ago, tamen mi ne sekvis ŝin. Senzorge mi eniris en la rondon de la ludantoj, dum li ŝtelkaŝe sekvis ŝin anstataŭ mi kaj poste eliris ŝin el la ungegoj de la morto. Por si aŭ por mi? Por mi, certe por mi, ĉar Natalia skribas, ke ŝi amas min, atendas nur min. Ŝi certe ne ludas false, ŝi eĉ ne povus, ĉar bonanima, sincera kaj afabla estaĵo ŝi estas. Se ŝi okaze mortus, en mian animon enpenetrus laciga ŝarĝo, ĉar mi estus kulpa, kvankam mi ne

povis aliel fari. Jes, tiel estus, mi bedaŭrus ŝin, sed neniam forgesus. La morto neniam povas forgesigi al la vivantoj la personojn, kiujn ili amis per sia tuta animo sincere. Cetere, la morto, tiu ponteto, gvidanta al la alia mondo, neniam forgesigos la volon por la vivado interhoma.

Ho, Natalia, kial vi skribas sincere pri ĉio okazinta al vi? Kial vi skribas, ke malgraŭ riĉeco vi ne estas feliĉa? Vi havas palacon, sed ne la feliĉon. Tamen, konsolu vin, kiom da ili ekzistas kun palacoj kaj sen feliĉo. Ŝajne ili estas gajaĵ, kvankam en ilia animo la vermo de malfeliĉo daŭrigas sian detruigan laboron. Tial pacienciĝu ankaŭ vi.”

En la meditado Unulon ekĝenis subita ventohurlado, kvazaŭ ekfajfus dek lokomotivoj kune. La ŝipo forte ekbalancis kaj preskaŭ li estis ĵetita el sia apogseĝo. Ekstis fortega ventego, sentebla ankaŭ en la interno de la ŝipo, dum ekstere sur la ferdeko verte la mastoj tremis pro la blovado de la vento.

Unulo vestis pluvmantelon kaj eliris en la koridoron. Tie li ne povis senĝene paŝi, la planko eliĝadis el sub la piedoj, ĉar la ŝipo balanciĝis. Tamen li sukcesis veni ĝis la fino de la koridoro, kiam subite unu ondego per plena forto ĵetis la ŝipon, tiel ke ĝi ek-tremis kvazaŭ nuksoŝelo. Unulo eksentis, ke iu forto lin levis kaj ĵetis sur la plankon. Rekonsciĝinte post kelkaj sekundoj, li leviĝis. Mekanike li elpoŝigis sian horloĝon, tenante sin forte je unu hoko. “Apenaŭ pasis dudek du horoj. Tamen, kial pensi pri la tempo en tia situacio?” Stariginte al si la demandon, li eĉ ne provis ĝin solvi, ĉar iu ŝajna voĉo flustris per ordona tono, ke li eliru sur la ferdekon. “Kion fari tie, ekstere estas malvetero?” ŝajnis, ke demandas la alia voĉo, la voĉo de la dua ‘mi’, zorganta instinkte pri la

vivo. “Sur la ferdekon, sur la ferdekon,” ripetis Unulo duonvoĉe kaj supreniradis la ŝtuparon. Proksime de la ŝtuparo staris la kapitano, tenante sin forte je unu kroĉilo. Li rimarkis Unulon, demandante lin pri la kialo de la eliro el la kajuto, sed baldaŭ lin surprizis la ago de tiu ĉi, ĉar li senvorte supreniradis la ŝtuparon.

“Sinjoro, ne eliru, ne eliru, je via vivo,” ekkriis la kapitano. Unulo ne atendis liajn vortojn kaj provis malfermi la pordon, kondukantan al la ferdeko. Volinte bari al li la vojjon, la kapitano lin ektiris je mantelo. Tiun momenton Unulo sukcesis malfermi la pordon kaj unu grandega ondo ruliĝis en la koridoron. La kapitano lasis lin, ektirinte por momento la brakojn al si, dum la pordo post Unulo kun bruego fermiĝis.

“Li foriris por trovi tute certan morton. Dubinde estas, ke mi plu povis helpi,” grumblis la kapitano kaj revenis en la koridoron. Baldaŭ li ion ordonis al kelkaj maristoj. Tiuj ligis unu kamaradon per ŝnurego, elŝovante lin tra la pordo sur la ferdekon. Tiuokaze la nova ondo ruliĝis laŭ la ŝtuparo en la koridoron. Preskaŭ pasis kvin minutoj, ĝis la maristoj retiris la ŝnuregon kun duone svenita kamarado.

“Sinjoro kapitano, la ondoj sin ĵetas trans la ŝipon pli altaj ol sur la meza ferdeko ĉe komandponteto, tial mi nenion povis vidi. Krome, densa nokto regas ekstere. Ŝajnas, ke la ŝipo estas sub supraĵo de la maro. La sinjoron mi ne vidis, ankaŭ neniun vivan estaĵon,” raportis la maristo.

“Ĉu ankoraŭ foje ni vin elĵetu?” demandis la kapitano.

“Se vi ordonas, sinjoro komandanto.”



“Tamen, ni lasu tion ĉi, neniu viva estaĵo povus neligita resti sur la ferdeko,” li rediris kaj per iom tremantaj paŝoj eniris en la manĝejon.

Kiel per senfadena telegrafo la sciigo pri la akcidento vagis de unu kajuto al la alia, tial multaj pasaĝeroj maltrankviliĝis kaj alvenis duone vestitaj en la manĝejon. La kapitano ilin atendis ridentante:

“Gesinjoroj, kredu, ke minacas nenia danĝero al la ŝipo. Mi ĵus revenas de la komandponteto. La ŝipo ne estas difektita kaj post iom da tempo, eble post kelkaj minutoj, la uragano malaperos, la vento jam nun pli malforte blovas. Estu sekuraj en la ŝipo, dormu trankvile. Tial mi petas, revenu ĉiuj en la kajutojn. Tiu sinjoro, bedaŭrinde, pereis, ĉar neniu vivanto povus elteni sur la ferdeko en tia furiozeco de la maro. Restas nur unu eliro, preĝi por la savo de lia animo, miaj gesinjoroj.

Dum kelkaj sinjorinoj genuiĝis, la sinjoroj klinis la kapojn, pripensante por momento la sorton de la homo, kuraĝinta obstini al la furiozeco de la naturo.

\* \* \*

Unulo tamen estis sur la ferdeko. Unu ondego lin ĵetis tuj post la eliro sur la malantaŭan ferdekon. Kuŝante sur la ventro, li fortege ĉirkaŭprenis unu maston, restinte tiel kelkajn minutojn, dum la ondegoj ĵetadis sin trans li. Sala akvo, konstante batante lian vizaĝon, ne permesis al li havi malfermitajn okulojn. Li fermis ilin. Tiumomente li eksentis, ke sub li la ŝipo pereas. Ĉirkaŭ li okazanta sinĵetado de la ondoj estis tute nerimarkebla por li. Kiel en kalejdoskopo ekturniĝis antaŭ liaj animaj okuloj la maroj, montoj,

valoj, vilaĝoj, urboj, kampoj kaj arbaroj. Fine aperis maltrankvilega lago de Bled. Sur la insulo estas malgranda kapeleto, de kies turo ekeĥis la sonorileto. Unulo rimarkis Natalian kun la malgranda infano, tenanta ĝin sur la brakoj. Apud la ŝtupareto de la altaro, dekstre de ŝi, staras Duulo, tiranta la ŝnuregon. Li vidas la sonorilon, kiu preskaŭ renversiĝas pro tirado de la ŝnurego; li vidas, kiel pro balancado skuetas la batilo. Iom poste sekvis klaraj vortoj:

“Deziru ni, Natalia.”

Ŝi ripetas la samon.

Post kelkaj momentoj aperis en lia fantazio la korpo, konvulsie tremanta en mortobatalo, kaj en la oreloj eksonis la vortoj: ‘Longe, tre longe. . .’ Tuj malaperis Natalia, la preĝejo, insulo kaj lago, la arbaroj, kampoj, urboj, vilaĝoj, valoj, montoj kaj maroj. De la korpo de Duulo tra la malproksimoj flugis fosforresta, mirinda lumo, haltiĝinte fine super Unulo. La stranga lumo kvazaŭ malsupreniras de la pinto de la masto, havas neniajn priskribeblajn konturojn. Ĝi ĉirkaŭas Unulon. Li eksentas, ke tiuj strangaj radioj trapenetras lian korpon, eniĝas en ĝian internon kaj doloregas. Apenaŭ kun la lasta stranga radio malaperis ankaŭ la dolorego. La okuloj de Unulo malfermiĝis, dum la ondoj dance saltetis trans la ferdekon, sed sen la danĝero, ke ili ion forportus, ĉar uragano ĉesis, nur la pluvo torente fluis el la nuboj.

Paŝante sendanĝere, Unulo malfermis la pordon, tra kiu li eliris. Iomete li tremis pro la malvarmo kaj malsekeco. Malrapide li eniris en la manĝejon. Tie li ekvidis timemajn mienojn de la pasaĝeroj. Antaŭ ili staris la kapitano kaj konsolis ilin. Unulo iris renkonte al li: “Ĉu morta aŭ viva?” flustris la kapitano, sed

antaŭ ol li povis ekparoli, Unulo levis sian manon, dirante:

“Ne timu, la uragano malaperis post la naskiĝo de la nova vivo.”

“Kion signifas viaj vortoj?” kuraĝis la kapitano demandi, rigardante Unulon suspekteme.

Unulo tute konsciiĝis, respondante:

“Nenion apartan, sinjoro kapitano. La uragano ĉesis. Blovas nur iom pli forta vento, sed mi estas feliĉa, ke mi kiel poeto havis la okazon vidi la furiozecon de la naturo de la sama loko, sur kiu staris neniu viva maristo dum tia malvetero.”

Liaj okuloj strange ekbrilis. Dum gratulis kelkaj el la pasaĝeroj, ke li savis sin, el unu grupo alpaŝis tiu sama hispanino, kiu tiel kuraĝe kisis publike la venkinton-mariston. Li delikate forpuŝis ŝin, dirante per pura andaluzia elparolo:

“Hermosura<sup>3</sup>, vi min ofendus, starigante min sur la nivelon de la venkinto-maristo, tial mi ne permesas, ke vi min kisu.”

Ŝi kapklinis kaj ekflustris:

“Pardonu, stranga estas la sento, kiu min devigas agi tiamaniere en momentoj de entuziasmo. Permesu almenaŭ premi vian manon.”

“Esti sklavo de siaj sentoj pruvas la malfortan volon por bridi sin mem. Tamen, tio ne ĝenas, krom vi ankoraŭ multaj havas simildajn erarojn.”

“Ĉu vi estas predikanto?” demandis ŝi mallevante la rigardon.

Li ne respondis kaj ekparolis kun la aliaj.

---

<sup>3</sup>Hermosura estas hispana vorto signifanta belecon.

II

La ŝipo albordiĝis en haveno, en kiu estis tre granda trafiko. La amaso da homoj elŝovis sin el la ŝipego, kiu venkis la obstinecon de la uragano. La bela hispanino adiaŭis Unulon sur la ferdeko, akompanante lian foriradon per flamantaj okuloj. Ŝi bedaŭris, ke li rifuzis ŝin akompani ĝis la loĝejo, kie ŝi deziris lin prezenti al siaj konatoj. Li rifuzis, akcentante, ke oni lin ankaŭ atendas, pri kio li ne estis tute certa.

Strangaj sentoj ekregis Unulon dum li eliradis, tiel ke li ne rimarkis, kio okazas ĉirkaŭ li. La homoj lin puŝis antaŭen. Li iris kun la aliaj, apenaŭ tenante sian valizon en la mano. Ĝin li devis kelkafoje eltiri inter la korpoj, premantaj unuj la aliajn.

“Ĉu li trovos min, ĉu li rekonos min?” li demandis sin konstante, meditante pri Abu Kazen, doninta al li la rekomendon en Egiptujo. Tiam li ankaŭ promesis, ke per siaj konatoj li trovos konvenan akompananton por Unulo tra la lando.

Elirinte el la amaso, Unulo sin sentis pli libere. Oni lin plu ne ŝovis. Apud unu kolono li rimarkis tipan vizaĝon de iu hindo, rigardanta antaŭ sin rigide. Li observis lin kelkajn momentojn kaj la hindo per malrapidaj paŝoj iris al li renkonten. Levante la manon por saluti Unulon, li diris:

“Your servant, mister Unulo. I was desired to call here this morning. I am Ramigani.<sup>4</sup>

“Kiu vin sendas?” demandis Unulo.

“Granda jogano Ganeza, ni iru. Ganeza diris: ‘Atendu kaj observu ĉiujn homojn. Vi ekrigardos unu

---

<sup>4</sup>Via servisto, sinjoro Unulo. Oni min invitis veni ĉi tien tiun ĉi matenon. Mi estas Ramigani.

kun verda stelo kaj ekkonos lin.’ Mi estas feliĉa interkonatiĝi kun vi.”

“Dankon, Ramigani, tiu ĉi urbo malbone impresas min, eĉ malagrabla, bone ke vi venis. Strange estas la unuan fojon ekpaŝi sur la grundon de Hindujo.”

“Tute via afero, sinjoro. Eble ni la samon eksentas sur eŭropa grundo.”

Baldaŭ ili eksidis en unu ĉaro, kiu lamis sur la pavimo. Unulo rimarkis, ke ili veturas for de la teritorio de Bombay. Baldaŭ ili eliris el la veturilo, ekmarŝinte piede al la monteto Malabar. Bone flegataj ĝardenoj, plenaj de verdaĵo, kaj inter ili leviĝas kiel fantomoj kvin nigraj turoj, super kiuj flugas grandegaj birdoj. Kelkaj el ili sidas sur la arboj, proksime de la turoj. “Taj strangaj somerdomoj, juĝante laŭ la aspekto de la konstruaĵo,” ekspensis Unulo kaj demandis al Ramigani, kiaj konstruaĵoj estas tio.

“Dakhmas. Turoj de silento. Transdonejoj de parsoj al birdoj rabistoj. Ili kredas, ke la fajro malpurigus, se ili bruligus la kadavrojn kiel la aliaj hindoj. Tial ili alportas siajn mortintojn en tiujn turojn, por ke la birdoj ilin formanĝu. Ĉu vi deziras vidi, kiel aspektas la turoj de proksime, eble ni sukcesos ankaŭ veni en la internon?”

Unulo dankis lin, sentante frostotremon pro tiel kruela rito. Li kredis, ke eĉ povus troviĝi en la turoj iu diŝirita kadavro. Tial li kontentiĝis kun la priskribo de Ramigani pri la internaĵo.

“En la turoj troviĝas tri fakoj,” komencis Ramigani. “Unu fako servas por la viroj, la meza por la infanoj kaj la ekstera por la virinoj. Kiam la kadavroj estas enigitaĵoj kaj la alportistoj foriras, la amaso da

tiuj birdoj, vulturoj, en aroj alflugas kaj post kelkaj momentoj restas nur la ostoj.”

“Kaj la ostoj?”

“Oni ilin ĵetas en la kavojn en la interno de la turoj. Rigardu, tie dekstre, en la malproksimo, estas templo, el kiu eliĝas densa fumo, kaj ĝi estas la domo, en kiu brulas la eterna fajro de parsoj. Laŭrakonte ĝi estis antaŭ multaj jarcentoj alportita el ilia patrujo. Laŭnome mi dirus, ke ilia patrujo estis Persujo, sed, se vin interesas, pli multe pri tio povus rakonti Ganeza. Li konas ĉiujn saĝecojn kaj ĉiujn naciojn de la tero. Iam mi estis lia adepto. Kelkajn jarojn mi lin ne vidis, ne sentante min kapabla plu transdoni min al pure metafizikaj aferoj. Antaŭ kelkaj tagoj li min eligis el mia arbaro, alvokinte min al si kaj petante, ke mi servu al vi kiel gvidanto. Mi ne volis malakcepti, ĉar mi tre multe ŝatas Ganezan, la saĝulon.”

“Abu Kazen, lia malnova amiko, rakontis, ke Ganeza ne ŝatas multe paroli, ĉu vere?”

“Jes, tio estas vero. Sed, li eĉ ne devas paroli. Sufiĉas sidi apud li nenion parolante kaj malgraŭ tio oni eksentas subite la veron, trovante la respondon al tio, kion oni demandis sin mem. Stranga estas lia influo sur malsanaj homoj, kiuj lin vizitas unufoje jare. Antaŭ ol ili venas al li, ili estis ĉe ĉiuj joganoj kaj en la sankta rivero Gango, ne povinte resaniĝi. Per unu ekrigardo li sanigas la elektitajn. Ne ĉiujn, ĉar lia opinio ĉiuj ne estas la elektitoj kaj suferas tute prave.”

“Do li estas ia nova Kristo, kvankam Kristo sanigis ĉiujn kredantajn, kiuj petis.”

“Vi parolas pri tiu, kiun Eŭropo glorifikas, Jesuo el Nazareto, de kies naskiĝo vi la jarojn kalkulas?”

“Jes.”

“Mi ne scias, kion li faris, Ganeza certe scias, de li demandu la klarigon pri liaj elektitoj.”

Per tio ilia interparolado ĉesis kaj post kelkaj horoj da marŝado ili vizitis la faman joganon.

Post la vizito kaj interparolo, daŭranta kelkajn horojn, Unulo kaj Ramigani forvojaĝis. Ili veturis ĝis unu arbaro, tra kiu ili alvenis, post unu malagrabra akcidento, ĝis la dometo konstruita el vergoj. La dometo havis nenian eŭropan meblon. En unu angulo estas disĵetita sukerkano, kun iom da pajlo de rizo, kredeble la lito de Ramigani. En la alia angulo estas primitiva tera fajrujo, sen fajro. Ĉe la muroj de la dometo pendas haŭtoj de leonoj kaj tigroj, bone sekigitaj. Apud ili pendas la pafilo de Ramigani. Vidante ĉion ĉi, oni povus prave konjekti, ke Ramigani okupas sin pri ĉasado.

El la ejo, en kiun ili alvenis, kondukas tute simpla plektita pordo en la alian ejon, de kie Ramigani alportis iaspecan seĝon, proponante ĝin al Unulo. Tiu ĉi sidiĝis senvorte. Sian valizon li ĵetis sub la seĝon. Post mallonga paŭzo li ekparolis:

“Ramigani, vi savis mian vivon. El tiu kavo, kvankam vi ĝin elfosis, mem mi neniam povus eliri. Eble mi estus post kelkaj tagoj en la societo kun iu tigro, se vi ne trovus min. Pardonu ankoraŭ foje, ke mi malproksimiĝis de vi, sed kulpas mia scivolemo. Multan dankon Ramigani. La vivon oni ŝatas des pli, se minacas la danĝero por perdi ĝin.”

En la animo de la hindo, kiun agrable impresis liaj dankvortoj, ekestis agrabla sento kaj milda rideto aperis sur liaj lipoj.

“Nur mian devon mi faris. Eŭropanoj kapablas esti ĝentilaj. Tamen, ĉiam oni ne povas kredi al ili kaj ofte iliaj agoj estas tute kontraŭaj al la promesoj.”

“Vi malŝatas eŭropanojn, ĉu ne? Almenaŭ al mi ŝajnas,” aldonis Unulo scivole.

“Mi ne scias. Kiel homojn eble mi ne ŝatas ilin, alie mi nenion kontraŭ ili havus. Pardonu mian esprimon, estu konvinkita, ke tamen vi estas agrabla gasto de mi. Krome, vin akompani petis min la plej granda jogano. Li diras, estas vero, ke ĉiuj homoj estas egalaj kaj ke ni devas atenti unu la alian, estimi nin reciproke, sed mi ne kredas, ke mi persone ĉiam povus agi laŭ lia opinio. Sincere dirite, mi estas ido de la kasto de kŝatrioj<sup>5</sup>. Praktike ĝi plu ne ekzistas. Malgraŭ tio mi gardas kelkajn malnovajn tradiciojn, okupante min pri la ĉasado. Iom da tempo mi vivis en Eŭropo, kiam mi estis ankoraŭ la oficisto de la raĝo de Travankoro. Bedaŭrinde, tie mi ne povis forgesi Hindujojn eĉ por mallonga tempo, ĉar unu malagrabla akcidento revenigis min post du monatoj ĉi tien, kie mi konstruis mian dometon. Mi mortpafas tigrojn kaj la aliajn sangavidajn bestojn, kreinte al mi la profesion malŝatatan de veraj hindoj. Nome, malpermesita estas eĉ la mortigado de la bestoj. Se ĝi estus malpermesita eĉ de estro de Hindujo, mi ne obeus ĝin koncerne al la ĉasado de sovaĝaj bestoj.”

“Pri kio vi okupas vin krom tio?”

“Mi legas Vedojn<sup>6</sup> dum liberaj horoj kaj meditas, kie la granda jogano trovis la veron. Vi serĉas la saman veron, do estus bone, se vi kun mi foje legus, eble io klariĝus al vi inter la linioj. Ĉu vi eble legis?”

---

<sup>5</sup>Kŝatrio, hinda nomo por kasto de militistoj.



“Ne, Ramigani, mi ne konas la lingvon, sed mi dubas, ke en tiuj libroj kuŝas la vero. Oni la veron ne povas trovi, se la homo mem ne estas verema. Por mi estas la plej granda vero tio, kion mi sentas mem. Ĉio predikata de la aliaj, povas esti la vero por ili, ne por mi.”

“Mi aŭdis, sinjoro, viajn vortojn kaj kredas, ke en ili estas iom da saĝeco. Strangajn opiniojn havas kelkfoje eŭropanoj, ĉar malforta estas ilia kredemo. Ĉie ili serĉas profitojn, eĉ en la plej grandaj veroj. Raĝo parolis al mi unu vesperon pri iu historio de Eŭropo, kie unu sekto siatempe filozofiis, ke la celo pravigas rimedojn, kiaj ajn ili estas. En tio mi ne vidis multe da saĝeco. Raĝo tamen obeis al tio, ĉar tiuj knabinoj, foririntaj kun li el Eŭropo, ne venis propravole. Li estas mahometano, tio estas permesita al li ankaŭ tie ĉi. Tamen mi ne kredas, ke tia ago estas bela, kvankam ĝi koincidas kun la dogmo de tiu eŭropa sekto. Kion vi opinias?”

“Ne estas bele, Ramigani,” respondis vigle Unulo. “Ne ekzistas celo, kiu povus pravigi la aplikatajn rimedojn, se ili estas kruelaj.”

Pro tiuj vortoj la okuloj de Ramigani ekflamis. Baldaŭ li ekregis sin, tiel ke Unulo ne rimarkis la strangan brilon en liaj okuloj. Tamen, laŭ la sono de liaj vortoj li divenis, ke Ramigani kaŝas ion en sia animo. La nomon de la raĝo li ne elparolas per kutima voĉo, io venĝema tremetas en ĝi ĉe la mencio de lia nomo.

---

<sup>6</sup>Vedoj estas parto de la sanktaj libroj Upaniŝadoj, destinitaj nur por bramanoj.

Parolante ankoraŭ ion pri la rezonado de jezuitoj, ili priparolis kelkajn pli realajn aferojn. Ramigani devis rezigni pri la ĉasado kaj dediĉi la tutan tempon al Unulo, kiu ekloĝis provizore ĉe li. En la unuaj tagoj Unulo instruis al Ramigani Esperanton, por ke ili povu siajn pensojn pli klare esprimi. Ramigani lin instruis pri la urduo, liaopinie la plej disvastigita lingvo de Hindujo. Tio ĉi estis sufiĉe pena laboro, ĉar Unulo malrapide memoris arabe-persajn kaj sanskritajn vortojn, el kiuj la lingvo konsistas. Kun Esperanto estis la afero tute alia. Ramigani post kelkaj tagoj balbutis multajn frazojn, dum Unulo sciuis apenaŭ post unu jaro tiom da urduo, kiom Ramigani posedis Esperanton dum unu monato kaj duono. Ramigani konis ankaŭ la hindi-lingvon, sufiĉe bone la guĝaratan kaj sanskriton, kiuj ĉe la lernado de Esperanto malmulte helpis, samkiel ne helpis al Unulo la scio de kelkaj eŭropaj lingvoj en la lernado de la urduo. Kion Unulo mem ne povis, helpis Ramigani, tiel ke la poeto ekkonis ĝenerale ĉion skribitan en Vedoj. Li pristudis ankaŭ la malnovan leĝon de la unua hinda leĝodoninto Manuo, nomata Manavadharmazastra. Unulo de Ramigani certe aŭdus la enhavon de ĉiuj dek ok Puranoj,<sup>7</sup> se ili restus multajn jarojn kun. Por tio la poeto ne havis sufiĉan tempon.

Vere dirite, religiaj aferoj ne estis tiom interesaj por li kiel la altvaloraj Mahabharato<sup>8</sup> kaj Ramajano<sup>9</sup>.

---

<sup>7</sup>Puranoj estas mitologiaj libroj de malnovaj hindoj, destinitaj plejparte por la popolo.

<sup>8</sup>Mahabharato, nacia eposo, enhavanta ĉirkaŭ cent milojn da duoblaj versoj.

<sup>9</sup>Ramajano, nacia eposo, temanta pri bataloj de reĝido Ramamandra pro lia edzino Sita, skribita en la kvara jarcento antaŭ Kristo.

Jam de la komenco li kaj Ramigani ekŝatis unu la alian kaj poste ili vizitis diversajn famaĵojn de la lando. Nur unu deziro estis neplenumita. Nome, la poeto deziris viziti Lhason, kion ne povis al li ebligi Ganeza, ĉar li havis neniajn bonajn konatojn inter la budhistoj.

Kelkajn tagojn post la alveno en la dometon de Ramigani, Unulo skribis la leteron al Natalia, al kiu li jam delonge devis respondi.

*Arbaro de Ramigani, en majo*

*Kara mia Nanjo,*

*Mi promesis al vi skribi, tuj kiam mi restos en iu loko pli longe. Vi pardonos al mi, ke mi la lastan fojon skribis antaŭ unu monato el Kairo.*

*Mi ne scias, ĉu vi meditis pri la mirindaj sfinksoj, priskribitaj de mi, kiuj tiel klare, kvankam mutaj, parolas: "Gardu vin, vojaĝanto, de sovaĝaj bestoj, venenaj serpentoj, rabobirdoj kaj malbonaj virinoj." Mi gardis min de tio kaj ne suferis pro tiuj malbonaĵoj. Mi evitis ĉiujn malfacilaĵojn kun helpo de la raviga araba scienculo Abu Kazen kaj fine mi alnaĝis al la mirinda lando Hindujo. La bonega Abu Kazen atentigis min pri ĉio admirinda kaj klarigis lerte pri ĉio, kio ŝajnus al mi nekomprenebla. Bedaŭrinde, nur pri malmultaj aferoj mi povus nun rakonti, ĉar mi havis tre malmultajn okazojn por multon vidi.*

*Antaŭ ol mi alvenis, mi aŭdis de la bonega Abu Kazen, ke la demando de Hindujo estas unu el la plej tiklaj por la brita imperio. Multaj eŭropaj scienculoj okupis sin pri tio. Tamen, ilia opinio estas tro multe eŭropa, ke ĝi povus esti kompetenta. Tial ne*

koleru, se mi ripetos al vi la opinion de la orienta scienculo, geografo kaj sociologo Abu Kazen. Li min konvinkis, ke la movado de Gandhi havas neniun komunan kun la ceteraj movadoj, ĝis nun okazintaj en la lando. Ĝi similas nek al la reformo de Gaŭtamao Budho kontraŭ branĥinoj kaj kŝatrioj, ne al Ŝaitani, Sikks, Brahmo kaj la ceteraj. Ĝi ne estas movado etika nek metafizika, sed tute praktika, celanta la ordigon de sociaj kaj ekonomiaj interesoj de hindaj popoloj, la bonstato de la popoloj. La signifon de tio komprenas plej bone tiuj, kiuj preskaŭ mortas pro malsato. Tio estas la movado, celanta unuigi ĉiujn kastojn en unu sama batalo por homa ekzisto. La movado sukcesis dum unu majesta kunveno sidigi apud la sama tablo hinduojn kaj mahometanojn, la unuan fojon en la historio de Hindujo, same kiel en la movado la unuan fojon partoprenas la virinoj. Kiel bonaj pacifistoj, laŭ opinio de Abu Kazen, en tiu ĉi batalo ne gajnos hindoj (se estos tiel) per armilaro, sed per aliaj rimedoj. Eble oni persekutos Gandhin, eble oni lin malliberigos, fine oni tamen cedos. Hindoj kaj angloj kontraktos unue ŝajnan armisticon, ĉar la movado estas tro forta, ke angloj povus per morto de tiu ĉi homo revenigi tute la estintan staton. Tio ĉi eĉ ne korespondus al ilia prudenteco. Postaj okazintaĵoj, tio estas, kiom angloj cedos, por Abu Kazen estis nekonataj, li ne povis antaŭvidi ilin. Eble li nur ne volis diri sian opinion, ĉar malagrabla estas por la scienculo erari.

Jen la vortoj de Abu Kazen pri la movado kaj, ĉu li estas prava, montros la estonto.

Do, kiel dirite, minacas nun en la disvolviĝo de la movado de Gandhi nenio danĝero de burĝa milito kaj mi mencias tion nur tial, ke vi ne malkvietiĝu senbe-

zone, *ĉar vi konsilis al mi ne vojaĝi ĉi tien. Mia vivo estas tre sekura, precipe en la arbaro de Ramigani, malproksime de la urboj kaj malbonaj homoj.*

*Tuj post la alveno en Bombay montriĝis perfekta la servo de la bona esperantisto Abu Kazen, ĉar min atendis la sendito de la jogano Ganeza, kiu min tuj gvidis al li. La jogano kaj la araba scienculo estas bonegaj amikoj, kvankam unu estas metafizikisto, la alia tute reala homo. Kie ili konatiĝis, mi ne demandis.*

*La interkonatiĝo kun Ganeza okazis jene:*

*Post ses horoj da marŝado mi haltis ĉe admirinda kabano el bambuo. Eĉ ne frapante ni eniris. La spaco de kelkaj kvadratmetroj estas de supre ŝirmita per palma foliaro, enplektita en la kanon. La folioj kaj la kano estas kunligitaj per elpajlaj ŝnuretoj. De ekstere tra la kano enpenetras malmulte da lumo, tial la ejo estas duonluma, kvazaŭ regus vespera krepusko. Kun krucumitaj brakoj sur la brusto, sidanta sur ambaŭ kruroj sur la tero, mi rimarkis la maljunulon de proksimume sesdek jaroj. Longa blanka barbo pendas ĝis la talio. La vizaĝo ŝajnas skulptita el ŝtono. La okuloj estas duone fermitaj, ankaŭ la buŝo. Lia spirado estas regula kaj la brusto facile ondiĝas. En la ejo regas pureco, nenie eĉ pajlero sur la tero, kvankam mi tiom da fojoj aŭdis pri la malpureco de indiĝenaj kabanoj. Eble estas nur escepto la restadejo de la jogano Ganeza, kies loĝejo, kvankam en eŭropa senco malebla, montras, ke tie ĉi la korpo kaj la spirito estas puramaj. Vere, enirinte en la kabanon mi eksentis, ke mi venis en unu nekonatan regionon, en kiu regas la dezerteco, sed ĝi influas agrable la animon, tiel ke eĉ ne estas eble tion priskribi.*

*La jogano ne moviĝis de sia loko. Baldaŭ post nia eniro eliris el la kabano iu homo, duone vestita, kun rimarkeblaj sangmakuloj sur la korpo, kredeble iu adepto de Ganeza. Tuj post lia foriro la lipoj de la jogano ekmoviĝis, ekparolante:*

*“Eŭropano, vi alvenas kun la rekomendo de Abu Kazen, benata estu la saĝeco lia.”*

*Ekestis silento. Neniu el ni parolis kelkajn minutojn. Mi ne trovis necesa respondi al lia bonveno, kvankam mi nepre volis tion fari. Sidiĝinte instinkte apud li, dum Ramigani per mano salutis kaj eliris, mi atendis, ke la jogano ekparolu. Strange estas, ke Ganeza ne proponis, ke mi sidiĝu kaj mi tamen tiel agis, eksentante, ke mi ne faras ion malkorektan.*

*“Eŭropano,” daŭrigis li post foriro de Ramigani, “tio de vi serĉata tie ĉi estas la animo kaj ĝia beleco, ĝia pliperfektigado kaj perfektigo. Por atingi la perfektecon, oni devas unuavice havi la animon.”*

*Liaj vortoj enradikiĝis en mia animo. Mi volis tuj respondi, sed tion mi faris apenaŭ post kelkaj momentoj. Tiam mi deklaris, ke la filozofiado min ne interesas, ke mi venas unuavice al li por transdoni la salutojn de Abu Kazen kaj en dua vico por aŭdi de li tion, kion li opinias, ke estas bone, ke mi sciu. Mi deziras studi Hindujojn, se estas eble, ĉar mi amas diversajn sciencojn kaj deziras persone konvinkiĝi pri ĉio. Tiam mi ankaŭ kuraĝis riproĉi, ke la perfekteco de lia spirito neniam povus utili al la homaro, se ĝi ne estas reale aplikata por la bono de la aliaj. Li interrompis min:*

*“Via opinio pri la malapliko de la spirito de diversaj joganoj en la lando estas tute erara, almenaŭ*

*en tio, kio min koncernas. Ĉe mi lernis kelkaj generacioj, nun laborantaj por la bono de Hindujo. Se vin ne sendus Abu Kazen, mi konsiderus viajn vortojn nura ofendo. Tamen mi pardonus kaj daŭrigus la diskuton por konvinki almenaŭ unu eŭropanon, ke joganoj ne estas tio, kion ili opinias.”*

*Mi petis pardonon kaj demandis poste lian opinion pri tio, ĉu li kredas, ke la instruado de Kristo enhavas ĉion direblan, aŭ ekzistas kelkaj pli gravaj veroj. Ĉu iam iu kuraĝis doni al la mondo tian parolon, kia estas: “Amu vian proksimulon kiel vin mem.” Kaj al la demando, kiu estas nia proksimulo, li respondis: “Ĉiu homo, ĉu amiko, ĉu malamiko.”*

*Ganeza respondis senpripense. Mi sentis, ke liaj vortoj enpenetras en mian animon kaj ilia sono estis milda kaj karesa kiel facila venteto dum somero:*

*“Ĉiuj homoj estas fratoj, ĉar ilin kreis Brahmao, instruas bramanismo. Ne rekte, sed, ĉar ĉion kreis Brahmao, aliel ne povas esti. Do, se mi ne amos mian fraton, kiun mi amu? Kristo nur konigis al vi la ekzistantan veron, substrekante ĝin per siaj vortoj. La vero ekzistis antaŭ li. Tamen, lia grandeco estas en tio, ke li ĝin denove konstatis kaj ke multegaj penis obei al ĝi.”*

*Mi sciis, ke la jogano filozofios kaj evitis tion, starigante mem la demandojn. Unue mi petis lian opinion pri la kristana religio.*

*“Bramanismo instruas pri unu ĉefa dio, Bramao, de kiu ĉio devenas. La eklezio trovis ankoraŭ du ĉefajn simbolojn de tiu ĉefa dio. Venis Budho kaj li diris: ‘Ekzistas nur unu Dio, nevidebla, ĉion scianta, ĉiopova kaj justa.’ Kristo diras tion post Budho. Tamen, li estis granda, ĉar li ekregis per sia instruo*

grandan parton de la homaro, kiu malbone sciis pri vera diaĵo. Malfeliĉe, vi kristanoj ne sekvas lin bone. Bramanojn vi riproĉas pro amaso da diversaj dioj, al kiuj ili oferas kaj preĝas. Via eklezio kreis milojn da sanktuloj. En bramanaj temploj oni preĝas kaj oferas al la dioj; ĉe vi oni preĝas al sanktuloj por anstataŭi vin ĉe Dio, oni mone pridonacas diversajn preĝejojn kaj metas oferojn sur altarojn. Al Benares pilgrimas miloj da kredemuloj; en viajn sanktajn lokojn migras ĉiujare multnombraj pilgrimantoj. Vi diras, ke al diversaj sanktuloj oni preĝas por porpeti ĉe la Dio, ĉe ni ankaŭ, nur nia eklezio ne kreis sanktulojn, sed diversajn diojn. Ekzemple, la Dio Ŝivo havas plej multnombrajn templojn en la lando, ĉar malveraj kredemuloj timas la morton, dum morto estas nenio alia ol la limo inter unu kaj la alia vivo, t.e., post multaj peripetioj la homoj fine kuniĝos kun Brahmao. Ĉe vi la animoj eniras la paradizon aŭ la inferon, laŭ merito, t.e., kiel la homo kondukis dum la vivo, bone aŭ malbone. Unu eklezio kreis eĉ la trian eblecon, la purgatorion, tra kiu la animoj eniras en la paradizon post la puriĝo. Ĉu Kristo parolis pri purgatorio? Kaj ni diras, ke la animo migras el unu korpo al la alia, ĝis ĝi atingas la perfektecon kaj kuniĝas kun Brahmao. La purgatorio estas kreita kiel io simila al nia religio, sed ĝi troviĝas ie ekster la tero, kvankam ĝi efektive estas sur la tero, ĉar nur sur la tero povas la animoj migri el unu korpo en la alian. Do, la sama afero kiel ĉe ni, nur la kristanoj asertas, ke ne estas tiel. La vero estas, ke la animoj migras kaj, kiam estos kala<sup>10</sup>, ĉiuj kuniĝos kun Brahmao. Vi kristanoj asertas, ke la animoj venas en la paradizon, la purgatorion aŭ la inferon. La paradizo similas al kuniĝo kun Brahmao. La diferenco estas, ke vi en la paradi-



zo venas nur proksime al Dio, dum ni kuniĝas kun li. La alveno proksimen al Dio estas tute malvera, ĉar la homoj devas tute kuniĝi kun Dio, samkiel la guto de pluvo devas fali sur la teron aŭ en la maron, de kie ĝi devenas. Kristo parolis, ke venos la finiĝo de la mondo kaj oni profetis, ke li alvenos la duan fojon en gloro. Jes, li alvenos, ne konsiderante tion, kian nomon li havos, finiĝos la nuna epoko de la homaro. Regos la Dio unika, de kiu ĉio devenas. Via religio aldonas, ke la malbenitaj estos daŭre malbenitaj kaj la justuloj daŭre feliĉaj en la paradizo. Tiun eternan feliĉecon ni sentas kuniĝante kun Brahmao, do restas nur Brahmao sola. Oni do ne povas esti eterne malbenita, ĉar malbenitaj estas, se vi deziras, ke mi komparu, nun ni sur la tero. Kiam finiĝos la mondo, ni ne plu estos tie ĉi kaj ne povos esti malbenitaj. Laŭ tiu instruo de la religio, Kristo estus maljusta, ĉar li permesas, ke multaj restu eterne malbenitaj. Mi do konstatas, ĉar Brahmao, aŭ eĉ via Dio, kreis la mondon, li neniel intencis, ke la homoj estu eterne malbenitaj. Tiel li por la eterneco malbenus sin mem, ĉar ni ĉiuj estas nur la partetoj de li. Brahmao estas justa, tial li neniel toleras la eternan turmentadon de la homaro, kaj se via Dio, kion vi kredas, estus justa, li ankaŭ ne povus toleri tion. Do, en tiu ĉi punkto kristanismo plene eraras. Oni eĉ povus diri, ke la justuloj ankaŭ eraras kelkafoje. Jes, estas la vero, sed povas erari nur la homoj-justuloj, neniel Dio.

Kristo diris: “Mi estas la filo de Dio vera.” Li diris la veron, ĉar ĉiuj ni estas la gefiloj de la Dio vera. Kiel vi vidas, kelkafoje li filozofiis, kiel mi en la komenco de tiu ĉi nia interparolado. Vi kristanoj riproĉas bramanan religion, ke ĝi konfesas tri diojn.

<sup>10</sup>Ndlr: Tempo en sanskrito.

*Ne, ekzistas nur unu Dio, eŭropano. En Brahmao estas simbolita la kreiĝo, en Viŝnao la vivo kaj en Ŝivo la morto. Tion vi nomas Trinitato, vian klarigon pri tiu Triunuo. Ĉu nia klarigo ne estas triunuo? Ne estas, diras vi, la eklezio instruas, ke estas tri dioj. Ĉe vi, ĉu ne, estas la afero alia? Nur kelkaj preĝas al la Dio-patro, kelkaj al la Dio-filo kaj kelkaj al la Sankta Spirito. Ĉe ni oni preĝas al Brahmao, Viŝnao kaj Ŝivo kaj, se oni ne diras, ke tio estas nur tri personigoj de la Dio, kial do nia klarigo estu malvera kaj via la vera? Neniel estas via klarigo pli komprenebla al la homa cerbo ol la nia. Nia ŝajnas pli komprenebla, ĉar en ĝi estas simbolita la naturo, vi ja scias, ke homoj naskiĝas, vivas kaj mortas. Nia klarigo havas tute naturan fundamenton, do la Trinitato estas nur simpla kopiado de la naturo, kio estas la plej vera, ĉar la naturo prezentas efektive la plej grandan perfektecon, kian kreis Brahmao. Mi nur ne komprenas, kial kristanismo kaŝis la veron de Budho, ke estas nur unu Dio kaj neniu plu, kvankam Kristo aperis post Budho, kiu korektis bramanan religion, evitante diversajn simbolojn kiel superflujajn kaj nur stimulantajn la homojn logike kontraŭbatali tiajn klarigojn. Poste ankaŭ la budhista eklezio ne povis eviti la tenton kaj proklamis Budhon Dio, mi ne scias mem kial.*

*Kristo kreis la novigitan religion kaj disvastigis ĝin en la regionoj, kie oni konis sennombrajn diojn. Li volis perfektigi la homaron kaj devojigi ĝin de la eraroj. Lia instruo estis kelkfoje nekomprenata kaj poste oni ĝin aliformigis laŭbezzone, kreante diversajn ekleziojn. Li estis granda homo, kiu jam kuniĝis kun Dio vera.*

*La kristanoj riproĉas niajn diservojn, menciante*

kiel hontigan fakton la vangofrapadon de statuoj de la dioj, se ne plenumiĝas iu deziro. Vi, kiel pli civilizitaj homoj, ne vi persone, sed la kredemuloj, preĝas la Dion, ke li helpu en tiu malagrabra situacio. Solene oni promesas konstrui la preĝejon, sur genuoj rampi al unu templo k.t.p., same kiel niaj kredemuloj ofertas kaj pilgrimas. Vi estas pli ruzaj, donante al la sanktulo, respektive al la preĝejo, nenion anticipi, dum niaj piuloj pro pli firma kredo pagas anticipi. Ĉe vi ekzistas nur la ebleco doni, se la deziroj efektiviĝas. Ĉe ni, ĉar oni jam oferis, la malsaĝaj piuloj kredas, ke ili devas la dion puni, se li ne plenumis la deziron, por kiu li jam akceptis la donacon. Tia akcidento ĉe vi eĉ ne povas okazi, ĉar vi promesis nur, se la deziro plenumiĝos. Se ĝi ne plenumiĝas, vi nenion donas kaj, ĉar vi nenion donas, eĉ la ideon vi ne havas puni la sanktulojn pro trompo, ĉar la trompo estus nur tiam, se oni antaŭpagus. Tio estas nur unu varianto, konforma al via civilizacio.

Kristo estis asketo, la homo, kiu post sia tera morto kuniĝis kun la Dio, kiel ankaŭ mi kuniĝos, kiam mi atingos la plenan perfektecon. Li nomis la Dion vera Dio, mi ĝin nomas Brahmao kaj li estas la sama kiel la via. Ĉio riproĉata al bramana eklezio povas esti riproĉata ankaŭ al la kristanaj kaj al iliaj ritaĵoj. Tie kaj ĉi tie estas nura teatro. Kristo kun siaj adeptoj kunvenis kaj preĝis al la Dio modeste, sen ia parado, same kiel mi preĝas al li en tiu ĉi dezerta domo, kie mi perfektigas mian animon. Viaj kaj niaj pastroj instruas, ke estas plej oportune preĝi en la temploj, ĉar se oni ne vizitus la templojn, ili ne povus vivi. Tamen, ni bezonas la pastrojn por la nuna tempo, vi eble ankaŭ. Se ili enkondukis diversajn ritojn por venigi en la preĝejojn la homojn, kulpas nur

la popolo, al kiu plaĉas ekstera brilo kaj la mistero. Tio estas nur la bezono de la hodiaŭa tempo, nenio plu. Tial mi diras, eŭropano, ekzistas nur unu Dio, tiu la plej perfekta, de kiu ĉio devenas, al kiu ĉio revenas kiel la guto de pluvo al la rivero aŭ maro, de kie ĝi devenas, elvaporiginte siatempe en la atmosferon. Tiun ĉi veron vi serĉis de mi kaj mi ĝin diris. Ĝi estas la sama por la tuta mondo kredanta je unu Dio. Estas nur unu Dio unika, kiu kreis laŭ tre justa plano la homojn, ĉio alia estas nur flankaj aferoj, kiel ĉe kuracistoj kelkafoje la receptoj, ĉar se ili ne skribus receptojn kiel eble plej longe, multaj kredus, ke ili ne scias kuraci. Tial ankaŭ la pastroj devas havi por ion babili, ĉar aliel ili estus neblaj.

Nun, homo, iru kaj studu la landon, kolektu la scion, ĉar la scio estas ŝtupo, gvidanta al pliperfektigo de la homo, kion mi konfesis ankaŭ al mia frato kaj perfekta homo Abu Kazen.

Sekvu, laŭdezire, la vojojn de Kristo, vi trovos ankaŭ tre grandajn verojn, ĉar li parolis nur la verojn. Ke tiujn verojn oni poste aliĝis kaj ŝarĝis per diversaj mensogoj, tio nur altigas Kriston, ĉar li estas ekster la mensogo kaj super ĝi.

Ni ne volas aliĝi nian eklezion kaj, se ĝi instruas kelkfoje la malveron, ĉiuj grandaj spiritoj trovos en la plej grandaj malveroj la veron, kapablaj juĝi mem senerare, la eklezio do ne baras al ili la vojojn.”

Multon mi priparolis ankoraŭ kun la jogano kaj por ĉiu mia riproĉo al bramanaj kredumoj, pri kiuj mi aŭdis nekredblaĵojn, Ganeza trovis analogan ekzemplon en kristanaj landoj, tiel ke mi enviis lin pro tiel perfekta kono de kristanaj cirkonstancoj. Se mi rakontus pri Bled kaj ĝia sonorilo, li havus bonan ekzemplon, analogan al bramanaj kutimoj, ĉar

*tie la homoj antaŭ esprimi de la deziroj metas la monon sur la altareton. Do, ili pagas anticipe. Kredeble estas, se ne ekzistus la leĝo kontraŭ sakrilegio, ke multaj volonte deprenus la saman sumon de sur la altareto, se la deziroj ne plenumiĝus.*

*Kaj mia kredo pri la praveco de bramanismo aŭ kristanismo? Ĝi restu la demando, pri kiu mi ne volas cerbumi.*

*Mi finas, Nanjo, dezirante al vi feliĉon kun Ana en via nova hejmo. Ne skribu al mi eblajn malfavorajn sciigojn, mi volas nun zorgi pri mi mem. Vivu.*

*Johano*

Fininte la leteron, li instruis al Ramigani Esperanton kaj sekvantan matenon, kunportinte kelkajn librojn, ili iris pli profunden en la arbaron. Ramigani legis la unuan volumon el la libroj de Vedoĵ. Ĉirkaŭ ili regis trankvilo, neniuj voĉoj estis aŭdeblaj. Traleginte kelkajn frazojn, Ramigani klarigis en la angla lingvo, ĉar li finis ĝis nun apenaŭ unu lecionon de Esperanto. Do, ĉar estis neniuj aliaj manieroj por klarigi al Unulo la tekston, ili devis uzi la anglan lingvon, kiun ambaŭ posedis sufiĉe por interkompreniĝi. Kvankam Ramigani legis kaj tradukadis, tamen li estis singarda, sciante, ke en tiu ĉi arbaro, proksime de marĉoj, oni devas pensi ankaŭ pri sovaĝaj bestoj. Post du horoj da laboro interrompis Ramigani unu frazon, kaptis Unulon je ŝultroj kaj levis lin de sur la tero. La poeto demandis pri la signifo de tia konduto, sed Ramigani nur montris la senarban lokon, proksimume dek metrojn antaŭ ili. Tie estis videbla io viva, malrapide grimpanta, longa ĉirkaŭ unu kaj duono da metro, flave-brunkolora.

“Kobro,” ekflustris Ramigani, alportinte la pafilon je la ŝultro. Unulo lin haltigis por momento.

“Haltu, ĝi ne grimpas al ni. Serpentoj ne atakas, se oni ilin lasas en trankvilo. Kiu ĝi estas, ĉu iu venenserpento?”

“Kobro, mi diris. Se ĝi mordas, apenaŭ kvin minutojn oni vivas. Cetere, mi volas pafi, kial kompati la serpentojn.”

Unulo cedis. Ramigani levis denove la pafilon kaj celis, sed baldaŭ li aliigis sian deziron. La serpento subite streĉis sian kolon kaj sur ĝia nuko montriĝis io simila al okulvitroj. Ramigani denove levis la manon, asertante, ke malantaŭ unu arbo aperis la kapo de mungoto. Unulo ankoraŭ nenion rimarkis, sed Ramigani parolis la veron, ĉar la menciita besto ĵetis sin sur la nazumserponton, kiu streĉis pli forte la nukon, ekbalancinte pli vigle kaj turniĝinte al mungoto. La unuan fojon mungoto ne sukcesis. Ankoraŭ unu fojon ĝi ĵetis sin al la serpento, ĝiaj akraj dentoj eniĝis en la streĉitan nukon de la nazumserpento, kiu falis surteren senviva.

“Mallonga batalo,” diris Ramigani. “Kunvenis du nepacigeblaj malamikoj. Kvankam mungoto estas pli lerta, kobro neniam evitas la batalon.”

“Ĉu mungoto manĝas serpenton?”

Ramigani ne devis respondi, ĉar ĝi malaperis en la densaĵo, lasinte sian oferon. Post tio ili ankaŭ retiriĝis, kredante, ke proksime de ili troviĝas aliaj serpentoj.

“Ekzistas tie ĉi eĉ pli danĝeraj,” daŭrigis Ramigani. “Precipe danĝeraj estas tiuj, rampantaj sur la arbojn. Ili malagrabla surprizas la homojn. Antaŭ

kelkaj jaroj estis pli multaj serpentoj, nun malpli ofte oni vidas ilin. La registaro rekompencas la profesiajn ĉasistojn de serpentoj, kiuj neniam kontraktis la pacon kun la homoj.

Kredante, ke almenaŭ inter la serpentoj regas la paco, oni erarus, ĉar tre grandaj malamikoj estas ekzemple kobro kaj anakondo. Tre interese estas vidi la batalon inter tiuj ĉi du serpentoj kaj mi bedaŭras, ke ni ĝin ne vidis. Anakondo penas per siaj muskoloj sufoki nazumserponton kaj, se tiu ĉi sukcesas kelkafoje mordi dum la batalo, ambaŭ serpentoj mortaĉas. Anakondo, longa ĉirkaŭ dek metrojn, povas esti konsiderata kiel la reĝino de la serpentoj. Tamen, ĝia forteco neniam estas tiel danĝera por homoj, kiel la veneno de nazumserpentoj, ĉar oni pli facile rimarkas tiun grandan rampulon. Ĝuste dirite, la plejparto de homoj, mortigataj de serpentoj, estas la oferoj de kobro.

“Ĉu vi rigardis la batalon de la serpentoj?”

“Kelkfoje. Ne tial, ke ĝi plaĉus al mi, sed por atendi la finiĝon de la batalo, kiu ne kostas eĉ unu kuĝlon. Vi scias, ke en la plej nova tempo la eŭropaninoj portas ŝuetojn el serpenta haŭto kaj la haŭto de anakondo estas sufiĉe longa kaj larĝa por kelkaj paroj da ŝuoj.”

Unulo ekridis pri la ŝercaĵo kaj dolĉe ekdormis tiuvespere. La sekvantan tagon post la leviĝo li eliris antaŭ la kabanon. Sur la tero kuŝis lia pluvmantelo. Ŝajnis, ke ĝi falis de sur la hoko, je kiu ĝi pendis. Li levis ĝin, sed la saman momenton la mantelo disfalis en polvon. Li la unuan momenton pensis, ke io en la cerbo ne estas en ordo kaj rigardis demande la ĉasiston, ridantan tutkore.

“Sinjoro, multe da feliĉo ni ne havas tie ĉi. La pasintan nokton tie ĉi estis certe termitoj, blankaj formikoj. Plej oportuna ili trovis fari truojn en via mantelo, eble pro bona gusto de gumo. Mi timas, se ili jam prenis tiun ĉi direkton, ke ili truos la tutan vian garderobon. Plej bone estus pendigi vian valizon per ŝnureto je iu arbo. Ni ŝmiru trunkon per iu ŝmiraĵo, tiel ke ili ne povos suprenrampi.”

“Ne, Ramigani, ni translokiĝu, kvankam tie ĉi estas agrable kaj ni sentas varmecon. De tiu flanko nazumserpentoj, de tiu ĉi termitoj, dankon. Ankorau devus alrampi iu anakondo kaj sufoki nin ambaŭ. Poste ĝi formanĝus nin kiel delicaĵon dum nia eterna songo. Krome, via kabano ne ŝirmas nin kontraŭ la plej granda danĝero, kontraŭ la atakoj de tigroj. Se iu tigro saltos sur ĝian tegmenton, rapide ĝi estos inter ni.”

“Kiel vi deziras. La tigrojn ni ne timu. Ili enfalus en la truojn, elfositaj por ili, antaŭ ol ili sukcesus alveni ĝis ni. La besto flaras homon en la kabano kaj multe ne zorgas, ĉu survoje minacas ia danĝero. Mi mem kelkafoje servis kiel allogaĵo. Cetere, la tigrojn oni ne vidas en tiu ĉi parto de la ĝangalo.”

Tamen Unulo decidis foriri kaj la saman tagon ili venis ĝis la plej proksima stacidomo. Ramigani asertis, ke pro la varmego ne estus oportune iri en la urbojn, kvankam apenaŭ je la duono de venonta monato ekestos la plej varma vetero. Malgraŭ tio Unulo deziris loĝi en urbo, ĉar la vivon li ekamis nun pli multe. Li rimarkis ĝian belecon, des pli, ĉar minacis diversaj danĝeroj. Pro malsekureco de la vivo li ekmalamis la ĝangalon kun ĉiuj ĝiaj danĝeroj, malgraŭ la aserto de Ramigani pri ilia sekureco.



Vojaĝante, lernante kaj legante dum ĉiuj bonaj okazoj, ili alvenis post kelkaj tagoj en la urbon Colombos, la ĉefurbo de la insulo Ceylon. Okulfrapaj estis la strangaj stratoj de la urbo, similaj al parkoj, tre belaj, kiajn Unulo nenie vidis. Grandegaj kokospalmoj kaj nepriskribeble belaj floroj, abundkoloraj kaj odorantaj. En ombroj de palmoj oni sentas en la animo la neforgeseblan bildon pri la beleco de la mondo. La suno brilas kaj la palmoj donas sufiĉe agrablan rifuĝejon. Perceptante la belecon de abunda vegetaĵo en sia cerbo, li nomis sian hotelon en unu el tiuj admirindaj stratoj la malgranda paradizo. La lernado tie ĉi ege sukcesadis al ambaŭ.

Post la sunkuŝiĝoj la temperaturo malaltiĝadis kaj vespera krepusko trenis sin malrapide sur la teron. Kiel per balzamo parfumita aero eniĝadas en la pulmon kaj ili ĝin avide spiris. La vivo apenaŭ nun vigliĝis kaj sennombraj homoj renkontiĝas, promenante kaj ĝuante la agrablajn vesperojn.

“Malgranda paradizo, malgranda paradizo,” ripetadis Unulo al la ĉasisto, kiu iom skuis siajn ŝultrojn, meditante pri siaj aferoj. De ie oni aŭdis enuigan gramofonan muzikon, ludantan ian ĉarlestonon aŭ ion similan, poste ian fokstroton kun angla kantado, kio similis al miaŭado de katoj.

“Kial ekzistas ankaŭ tie ĉi malbonegaj diskoj?” pensis Unulo. Post iom da tempo la ĉasisto ekhaltis kaj ĉesis paroli. El unu ĉambro tra malfermita fenestro aŭdiĝis iu stranga instrumento, kio ilin longe ne interesis. Poste ekeĥis de sur la bordo unusona, melankolia melodio, tra la aero tremanta dolorkantado. Knabina voĉo kantis ĝin, memorigante Unulon pri animaj doloroj. La kanto similis al tiuj, kiajn li aŭskultis ankaŭ en sia lando. Vere, ĝia ritmo estis

tute alia. Ramigani ankaŭ aŭskultis, lia mieno gajĝis, dum Unulo faris malgajan mienon. Nur kelkfoje la muskoloj en la vizaĝo de Ramigani ektremis konvulsie. Tuj post la finiĝo li proponis sin traduki la kanton, vidante, ke Unulon ĝi ankaŭ interesas.

*“Kresku arbo en arbaro,  
Kresku fiŝo en la maro.  
En neniŭ familio  
Nur naskiĝu la virino.*

*Kial sorto ne favoris  
Almenaŭ min, ho Di’.*

*Kaj terura tiu sorto  
Akompanos min ĝis morto.  
Ĉar mi estas la vidvino,  
Malbenita nur virino.*

*Kial sorto ne favoris  
Almenaŭ min, ho Di’.”*

Poste ĝi esprimas la esperon, ke baldaŭ ĉesos tia stato.

“Jen la traduko, kio signifas, sinjoro, ke bramanaj knabinoj, kiuj eble edziniĝis jam en sia sesa jaro je iu maljunulo, okaze de lia morto fariĝas vidvinoj. Tio estus nenio malbona, sed plu ili ne povas edziniĝi, kvankam ili, kompreneble, ne vivis kun sia edzo. Same estas kun la aliaj vidvinoj. Neniu plu ilin serĉas kiel edzinojn. Dolora estas ilia sorto kaj miaopinie estis pli bone, antaŭ ol alvenis angloj, kiuj malpermesis bruligi la edzinojn kun la edzoj, kio, miaopinie, por la vidvinoj ŝajnis la plej bona sorto. Eble vi malkomprenos min, ĉar vi ne scias, kiom ili suferas dum sia vidvineco.”

“Kruela vi estas, Ramigani. Pacienĉiĝu, venos la tempo, kiam oni ĉesos per tiaj malprudentaj moroj turmenti viajn vidvinojn. Vekiĝos viaj popoloj el sia miljara dormado, por ĝui la fruktojn de la vivo kiel la aliaj popoloj de la mondo. Malaperos ankaŭ tiaj ridindaĵoj, kiajn ni vidis hieraŭ. Mi parolas pri tiu lamao, ĵetinta la bananojn nur tial, ke mia ombro falis sur ilin. Kun tiaj superstiĉaĵoj malaperos ankaŭ la vidvinoj. Mi nur admiras, ke en la urbo iu el tiaj vidvinoj ekzistas, meze de civilizacio eŭropa.”

“Mi ankaŭ ne kredas, ke en tiu ĉi eŭropa parto de la urbo ekzistas tiaj virinoj, sed kredu min, ke en la nigra urbo, en kvartalo de indiĝenoj, ili ankoraŭ ekzistas. Tiu ĉi, kantinta la melodion, kiun ni aŭskultis kune, verŝajne nur malfeliĉe amas kaj por konsoli sin kantas. La kanto estis kantata en la tamila lingvo. Strange, vi kredas pli bonan estonton de la tuta Hindujo?”

“Ramigani, unu granda orienta scienculo kredigis min pri tio. Certe kredas tion ankaŭ la granda jogano, kvankam li ne parolas pri tio, ĉar lia animo ŝajnas al li la unua afero. Mi admiras la maljunulon pro lia skeptikemo, sed mi opinias, ke pli multe li devus helpi al sia popolo, alimaniere ol per la kuracado de nekuraceblaj homoj. Se tiaj homoj dediĉus sian bonan volon kaj admirindan scion al la popolo, via feliĉo estus ankoraŭ pli proksima. Malamas eble multaj el vi la anglojn, sed ili ne alportis tiom da malbonaĵo al via lando, kiom da malbono ĝermas en viaj propraj animoj. Nur vi estas kulpaj, ke ekzistas knabinoj-vidvinoj, ĉar vi ne volas forgesigi la malbonajn morojn kaj nun jam tute neaplikeblajn leĝojn de Manuo. Se la angloj ĉie malpermesus tiajn vidvinojn, minacante per puno, vi eble konsiderus tian

malpermeson la nova atako je via libereco.”

“Kredu, ekzistas multaj, pensantaj kiel vi, ankaŭ mi. Kun siaj adeptoj Mahatma Gandhi solvos tion. Mi ne kredas, ke via ombro povus malpurigi min, ĉar eĉ via apudesto min ne malpurigas. Tio estas ridindaĵoj de strangaj kastuloj. Jen, mi manĝas kun vi apud la sama tablo, kiel hodiaŭ tagmeze dal-bath<sup>11</sup> kaj nenio malbona al mi pro tio okazas. Ekzistas multaj tiaj homoj, kiuj ne kredas je malsaĝaĵoj, anoncos sin ankaŭ la aliaj. Eĉ kelkaj eŭropanoj pro nia socia movado nin simpatias.”

“Ni ne parolu pri tio plu, Ramigani. Okazu tio, kio okazos, en tiu rilato ni nenion povus ŝanĝi. Mi scias, homan sangon vi ne deziras, la tuta mondo tion ankaŭ ne deziru. Ĉiuj homoj estas fratoj, diras ankaŭ la granda jogano. Tial mi kredas, ke ĉio ŝanĝenda estos ŝanĝata pace.”

“Vi predikas ian eŭropan religion. Tamen, ĝuste vi, eŭropanoj, tiom multe da sango de viaj proksimumoj elverŝis. Ĉu vi, kompatantaj niajn vidvinojn, ne kompatas la milionojn da viaj vidvinoj post la milito? Vi ĉiuj estas kristanoj kaj al ĉiuj Kristo ordonas ami unu la alian, sed vi tre multe militis kaj en la nomo de Kristo oni elverŝis pli multe da sango ol en iu ajn milito en la mondhistorio. Komprenebla tio por mi ne estas, en la senco de la instruado de Kristo. Min vi deziras instrui, al vi mem vi ne povas helpi. Kiu kredu al vi?”

Unulon surprizis la respondo de Ramigani kaj li malrapide, akcentante ĉiun silabon, respondis:

“Ramigani, vi mensogis al mi, vi ne estas malklera homo, ĉar malklerulo ne povas tiel paroli. Vi lerte

---

<sup>11</sup>Dal = unu speco de pizoj, bhat = rizo; do, pizoj kun rizo.

ĝis nun kaŝis vian scion, ludante simplan hindan naivulon. Kial vi fariĝis ĉasisto?

Ramigani rimarkis, ke li malkaŝis sin. Nun li ne plu povis malpromesi al Unulo rakonti pri si post la reveno en la hotelon. Li jene komencis sian rakonton.

“Antaŭ kvin jaroj mi finis la Universitaton en Bombay, kie mi okaze konatiĝis kun unu knabino el la mahrata familio. La gepatroj estis kleraj homoj, permesantaj al la knabino studi la muzikon. Inter ni ekestis amo kaj la gepatroj ne kontraŭis. Tuj mi ne edziĝis, dezirante al mi krei iun ajn pozicion en la socio kaj iom praktiki, antaŭ ol mi malfermu mian propran advokatan oficejon. Tial mi akceptis la postenon de sekretario ĉe la raĝo de Travankoro. Li havis multajn rilatojn kun la angla administrado, tial li bezonis juriston, por ke li povu kontroli, ĉu ĉiuj impostoj, kiujn li devis pagi, kaj ceteraj aferoj estas laŭleĝaj. La raĝo ne deziris pagi al la angla administracio eĉ unu rupion pli ol estas laŭleĝe, sed mi povas konfesi, ke ĉiuj impostoj estis ĝuste kalkulitaj. En mia oficejo la raĝo vidis iutage fotografaĵon de mia fianĉino, observis ĝin longe kaj proponis al mi preskaŭ neimageblan sumon, se mi ŝin trasdonos al li. Li promesis mem zorgi, kiamaniere li ŝin konkeros. Mi rifuzis, nomante tian proponon aĉa kaj malhoma. La raĝo ne respondis, sed mi rimarkis, ke li koleras. Kelkajn monatojn post tio ni iris en Eŭropon kaj du monatojn post mia foriro mi ricevis leteron en Londono, per kiu anoncas ŝiaj gepatroj, ke la knabino estis perforte unu nokton forkondukita. Mi revenis tuj kaj la raĝo tre volonte forpermesis min. Longan tempon mi vane serĉis kun la polico, mi ne povis eĉ pensi, ke ŝi povus esti malproksime de sia urbo. Fine, iuj postsignoj, aŭ pli bone miaj konjektoj, kondukis

al la palaco de la raĝo. Mi plendis al la angloj, klarigante detale miajn konjektojn, rakontinte ankaŭ la iaman deziron de la raĝo, esprimitan al mi. La polico ne kuraĝis perforte eniri en la haremon de la fama raĝo, des pli, ĉar li ne estis hejme. Post lia reveno el Eŭropo oni lin invitis kun mi al la poliestro, kiu ĝentile demandis lin, ĉu li eble havas en sia haremo mian fianĉinon. Honorvorte la raĝo de Travankoro neis, minacante eĉ akuzi min pro kalumnio. Mi fine denove plendis al la juĝejo kontraŭ la polica esplorado, ankaŭ la patro de la knabino pere de siaj amikoj intervenis kaj oni decidis sendi unu agentinon en la palacon de la raĝo, por ke ŝi esploru la aferon. Oni sciigis la forkondukinton pri la decido de la juĝejo. Volante senkomplike solvi la aferon, la raĝo lasis la knabinon, opiniante, ke en okazo de la maltrovo de mia fianĉino ĉe li, la afero finiĝos sen ia puno por li. Bedaŭrinde, la knabino pendigis sin en la apuda arbaro, skribante, ke ŝi ne povus travivi la honton. Konsiderante lian altan pozicion kaj la privilegiojn, kiujn li havis, la raĝo estis kondamnita je unujara malliberiĝo en sia palaco. Vidante la maljustaĵon, mi foriris en la ĝangalon, decidinte mortigi la forkondukinton, tuj kiam montriĝos bona okazo por tio. La feliĉo venigis lin iutage en la proksimon de mia ĝangalo, kie li decidis ĉasi. Mi celis kaj preskaŭ pafis al li. Mem mi ne scias, kial tiumomente miaj brakoj ekstremis kaj mi memoris la vortojn de la granda instruisto Mahatma: "Ne mortigu," kaj pardonis al li la maljustaĵon. Mi pardonis, kredante, ke ankaŭ mia amatino pardonos al mi tian decidon. Ofte mi pri ŝi memoras, ankaŭ ĉi-vespere, ĉar la kanto, kiun ni aŭdis de sur la bordo, estas ŝia kanto kaj ŝi mem ĝin verkis kaj skribis la notojn. Mi konvinkiĝis, ke tiu ĉi

kanto enpenetras en la korojn de multaj hindaj knabinoj, ĉar ĝi estas tradukita eĉ en la tamilan lingvon, en kiu ni ĝin ĉi-vespere aŭskultis.”

Post finiĝo de sia rakontado Ramigani iris al la fenestro, rigardis la serenajn ĉielon kaj helajn stelojn sufiĉe longe, tiam li retiriĝis en la ĉambron kaj post momento adiaŭis Unulon.

“Stranga homo,” pensis Unulo. “Kruela, iom sentimentalaj, kvankam li ne povas dum kelkaj momentoj bridi la varman sangon de la iama militista kasto. Li lerte sin kaŝis kelkajn monatojn, ne volante rakonti pri si kaj asertante, ke neniam pli altajn lernejojn li vizitis, kio estas tre dubinda. Kiu scias, ĉu la granda jogano ne estas iu alia, ol mi kredas?”

Tiam li sciigis, ke lia fantazio troigas. Li konatiĝis kun kleraj homoj, sciantaj multon. Iom post iom trapenetras la ĝenerala klereco en la rondojn de diversaj joganoj, ilia anima horizonto ankaŭ tiudirekte plilarĝiĝas, do nenia strangaĵo, la kulturo de la dudeka jarcento iom post iom enpenetras ankaŭ en pli larĝajn rondojn, en la popolojn de Hindujo mem.

Tiunokte kaj kelkajn noktojn pli poste, li meditis antaŭ la ekdormo pri ĉiuj siaj ĝisnunaj diskutadoj kun Ganeza, sed tia meditado prezentas apartan objekton, pri kiu temas en unu alia romano.

### III

La dancejo estas plena de diversaj homoj. Miloj da malgrandaj, diverskoloraj lampetoj lumigas la spacon de grandega halo, de kies plafonoj pendas abundkoloraj elpaperaj serpentoj, dum sur la planko

abundas etaj konfetoj. La tualetoj de sinjorinoj, karaj baltualetoj, ornamitaj per diversaj broĉoj kaj juveloj, brilas en la maro de la lumo, dum la granda orkestro de dudek muzikistoj ludas ĉiujn eblajn modernajn dancojn, tiom similaj unuj al aliaj.

Tie en la haveno, en la plej malpura parto de la urbo, apenaŭ palpebrumas strataj lampoj. El sufo-kigaj lokaloj aŭdiĝas ebria kantado. Tie-ie el la malhelaj kaŝejoj eliĝas sur la trotuaron sufiĉe malriĉe vestitaj knabinoj, kaptas je maniko preterpasantajn maristojn, frustrante pasie.

“Donnez moi cinq francs, mon cher”<sup>12</sup> kaj tiras ilin en la duonluman lokalon.

Kaj ĉi tie en sufokiga atmosfero prezentiĝas la samaj scenoj kiel en la plej granda halo, nur la malbonodoro de ŝvito anstataŭas tiean parfumon.

Tiaj kontrastoj estas troveblaj en ĉiuj pli grandaj eŭropaj havenurboj, sed nia devo ne estas ilin priskribi detale.

Ni revenu denove en la grandan halon de Marseille, en la societon de kelkaj gaje disponitaj personoj, sidantaj apud la sama tablo en la apartejo. La muroj de la apartejo estas kovritaj per ruĝaj tapetoj. Unu lampo diskrete lumigas la ejon, kaŝitan de la gedancantoj en la granda halo per densaj kurtenoj.

En la apartejo troviĝas du inoj kaj du uloj, antaŭ kiuj oni vidas kelkajn malplenajn botelojn de ĉampano. La interparoladoj estas gvidataj en la franca lingvo, interrompataj de momento ĝis momento per gaja ridado.

---

<sup>12</sup>Donu al mi kvin frankojn, mia kara.



“Petro,” gaje alĵetas unu homo kun serena vi-zaĝo, “via mastrino estas verŝajne soifa, vi bonvolis pagi nur du botelojn da ĉampano. Estus bone, se vi mendus ankoraŭ kelkajn botelojn. Gabriela estas tre ĉarma knabino, ĝuste kiel Suzana, kvankam tiu lasta malbonhumoras.”

“Mi malbonhumora!” respondis Suzana moke. Ĉi-vespere estas al mi egale, vi povas havi Gabrielan, se ŝi deziras kaj sinjoro Petro konsentas rekompence preni min. Cetere, Petro estas pli donacema ol vi, tion ni vidis la pasintan vintron.

“Mi konsentas,” rapide respondis Suzana, “ni povas tute interŝanĝi la estrojn, nome, se sinjoro Petro tion volas. Nur mi atentigas vin je tio, ke mia kavaliro balbutas ofte dumnokte iun tute prozan nomon, imagu nur, Ana. Fi donc<sup>13</sup>, kiel ĝi malbonodoras je iu monaĥino. Kie li trovis ĝin? Hodiaŭ li sufiĉe trinkis kaj la koron ekregis vi, Gabriela.”

“Kara Armando, la knabinoj mem elektis. Se plaĉas al vi, mi petas. Nur ne ripetu tro ofte tiun nomon, mia Gabriela havas sufiĉe longajn ungetojn,” rimarkis Petro.

“Dankon,” aldonis Gabriela al Petro kaj turnis sin al Armando:

“Al mi ŝajnas, iu malforgesebla amo, restinta dio sciu kie, turmentas vin. Permesu al mi kuraci vin, vi tion forgesos tre rapide en la nomo de nova amo, kiun mi sincere sentas al vi. Vi konsentas, ĉu ne?”

“Tre interese, fraŭlino,” rediris Miroir tre gaje. “Tamen, ni ne povas paroli en la nomo de la nova amo, ĉar en tiu okazo devus ekzisti la malnova. Fine,

---

<sup>13</sup>Ndlr: La franclingva esprimo “Fi donc” signifas “Fi do”.

la knabinoj de via speco malmulte scias pri la sincera amo. Vi ŝanĝas viajn idealojn laŭokaze, transirante sen iaj pentetoj de unu amanto al la alia, kiel nun de Petro al mi. Ne meditu ni, ĉu tio ĉi estas ĉasta afero, mi ĉiel akceptas vian proponon, des pli, ĉar vi akcentis, ke viaj postuloj ne superas tiujn de Suzana kaj ŝiaj estis grandegaj. Do, ĉe tiaj knabinoj oni ne povas paroli pri la amo. Via sociala pozicio, permesu diri, ne estas pli alta ol la pozicio de la stratulinoj. La diferenco konsistas nur el la nomo, vi estas mastrino, ŝi estas stratulino. Cetere, mi ne deziras substreki, ke tio ĉi estas same malpura kiel la alia ĵus menciita okupo de viaj fratinoj sur la stratoj, la afero estas evidenta kaj bezonas nenian substrekon.”

“Interese vi parolas pri maloportuna situacio de la mastrinoj. Ĝi ŝajnas eĉ malpura afero, sed tamen vi akceptas la mastrinon. Estu ni sinceraj, ankaŭ via pozicio de amanto de iu mastrino ne estas pli bona ol la nia. Vi estas la viroj, ni la virinoj, jen la diferenco. Kiel amantoj la homoj vin konsideras ĉastaj, nin oni ne pritraktas tiel. Tio ĉi estas aparta moralo de la viroj, unu regulo por si, la alia por la virinoj. Brile! Ĉu vi kredas, ke ekzistus miaspecaj knabinoj, se ne ekzistus la viroj, kreantaj ilin? Juste vi pripensu, kiu estas pli kulpa, ĉu la suferanto, aŭ tiu, kaŭzanta la suferojn? Mi opinias, ke la alia kaj lian pozicion en nia ekzemplo mi pritraktas eĉ pli malalta, ol estas la mia. Tamen, min oni titolas: mastrino, vin sinjoro Miroir, amanto de la mastrino X. Y. Vin neniu riproĉas pro tio, min oni nomas malhonesto, kvankam tiu mokado min tute ne rilatas. Al mi estas la opinio de la homoj tute egala afero, ĉu bona, ĉu malbona.”

“Eble vi pravas, sed franca virino, viaspeca virino, ne havas envieblan pozicion. Ankaŭ multaj aliaj

virinoj estas malbonaj, pli multe ili estas amatinoj ol patrinoj kaj, kiam ili estas patrinoj, ili scipovas ankaŭ esti amatinoj de fremdaj homoj.”

“Mi iomete sentas viajn vortojn ofendo de franca virino, kvankam mi havas nenian rajton defendi ŝin. Kulpaj estas nur la viroj. Ekzemple, vi havas laŭleĝan edzinon. Pro kiu ajn kaŭzo ŝi eble ne sufiĉas al vi, vi eksentas la bezonon je amatino. Kaj tiam, eble vi iufoje revenus hejmen de via amatino kaj trovus la edzinon kun fremda viro. Fariĝus, ĉu ne, laŭkutima skandalo, vi eble postulus la disedziĝon. Do, la krimon de via edzino vi ne povus pardoni, kvankam vi antaŭ kelkaj momentoj venis de alia virino, ĉe kiu vi havis nur tiom da feliĉo, ke ŝia edzo vin ne trovis kune. Tia estas via moralo. Vi kuraĝas kelkafoje esti la amanto de fremda virino, pritraktante tion ĉi tute malgrava afero, sed ke via edzino estu ankaŭ amatino de fremda viro, ne, tion oni ne povas toleri. Bela moralo, ĉu ne? La viroj malaltigas siajn edzinojn je amatinoj, sed tiaj akcidentoj, feliĉe, estas ankaŭ ĉe ni tiel malmultaj, ke ili ne minacas al la moraleco de la tuta popolo.”

Miroir iomete pripensis la vortojn de Gabriela. “Eble la knabino pravas? Ŝi pravu, estu mi eĉ egala al ŝi, mi deziras vivi, Ana? Malgrava kaprico de pasio, pasinta senbrue. La filo? La infano naskiĝinta en la amo. Li portos ĝis la morto ŝian nomon anstataŭ la mia, kio do? Kion mi ŝuldas al li? Doni nur la sufiĉajn rimedojn por la vivo, kion mi nepre faros, se oni postulos, kaj nenion plu. Li ne povus pli agrable vivi, se mi laŭleĝe edzinigus Anan.”

Tiel meditante li daŭrigis trinki kun la geamiko kaj alvenis en sian loĝejon kun la alia amatino. En duone ebria cerbo li konkludis, ke li bone faris. “La

amatino, neniel pli malbona ol Suzana, sed kun malpli grandaj postuloj. Fantazias ŝi pri ia amo, kio ne ekzistas kaj estas tute superflua.”

Post kelkaj tagoj li eksentis, ke Gabriela ne estas tiel deca, kiel li imagis. Ŝi eĉ postulis aŭtomobilon. Li aĉetis ĝin, ĉar dum la unuaj tagoj li ja ne povis rifuzi ŝiajn petojn. Poste sekvis unu vojaĝo en Anglujon, iaspeca geedziĝvojaĝo. Kelkafoje li eksentis, ke tiu ĉi virino sin alkroĉis al li kvazaŭ hirudo. Li konsolis sin per tio, ke li parolis al si mem: “Se la homo aĉetas la hirudon por purigi sian sangon kaj metas ĝin sur doloran karnon, tiam oni ĝin devas lasi, ke ĝi suĉu ĝis la satiĝo.” Sed Gabriela neniel volis satiĝi, ŝajnis eĉ, ke ŝi ne havas la intencon iam fari tion. Por iu dimanĉo ŝi postulis anstataŭ akvo en la banejon enverŝi la lakton de azeninoj. Tiam Miroir la unuan fojon vere ekkoleris:

“Gabriela, vi estas freneza. Vi postulas ridindajn aferojn. Mi plu ne povas tiel, ĉesu jam kun frenezajoj. En la tuta urbo oni parolus pri Miroir kaj lia amatino, kiu faras pompaĵojn.” “Se vi pensis, ke vi per mi fariĝos riĉulo, vi trompis vin. Krome, tre avara vi estas, ĉu mi ĝisvivis, ke por sensignifaj kelkaj centoj da frankoj vi faras tiajn riproĉojn?”

“Vi jam ricevis kvindek ĝis sesdek milojn da frankoj, mia kara, nur dum tiuj du monatoj, krom nia aŭtomobilo. Preskaŭ mi bedaŭras tiun monon, ĉar vi estas tiel kapricema.”

“Se mi pro la kapricoj foriros?”

“Laŭvole.”

“Tre bone, subskribu la ĉekon por cent miloj, la aferojn ni povas tre rapide solvi tuj.”

Je tio ili restis. Ŝi plu ne postulis la lakton de aze-  
ninoj, ĉar li neniel volis subskribi la ĉekon. Post tiu  
diskuto, en kiu venkis Gabriela, ricevinta post kelkaj  
semaĵoj la deziratan lakton, Miroir havis la okazon  
baldaŭ elspezi la duoblon de tio, kion ŝi postulis por  
la foriro. En li ekĝermis iu freneza amo, faranta lin  
tute blinda kaj des pli ĝi plirapidigis la ruiniĝon de  
lia materia stato, ju pli senprudentaj estis la deziroj  
de Gabriela. Li sentis, ke sen ŝi la vivo estus neebla.  
Vidante Gabrielan en ŝia beleco, ĉarman amatinon,  
li malofte sentis, ke ŝi estas efektive lia diablo, kiu  
subfosas la fundamentojn de lia materia havaĵo, kiel  
ŝi subfosis la emon por la verkado, per kiu li ja perla-  
boris la tutan havaĵon. Tiu ĉi senpripensa amo kreis  
el lia hejmo trankvilan restadejon, en kiu vivas sen-  
zorge li kaj ŝi, sen ia meditado pri ĉio alia. Dum la  
momentoj, kiam li estis konscia pri la materia rui-  
niĝo, li memoris pri Ana, pri sia filo, tie malprok-  
sime. Tiam por momento ekregus lin la doloro kaj  
kiel inkubo lokiĝus en lia animo. Malfeliĉe, kiam li  
sabriĝis de la ama ebrieco, en kiu lin tiel lerte tenis  
Gabriela, aperus denove Gabriela proksime de li, ĉar  
preskaŭ neniam ŝi lasis lin sola. Tiam liaj pensoj pri  
ĉio ekster li malaperus kiel gasbalono, krevanta en  
pli maldensa aero, kvazaŭ ŝi ensorcus lin. De ŝi li ne  
havis eĉ unu liberan horon, tage, nokte, tute egale,  
ĉiam. Ŝi suĉfiksitis sin kiel la hirudo, ĵaluza je ĉiu vi-  
rino, kiun li ekrigardus. Ŝi balbutis pri iu nedirebla  
amo, kiun ŝi al li sentas. Ripetante la samon milfoje  
dumtage en sennombraj variaĵoj, neniam ŝi enuigis  
lin. Ŝi estis bela Gabriela, ĉiam afabla Gabriela, lerta  
amatino, apud ŝi ĉiam li. Li povis vidi nur la spacon  
inter ili, kreinte tiel al si tre mallarĝan horizonton,  
malantaŭ kiu estas tute nekonata, mizera lando de

sobruĵoj.

Miloj da frankoj eliĝadis el lia ŝparhavaĵo rapide. Li ne pensis, ke post kelkaj monatoj sekiĝos ĉiuj monfontoj kaj ke venos la tempo por vendi la domegon.

Tiu tempo neeviteble alvenis. Tiam li, konscia pri la vero, eksentis en sia animo ian doloron je tiu karaĵo de li mem perlaborita kaj malakceptis ŝian proponon. Ekstis malgrava diskuto, dum kiu Miroir volis pruvi, ke sen tiu ĉi domego ilia vivo ne plu estus tiel bela, ĉar la amo en fremda domo ne estus tiel libera. Alia afero estas senti sin la mastro en sia propra domo. Tiam la aliaj povas babilu kion ajn, se ili ne konvenas, simple oni ilin elĵetas. Ĉar la mono tamen estis necesa, li solvis la aferon, tiel ke li vendis sian aŭtomobilon.

“Kiam ne plu ekzistos la aŭtomobilo, nek la mono,” pensis Gabriela, “li tamen vendos la domegon. Fine, oni mallonge vivas, kial ne ĝui, se oni povas.”

La situacion de Miroir eksciis ankaŭ liaj amikoj, kaj la anonco pri la vendado de la aŭtomobilo venigis ankaŭ Petron en lian loĝejon. Lin Miroir ne vidis depost tiu gaja vespero, kiam ili interŝanĝis la amatinojn.

“Mi kredas, ke Gabriela vin tute senigos de via havaĵo, Armando, tion ŝi provis ankaŭ ĉe mi, sed mi estis pli forta.”

Miroir skuis siajn ŝultrojn, sed ne respondis.

“Ŝajnas, ke vi enamiĝis, frenezulo.”

“Eble mi estas frenezulo, Petro. Tamen mi dankas al vi, ke ni interŝanĝis la amatinojn. Bona afero ĝi

estas. Mi eksentis, kamarado, ke post la vendado de mia aŭtomobilo mi devos kun ĉarma virino pripensi, kiel ni vivos. En tio kuŝas la tuta ĉarmeco de la vivo, kamarado. Komunaj zorgoj, komunaj ĝojoj, jen la esenco de la edzeco. Tiu ĉi fakto estas tre alloga kaj ligas min pli multe al ŝi ol la tuta ĝisnuna amo. Jen, tiel mi parolas de hieraŭ al mi, Gabriela konsentas edziniĝi kaj mi estas pro tio feliĉa. Kiam la mono de la aŭtomobilo elglitos el miaj manoj, tiam eble venu Petro por vidi, ĉu mi aliigis mian opinion.”

Petro foriris, grumblante:

“Mi neniam kredis, ke pro unu amatino iu povas perdi la prudenton. Fine, faru li laŭvole, mi ekspedis Suzanan tute simple per dek miloj. Tio estas pli prudenta ol havi ŝin ankoraŭ en la loĝejo. Kaj li eble eĉ vendos la domon, post kio ‘ĉarmega’ Gabriela ekkrios:

“Ne plu ekzistas la amo.”

#### IV

En bele meblita ĉambro sidas du virinoj. Estis ĉirkaŭ la tria horo posttagmeze. Apud ili sidas sur mola felo de norda urso brunokula knabeto, aĝa ĉirkaŭ tri jaronj, kun ruĝaj vangoj, ludante per vagonaroludilo. Apud li estis elligna ĉevalo, kiun li hodiaŭ tute ne atentis. En unu angulo estas rompita aŭtomobilo, la donaco de ‘onklo’ Petro.

La servistino alportis unu leteron, kiun unu el la virinoj rapide malfermis, eltirinte ĝin el ŝia mano. Ŝia melankolia vizaĝo sereniĝis kaj ŝi entuziasme ĉirkaŭprenis la alian virinon, kiu sidis apud ŝi, ekkriante:

“Pripensu Ana, li alvenas. Li alvenas. Li revenas. Preskaŭ mi ne kredas. Neniam ĝis nun mi kredis

ĝisvivi tiun tagon, kiun mi opinias la plej bela en mia vivo. Tiam aperos por mia animo kelkaj varmaj radioj de l' suno.”

Ana ridetis kaj diris:

“Efektive, vi estas feliĉa, Natalia. Mi neniam ĝisvivos tiom da feliĉo. Ah, tiu Armando.”

“Vi ankoraŭ deziras lin, Ana?”

“Ne, nur estas malagrabla al mi pensi pri la infano, Natalia. Plu mi ne deziras lin, ĉar pro tiu doloro, kiun li kaŭzis al mi, kaj la honto antaŭ la homoj, neniam mi pardonos lin.”

“Eĉ ne tiam, se li revenus kaj petus pardonon?”

“Eĉ tiam ne, Natalia. Ankaŭ ne tiam, se mi scius, ke per la nova rifuzo mi estus ankoraŭ pli malfeliĉa. Vi ne scias, kion signifas la malamo de la virino, kiu ege amis kaj pensis, ke ŝi estas amata. Tiu ĉi malamo plifortiĝis, ĉar mi lin petegis, ke li almenaŭ traktu, ke nia amo havu laŭleĝan formon kaj li kruele rifuzis.”

“Ĝuste en tio konsistas la grandeco de la animo, Ana, se ni pardonas al tiuj, kiuj nin malaltigas kaj vipas.”

“Bedaŭrinde, mia kara, mi ne estas vi, kaj se vi estus sur mia loko, certe vi ankaŭ la samon parolus. Nun ĉio estu finita. La gepatroj ne volas scii pri mi, multaj estintaj amikoj malŝatas min. Tio estas la faktoj, kaj se la faktoj estas tiaj, mi devas malami. La homoj nomas min malĉasta, krom malmultaj esceptoj. Se li revenus kaj ni kuniĝus ĉe la altaro, mia situacio tamen ne pliboniĝus. Nun mi havas almenaŭ tian ĝuon, ke mi povas malami. Lin mi malamas kiel virino, genuiĝinta antaŭ li, petanta je iom da amo kaj kompato pro la mondo kaj rifuzita.”



“Tamen, Ana, vi troigas. Tiu ĉi etulo estas via filo, la infano de via kaj lia sangoj. Lin vi amas, la patron vi malamas.”

“Tial, ke la patro estas malbonega. Tiu ĉi infano devos esti pli bona, ĝin mi edukos.”

“Ni devas la malbonon ripari, kara Ana, plibonigi la malbonon. Bonigi la malbonon oni ne povas per la malamo, nur la amo estas tiu, kiu kreas la bonecon en la mondo.”

“Dankon, mia kara, mi konservas mian opinion. Eble mi estas malbona virino, ĉar mi malamas. Tamen, mi ne volus grimpi antaŭ li ankoraŭ foje, por esti denove rifuzita. Cetere, mi amas la infanon, mia amo al li estas tre firma, pli firma ol ĉiuj aliaj amoj, kvankam vi ne komprenas, permesu kara Natalia, la patrinon kaj ŝian amon. La patrineco vekas ĉe la virinoj la veran amon. Se la infano ekploretas, tuj estiĝas la zorgo, kial. Se ĝi proksimiĝas al la fenestro, jen la patrino apud ĝi, timante, ke ĝi falos. Se mi donas al li nutraĵon, mi mem antaŭe gustumas por konvinkiĝi, ĉu ĝi taŭgas por lia stomako. Kien ajn mi rigardas, ĉie estas mia infano, tiu ĉi knabeto, mia filo. Mi pensas, ke en la nomo de tiu nemezurebla patrina amo mi povas malami la patron, neniulon, kiu malkompatis min.”

Natalia ne respondis, sentante, ke Ana jam afektas, kaj ne volis plu ŝin per la respondoj turmenti. Ambaŭ virinoj eksilentis, pensante pri siaj diversaj zorgoj.

Iom poste ili akceptis la viziton de sinjoro inĝenero Petro Memo kaj lia edzino Julinjo. La malgranda knabeto, rimarkinte la inĝenieron, leviĝis rapide kaj kuris al li renkonten:

“Onklo Petro, donu bombonojn.”

La ‘onklo’ lerte elpoŝigis papersaketon, plenan de diverskoloraj bonbonoj, donis al li du, tri pecojn, transdonante la restaĵon al la patrino, por ke la filo ne manĝu tro multe da sukeraĵoj. La etulo baldaŭ revenis al sia ĝisnuna loko, daŭrigante streĉi sian vagonaron.

“Onklo Petro, vidu, pli rapida ĝi estas ol via aŭtomobilo,” kriis la etulo, rigardante moviĝantan ludilon.

“Jes, jes, infano mia, ĝi pli rapida estas ol mia aŭtomobilo,” karese respondis Memo. “Nur ne streĉu ĝin tro multe, rajdu iom sur la ĉevalo.”

“Mi ne volas, onklo Petro, aĉetu al mi la veran ĉevalon, tiam mi rajdos. Vi scias, tian belan, kian ni foje renkontis sur la strato.”

“La via estas la vera ĉevalo por la infanoj, Armando. Ĝi ne rompos vian kolon kaj ne batos vin perpiede, sed tiu de sur la strato tiel faras. Kiam vi estos pli granda, mi aĉetos al vi la veran ĉevalon por plenkreskuloj.”

Kvazaŭ la etulo momente pripensus liajn vortojn, sed baldaŭ li ekpuŝis sian vagonaron, kriante:

“Tuu, tutu, tuuu, tutuuuu.”

“Ĝi ne estas aŭtomobilo, Armando,” interrompis lian kriadon la inĝeniero. “La lokomotivo ne krias tiel.”

“Do, kiel, onklo?”

“Ks, ks, ks, ks, ks, ks.”

“Ah, tion oni ne povas tiel krei kiel tutu, tuu. Kriu mia vagonaro kiel aŭtomobilo,” diris la infano, provinte imiti la inĝenieron.

Julinjo paŝis al la infano kaj levis lin de sur la planko, portante lin iomete tra la ĉambro. Tiam ŝi lin revenigis al la ludiloj.

“Ora knabeto, ĉu ne, la vera patro, tiom li similas al li,” rimarkis Julinjo, palpebrumante signife al Memo.

Ana ŝin rigardis strange, esprimante sian opinion, ke ne estas oportune paroli tion antaŭ la knabo, kvankam li ne multe komprenas. Por li la patro ne ekzistu, almenaŭ por nun.

“Stranga vi estas” rediris Memo. “Se tiu sinjoro estas eĉ fripono, tamen... tamen... oni ne devus tiel diri. Pripensu, kio okazus, se la juĝistoj juĝus severe laŭ la paragrafoj, ne konsiderante, en kiu momento okazis krimo. Oni devas konsideri ankaŭ la disponon de la homo, tiam la kondamno estas justa kaj laŭ tio pli homa. Ni ĉiuj pekas, ne ekzistas senpekuloj, tial ni ĉiuj devas pardoni.”

“Bone, bone, sinjoro Memo, sed se iu individuo frakasmus al vi iom la kapon, ĉu vi kolerus?”

“Jen vi, denove. Kompreneble, ke mi kolerus, sed dum la tuta vivo lin mi certe ne malamus.”

“Do, vi kolerus, ke li frakasis al vi la kapon. Kial mi ne koleru, ke li mortigis al mi la animon?”

“Vundis la animon, vi volis diri. La vundita animo kaj la frakasita kapo estas kuraceblaj. La animo, vere, pli malfacile. Tamen, se alvenas bonega kuracisto, ankaŭ ĝi estas kuracebla. La tempo estas la plej bona kuracilo. Post nedifinita tempo oni ĉion forgesas, nur ni devas mem voli forgesi. Eĉ la malamon oni devas forgesi. Cetere, se Miroir aperus antaŭ vi kaj petus pardonon, vi eĉ pardonus, kara Ana.”

“Ne!” diris ŝi decide. “Ni povas paroli pri io alia.”

“Tute prave, ni parolu. Jen, antaŭ kelkaj tagoj mi ĉeestis la kunvenon de esperantistoj. Estis tre interese, ĉar ni havis kelkajn gastojn. Mi alvenis frumatene hejmen, tial la sinjorino min preskaŭ forpelis sur la straton.

“Vi tion meritis,” aldonis moke Julinjo. “Mi petas, estinte fraŭlo li nur malofte vizitadis la societon. Depost la edziĝo li intense laboras, parolante al mi: ‘Mi ne volas, ke oni rakontu, ke pro la edziĝo Memo perfidis la movadon. Mi ne deziras, ke la homoj parolu ke, se, edziĝas unu samideano al la samideanino, estas tute kredeble, ke la movado perdos unu membron aktivan.’ Tiu membro estos li, ĉar ŝi post la edziniĝo estas jam tute certe perdita por la movado.”

“Sinjoro Memo estis ĉiam ŝercema,” aldonis Ana.

“Ne estas ĝi la ŝerco, fraŭlino. Tre grava estas la afero, se oni batalas por unu ideo, eĉ se oni konsideras ĝin por nun neefektivebla. Se mi kredus, ke neniam oni povus kunigi elektrokurenton en pli granda amaso per pli malgrandaj kaj malpezaj ujoj, ol estas plumbaj akumulatoroj, mi neniam trovus unu kiel en mia automobilo. Fine, tuj ne devas oni havi utilon, kelkafoje eĉ nura kontenteco rekompencas la laboron. Vidu, antaŭ kelkaj tagoj okazis al mi unu stranga afero. Venis al mi junulo kaj lerte li ricevis de mi cent dinarojn kiel donacon. La junulo volis vojaĝi, tial li bezonas la monon. Samideanoj donas kaj helpas, por ke ili montru la utilecon de la lingvo en praktika vidpunkto. Mi parolis kun li kelkajn plej simplajn frazojn, ne havante pli multe da tempo. Tiukaze mi aĉetis de li la karteton kun esperanta teksto je cent dinaroj. La sekvantan tagon mi eksciis el

'Triumfonta', ke la junulo posedas en Esperanto nur kelkajn dekojn da frazoj kaj tute ne estas samideano. Jen, diabla afero, sed mi taman estas kontenta, ke mi donis cent dinarojn."

"Kvankam vi ne plu kompatos esperantistojn, ĉu ne?" ridetante rimarkis Natalia.

"Tute kontraŭe, fraulino. Jen, kial mi estas kontenta. La junulo volas vidi la mondon kaj iom lernis Esperanton. Nun li ne scias, kion li scios morgaŭ. Ĝuste tio ĉi ne igus min iam rezigni pri la lingvo. Doninte cent dinarojn, mi kontentiĝis, kredante, ke la sama bona sorto akompanos la junulon tra la tuta mondo kaj li efektive ekposedos la lingvon plene, konvinkiĝinte, ke ĝi efektive estis utila al li. Se ĉiuj rifuzus lin, li neniam lernus. Ni devas por nun esti pli toleremaj. En la hodiaŭa tempo, kiam ankoraŭ ne konsolidiĝis la malbonoj de la milito, ni devas ĝoji pri ĉiu nova adepto, aliĝanta al ni dum la stato de kruda materialismo, kia hodiaŭ regas. Mi eĉ devas toleri iun ajn komencanton, ke li legu al mi la tradukojn el nacia literaturo, kiujn li faris nedigesteblaj eĉ por stomako de hundo, se oni eĉ spicus ilin per butero. Kial mi tion toleras? Tial, ke por hodiaŭ ĉiu individuo, posedanta la lingvon plene aŭ nur duone, estas bezonata. Ili skribu, sed oni ne presu. Jen, hodiaŭ estas ankoraŭ transira epoko kaj ni bonvenigu ĉiujn laboremulojn. Tial mi insistas, ke mia sinjorino venu pli ofte en la societon, por helpi en tio, kion ŝi kapablas. Ĉiuj ni devas labori laŭ nia kapableco."

"Ni ja deziras labori," diris Natalia.

"Nenion mi diras por vi, samideanino. Vi estas konata pro via aktiva kunlaborado kaj samideaneco."

"Tiom da fojoj vi akcentas la samideanecon, sin-

joro. Ŝajnas, ke pro samideaneco mi iom eksuferis,” diris Ana.

“Vi eraras, fraŭlino. Vian aferon oni ne povas kompari kun la samideaneco. Ĝi estas efektive unika en la historio, se oni konsideras, ke vi interkompreniĝis kun Armando Miroir per Esperanto. Rigardante la alian flankon de la medalo, tio okazas al sennombraj fraŭlinoj, parolantaj kiun ajn lingvon kun sia amanto. Ne faru ni demandon pri tio, kiel ankaŭ ni ne demandu, ĉu estas kulpa franco, anglo aŭ iu alia, kaj en kiu societo la malagrabra akcidento okazis. Tiaj aferoj okazas ĉie. Fine, se ni volas esti tute justaj, tio okazis al vi en la momento, kiam la societo ne plu estis en Bled. Tie estis nur vi kaj li kaj inter vi ne regis samideaneco, sed ameco.”

“Ĉesu,” rimarkis Julinjo. “Vi ofendas.”

“Kontraŭe, la sinjoro tute pravas, Ana devus pripensi antaŭ ol ŝi starigas tiajn rimarkojn,” diris Natalia. “Ŝi estas tre kapricema.”

“Malbona psikologo vi estas,” koleretis Ana. “Cetero, mi opinias, ke sufiĉe longe vi min turmentis per tio. Ĉiu via vorto dolorigas kaj milfoje mi jam pentis mian pekon. Sinjoro Memo estas specialisto por nereкта memorigo pri mia malsaĝeco. Pri Natalia mi eĉ ne parolu, ŝi centfoje tage pri tio parolas, kvazaŭ demono apud mi estanta kaj neniel forigebla. Kial vi ĉiuj ne donas al mi la okazon kaj tempon por forgesi ĉion? Vidu, sinjorino Julinjo estas prudenta virino, ŝi ne turmentas min. Vi min turmentas. Donante al mi de tempo al tempo pli bonajn esperojn per viaj paroladoj pri lia reveno, vi min ankaŭ turmentas. Kvazaŭ lia reveno de vi dependus, vi parolas pri ĝi, ne povanta fari eĉ la streketon por mildigi mian suferadon.

Paroli vi povas, per tio turmenti, sed revenigi vi ne niun povas. Tamen, mi estas kulpa mem, ĉar mi faris tiun rimarkon, kiam entute ne temis pri mia afero. Mi mem ĝin hodiaŭ okaze temigis, sed vi povis eviti ĝin.”

“Vi tute prave rimarkis,” diris Julinjo. “Se tiu sinjoro estus samideano bona, li neniam forlasus vin. Li ne estis bona samideano, nur tre malbona homo, ne nur pro lia konduto kontraŭ vi, ankaŭ aliel, ĝenerale.”

“Vi pravas,” akceptis Memo la parolon. “Ekzistas iaspecaj homoj, kiuj eniĝas en la movadon, celante ĝin utiligi por siaj propraj celoj. Feliĉe, tiaj homoj estas malmultaj kaj oni ilin tre facile rimarkas, antaŭ ol ili povas fari ian malutilon. Cetere, ni ŝanĝu la temon pri Esperanto entute, por ĉiuj pritraktindaĵoj ne sufiĉus eĉ unu longa romano. Kion skribas Unulo?” li turnis sin per la demando al Natalia.

“Li alvenas nun, apenaŭ post tri jaroj, promesante ĉiujn nin surprizi per io.”

“Ĉu per la donacoj?” demandis ĉiuj mire. Ana aldonis:

“Pri tio vi ne rakontis al mi, Natalia.”

“Vi ankaŭ ĝojos,” respondis enigme Natalia.

“Eble la poeto volis nin igi scivolemaj?” demandis Julinjo.

“Mi kredas, ke tio ĉi estos la plej bela donaco por Natalia,” ŝerce diris Memo.

Ĉiuj ekridis, daŭrigante la interparolon ĝis la malfrua vespero. La malgranda Armando ekdormetis apud siaj ludiloj kaj ridetis per anĝela rideto. Rimarkinte

tion, Memo kaj Julinjo foriris, lasinte ambaŭ virinojn solaj.

La knabinoj kuŝiĝis post iom da tempo. Natalia sonĝis pri la reveno de la karulo, dum Ana ĝis la malfrua nokto singultis. Malfeliĉa ŝi estis, daŭre vipata de la abomenita amo.

## V

Iumatene je la oka horo haltis aŭtomobilo apud bela domego en unu el la ĉefaj stratoj de Marseille. La alveninto sonorigis ĉe la domo numero 33. La pordisto malfermis la pordon, demandante ĝentile pri lia deziro.

“Sinjoro Miroir, en kiu etaĝo li loĝas?” demandis same ĝentile la alveninto.

“Sinjoro Miroir ĉirkaŭ unu jaron ne loĝas plu en la domego.”

“Li transloĝiĝis, ĉu la domo ne apertenis al li?”

“Verŝajne vi estas fremdulo, mia sinjoro. Antaŭ unu jaro vendis sinjoro Miroir la domegon kaj forvojaĝis kun sia mastrino Gabriela. Antaŭ unu monato li revenis el Ameriko sola en Marseille, dum ŝi restis tie, trovinte konvenan, ekspluateblan personon. Kun nesufiĉaj rimedoj restis sinjoro Miroir kaj faris en sia malprudenteco ankoraŭ unu malprudentan agon. Li malbone pafcelis sian kapon kaj nun li kuŝas malsana en la centra sanigejo, jam unu monaton kaj duonon. Tie vi lin trovos, sinjoro, en sufiĉe malbona humoro.”

La alveninto dankis la pordiston pro lia preciza informo kaj rekomencis la bonulon.



“En la centra sanigejo, sen la domo, sen mono, sen amatino. Bonega sukceso, li pereigis sufiĉan kapitalon dum tiel mallonga tempo nur pro unu virino, komprenanta bone sian metion. Vane ne diris Ganeza, ke mi trovos la ruinigitan animon, kiu bezonas helpon. Li bone konjektis la sorton de li, ne konante lin kaj pensante pri li nur per helpo de la malgranda kraĵono, kiun Miroir siatempe havis en la mano. Ganeza sciis ĉiujn personojn, kiuj iam posedis aŭ havis la kraĵonon en la mano. Strangulo! Mi preskaŭ ne kredis, ke mi efektive lin trovos en la malsanejo, en kiu lin Ganeza, laŭ sia aserto, klare vidis. Lia prikskribo tute korespondis al la aspekto de Miroir kaj mi tamen kredis, ke li ne estas tie. Jen, la pordistito pravigas lian konjekton kaj baldaŭ mi lin vidos kaj persone konvinkigos, ke Ganeza parolis la veron. Ruinigita animo? Kredeble, ĉar provinte mortigi sin mem, oni ĉiam havas ian difekton en la animo, aŭ cerbo.”

Tiel meditante Unulo alvenis en la malsanejon, kie li baldaŭ trovis la ĉambron de Miroir. Vidante Unulon ĉe la eniro, Miroir mallevis la okulojn kaj kun bandaĝita kapo impresis kvazaŭ suferulo, kun nepriskribeblaj doloroj en la animo. Unulo lin kompatis. Alproksimiĝinte al li, varme premis la poeto la manon de Miroir kaj salutis lin elkore. Li vere venis kun la intenco por memorigi lin pri lia malnobla ago kontraŭ Ana kaj pri lia devo. Nun la tuta afero ŝajnis superflua, Miroir ja suferis sufiĉe, oni ne povas lin plu turmenti per la insultoj. Ankaŭ oni ne povas kondamni lian iaman malnoblecon. Ŝajnis al Unulo, kvazaŭ la antaŭdestino punus senescepte ĉiun maljustaĵon. La homo, atencinta je si mem, certe suferis anime kaj ne plu povis toleri la dolorojn. Eble li tiu-

momente memoris pri Ana, pri sia maljustaĵo kaj la rememeroj igis la homon sen iaj ajn rimedoj uzi la revolveron?

“Sinjoro Miroir, vi min konas, ĉu ne?”

“Jes, mi konas, sinjoro Unulo. Pli bone estus, se mi ne konus vin.”

“Kial, samideano?” demandis li per milda voĉo. Tiu ĉi vorto: ‘samideano’ estis elparolita kun tiom da mildeco, ke eĉ Miroir iomete gaje ekridetis. “Diru sincere, ĉu vi kredas, ke la afero farita ne plu estas korektebla? Ĉu vi kredas, ke mi ne komprenas vin kaj vian nunan situacion?”

“Nenia kredo ĝermas en mia koro, sinjoro Unulo. Riproĉu min, riproĉu senfine, ke mi ankoraŭ iom suferu antaŭ ol mi denove ekuzos revolveron.”

“Kial, samideano? Pro ruinigita materiala stato? Pripensu, ke multaj homoj prefere mortas pro malsato ol mortigas sin. Vi ja havas amikojn, kiuj helpas al vi almenaŭ ĝis vi denove povos perlabori. Krome, vi forgesas, ke malproksime de vi suferas bonega, sed malfeliĉa Ana, atendante vin elkore. Almenaŭ pro ŝi vi devus vivi.”

“Ah, Ana,” eksopiris Miroir. “Vi verŝajne ne venas el via lando kaj ne parolis longan tempon kun ŝi. Jen la letero, legu, mi petas.”

*Sinjoro Armando Miroir,*

*Al via letero mi tuj respondas, kvankam vi eĉ tian ĝentilecon ne meritas. Post tri jaroj de miaj suferoj vi vin turnas al mi apenaŭ en la momento, kiam vi eble eksuferis. Dankon. Vi memoras bone, ke mi petegis*

*dum malagrablaj momentoj vian amon kaj vi rifuzis. Kion faras la virino iam primokata? Ŝi simple ridas al la viro, kiam lin denove ekkaptas la deziro je ŝi. Mi ridas sincere, elkore.*

Ana

“Vi respondis?”

“Per kuglo en mian kapon.”

“Interese. Tamen, la afero ŝanĝiĝos, kredu min. Tia letero signifas nenion, estis tio nur momenta dispono, elpenaĵo de virino. Virinoj ne povas sincere skribi en tiaj okazoj, volas sin montri pli fortaj, sed ili atendas, ke oni ankoraŭ foje ilin petu. Vi eraris. Nun diru, ĉu vi efektive ankoraŭ ŝin amas?”

“Des pli, ĉar ŝi plu ne volas scii pri mi. Mi eĉ neniam, miaopinie, ĉesis ŝin ami. Nur la aliaj virinoj, povantaj lerte devojigi ĉiujn miajn pensojn pri ŝi, estas kulpaj pro mia ago. Reveninte el Jugoslavio, mi pensis pri ŝi tage kaj nokte. La planon mi faris por la edziĝo, renovigis la meblojn en mia loĝejo kaj aĉetis la novajn, ĉar mi rezervis por mi post la reveno ankoraŭ la alian apartamenton de la unua etaĝo, maldunginte estintan longjaran loĝejluanton. Tiam min en iu kunveno de kelkaj amikoj ravis la ĉarmeco de Suzana, sed jam la duan tagon ŝi estis al mi teda. Tamen, elpeli mi ne volis ŝin, ĉar mi kompatis ŝin. Mi ricevadis la leterojn de Ana kaj ŝi interesiĝis pri ili. Ne sciis mi, ke per la rakontado de ilia enhavo, mi ebligis al la mastrino fari sufiĉe ruzan planon. Nome, ŝi ekuzis ĉiujn eblajn rimedojn por forgesigi al mi Anan kaj post kelkaj semajnoj ŝi jam aktoris la ĵaluzon. Pri tio mi ne zorgis kaj decidis post kelkaj semajnoj energie fini la tutan aferon, sed ŝi iutage

deklaris, ke ŝi estas graveda kaj minacis, ke la afero kun ŝi ne plu estas tiel facile solvebla, kiel mi imagas. Mi kompatis ŝin, ne havante la koron por forpeli la virinon sur la straton, eĉ ne meditante, ke oni povus al ŝi helpi aliamaniere nun en la komenco de tia stato. Al Ana mi ĉesis skribi, kredante, ke mia devo estas unue subteni almenaŭ Suzanan, por ke ŝi ne suferu. Subite venis la sama sciigo de Ana kaj mi min trovis en unu tute tikla situacio. Sed, tiu ĉi fakto min ligis des pli al Suzana, ĉar ŝi estis pli proksime ol Ana. La petoj de Ana vundigadis mian animon, sed mi ne povis helpi al mi. Post kelkaj monatoj mi konstatis, ke Suzana entute ne estas graveda kaj mi ekkredis, ke Ana ludas la saman ludon kiel ŝi, tial mi ne plu volis respondi. Al Suzana mi deklaris, ke mi ne plu bezonas ŝin, ĉar ŝi eble tute pereigos mian feliĉon, sed la virino ploris tiom lerte, ke estus peko ne ekplori kun ŝi kaj mi ŝin kompatis. Tiel ŝi restis ĉe mi. Nun, iuvespere mi interŝanĝis en ebrieco Suzanan kontraŭ Gabriela. Venontan tagon, vidinte, ke mi faris la alian malsaĝaĵon, mi simple volis adiaŭi Gabrielan, pensante, ke mi tre facile senigos min ankaŭ de Suzana, kiu min certe trompis kun iu alia. Vana estis mia ĝojo, Gabriela okupis tuj miajn pasiojn per sia ĉarmego. Al tiu lerta virino mi fariĝis la unuan tagon sklavo kaj fine devis eĉ vendi mian domegon. Foririnte kun ŝi en Amerikon, ni vivis bonege kaj ŝi ĉiutage pli varme parolis pri vera sia amo al mi. Mi sentis por momentoj, ke ĉio ĉi estas nura mensogo, sed mi deziris vivi kun ŝi kaj vivis, ne zorgante pri tio, okazonta morgaŭ. . . Kiam la mono estis preskaŭ tute elspezita, mi persistis reveni en Francujon. Ŝi konsentis iri daŭre kun mi, se mi eĉ nenion havas, sed antaŭ forvojaĝo ŝi kun sia tuta garderobo foriris

al la alia. Ŝin mi ne bedaŭris, ĉar post ŝia foriro mi eksentis, kiel granda azeno mi estas. Mi tute ekestris min, seniluziiĝinte la duan fojon. Tamen, estis jam tro malfrue. Unuflanke la manko de mono, aliaflanke la respondo de Ana, al kiu mi sincere deziris reveni, devigis min levi kontraŭ mi la manon, por eviti eble pli tragedian malsaton. Serĉi la helpon ĉe la amikoj neniel mi intencis, tial mi elektis la memmortigon. Ĝi ne sukcesis, mi provu denove. Pli prefere ol almozpeti la amikojn. Nun, se vi trovas necesa, insultu min, ke mi pripentu mian pekon ankoraŭ foje.”

“Vian krimon vi jam pripentis, mi diras al vi. Mi ne venas riproĉi, nur konsili mi volas vin. Tial vi akceptos mian proponon, t.e. . .”

“Nenian almozon sinjoro, vi forgesas, ke tiom da fiero mi posedas ankoraŭ.”

“Ne pri tio temas, samideano. Mi nur proponas, ke vi iru kun mi en Jugoslavion kaj la cetero estas mia devo, kredu al mi.”

“Neniel sinjoro. Evitu mi la tenton, vi ja tamen proponas al mi la almozon, ĉar vi pagus la tutan vojaĝon.”

“Nenian almozon. Finu ni ĉi tiun aferon tute simple. Ĉu ne elĉerpiĝis la stokoj de 'Ama revado' kaj ĝin mi volas eldoni, kion vi postulas? Do tute komerca propono.”

“De 'Ama Revado' mi havas ankoraŭ ĉirkaŭ mil ekzemplerojn.

“Tio ne ĝenas, mi do aĉetas tiujn mil ekzemplerojn, t.e. en mono ĉirkaŭ kvin mil frankoj. Por la nova eldono mi proponas al vi dudek milojn, kaj la afero

estas tute finita. Ĝis elĉerpigo de tiu sumo vi jam perlaboros.”

Miroir rifuzis, nomante tion ankaŭ la almozo, kaj Unulo penis por prui al li la kontraŭon. Fine li sukcesis kaj savis tiamaniere unu vagulon, paŝanta sur la danĝera vojo, la sklavon de sia pasio.

\* \* \*

Iun tagon dum la monato oktobro, kiam la vinberoj maturiĝas kaj el la vinberejoj eĥas gaja kantado de la rikoltantoj, la malgranda kapeleto akceptis du parojn.

En la unua paro estis ŝi malpli granda, li pli granda. Ŝi portis blankan vualon. Ambaŭ ridetis post la unua kiso ĉe la altaro. En la dua paro ŝi estis egale alta kiel li, sen blanka vualo. Li ridetis al la nova vivo, kisante ŝin ĉe la altaro eble la centan fojon. Ŝi ankaŭ ridetis al la malnova amo, vaginta kelkajn jarojn sur erara vojo, malproksime de ŝi.

Fino

